

# ***Ruĝa Sorĝo***

**verkis Mo Yan**

**tradukis Vejdo**

**e-Librigita de Elerno**

**aprilo 2016**

**Ĉongĉingo, Ĉinio**

# 1.

La naŭa de la oka lunmonato de 1939. Tiam mia patro, ido de bandito, estis iom pli ol dekkvara. Li iris embuski la japanan aŭtovicon sur Jiaozhou-Pingdu-ŝoseo, kune kun la trupo de Komandanto Yu Zhan'ao, kiu poste fariĝis legenda heroo laŭlonge kaj laŭlarĝe. Mia avino, kun vatita jako sur la ŝultroj, akompanis ilin ĝis la ekstremo de la vilaĝo.

Komandanto Yu diris: "Haltu." Kaj Avinjo haltis.

Ŝi admonis al mia patro: "Sekvu la vortojn de via adopta patro, Douguan."

Patro ne eligis vorton. Kiam li rigardis ŝian altan kaj grandan figuron kaj flaris la varman bonodoron elspiritan el ŝia vatita jako, li subite sentis atakon de malvarma aero kaj ekhavis frostotremojn. Lia ventro grumbladis kelkan tempon. Komandanto Yu donis frapeton al lia kapo kaj diris: "Ni iru, mia adopta filo."

Malklaris ĉio inter la ĉielo kaj la tero. La vidaĵoj nebule svagis. La konfuza paŝbruo de la trupo aŭdiĝis jam en malproksimeco. Antaŭ la okuloj de Patro pendis blue blanka nebulvualo, kiu ĝenis lian rigardon. Aŭdeblis nur paŝbruado de la trupo, sed ne videblis ĝia konturo. Tirante firme la baskon de Yu, Patro rapide movis siajn kruojn. Avinjo, kvazaŭ sur la bordo, pli kaj pli malproksimiĝis, kaj la nebulo, kvazaŭ martajdo, fariĝis des pli furioza, ju pli oni proksimiĝis al ĝi. Patro kroĉiĝis al Yu, kvazaŭ al ŝipflanko.

Tiamaniere Patro sin direktis al la tombo kun senvorta ŝtonsteleo destinita al si mem, la tombo kiu alte staris en kampo de flamruĝa sorgo en lia hejmloko. Sur lia tombo siblis velkintaj herboj. Iam knabo kun nuda postaĵo venis ĉi tien, tirante neĝoblankan kapron. Ĝi senhasteme ronĝis la herbojn sur la tombo, dum la knabo, starante sur la steleo, pisis kolerplene. Poste li ekkantis plengorĝe: "La sorgo ruĝiĝas — japanoj alvenas — pretigu vin, samlandanoj — pafu per fusilo kaj kanono."

Kelkaj diris, ke la knabo paŝtanta kapron estas mi, sed mi ne scias, ĉu tio estas mi aŭ ne. Iam mi kovis ekstreman amon al la Nordorienta Vilaĝo de Gaomi-regiono kaj iam ĝisostan malamon al ĝi. Post kiam mi plenkreskis, mi eklernis Marksismojn kaj fine venis al la kompreno, ke la Nordorienta Vilaĝo de Gaomi-regiono sendube estas la plej bela kaj la plej turpa, la plej unika kaj la plej vulgara, la plej sankte pura kaj la plej malpura, la plej heroa kaj la plej fripona, la plej ebriiga kaj la plej amoveka loko en la mondo. La samlokanoj de la generacio de mia patro, kiuj vivis tie, tre ŝatis manĝi sorgaĵojn kaj planti sorgon en granda kvanto ĉiujare. Dum profunda aŭtuno de la oka lunmonato etendiĝas senlime la sangruĝa maro de sorgoplantoj. Ili kreskas alte kaj dense en prospero, aspektante triste amindaj kaj inspirante ondantan amon. En morna aŭtunvento la suno ardas kaj pufaj blankaj nuboj flosas sur la lazura ĉielo. Sur sorgoplantoj glitas purpurruĝaj ombroj de tiuj pufiĝantaj blankaj nuboj.

Dum kelkaj jardekoj vicoj da malhele ruĝaj homoj ĉiam navedis kaj insidis inter sorgoplantoj. Ili faris mortigojn kaj prirabadojn, kaj ili defendis sian patrolandon per serio da dramoj bravaj kaj tragikaj. Komparado kun ili vere paligas nin malindajn posteulojn, kiuj ankoraŭ vivas. Samtempe kun mia progresado mi sincere sentas, ke la homa specio vere degeneras.

Elirinte el la vilaĝo, la trupo marŝis sur mallarĝa kota vojo. La bruo de paŝoj miksiĝis kun siblado de herboj ĉe la vojrandoj. Nebulo tre densiĝis kaj ŝanĝiĝemis vigle. Sur la vizaĝo de Patro sennombraj akveroj jam kuniĝis en grandajn akvogutojn. Tufo da liaj haroj algluiĝis al la verta haŭto. Alŝvebis el la sorgokampoj ĉe ambaŭ flankoj de la vojo la delikataodoro de mento kaj tiu de maturiĝintaj sorgospikoj kun ioma amareco kaj ioma dolĉeco. Tiuj odoroj jam ne estis novaj kaj mirindaj al li, ĉar li jam kutimis al ili. Dum ĉifoja marŝado en densa nebulo liajn naztruojn atakis tiaspeca nova kaj mirindaodoro kun freŝa dolĉeco el inter flavaĵoj kaj ruĝaĵoj. Laodoro kaŝe filtriĝis el mento kaj sorgospikoj. Kaj ĝi vekis tre malproksiman rememoron profunde en lia animo.

Sep tagojn poste estis Aŭtunmeza Festo, la dekkvina de la oka lunmonato. Brila plenluno malrapide leviĝis super silente starantaj sorgoplantoj tra la kampoj. La sorgospikoj, banataj en lunlumo, brilis kvazaŭ trempitaj en hidrargo. Sub la distranĉita lunombro Patro ekflaris la sangofreŝe dolĉan odoron pli fortan je sennombraj obloj ol nun. Tiam Komandanto Yu tiris lin je la mano kaj iris en sorgokampo. La kadavroj de pli ol tri cent vilaĝanoj malorde kuŝis tie kaj tie, unuj sur aliaj. Ilia sango akvumis vastan spacon de sorgokampoj kaj maceris la nigran grundon piede de la sorgoplantoj en malsekan koton, tiel ke ili malrapide kaj malfacile movis siajn paŝojn. Tiaodoro estis sufoka. Alvenis aro da hundoj, kiuj pretis vori la karnon de la mortintoj, kaj kaŭrante en la sorgokampoj, direktis brilan rigardon al Komandanto Yu kaj Patro. Yu eligis pistolon kaj pafis — du okulbriloj de hundo estingiĝis. Kaj lia alia pafado mallumigis aliajn du hundajn okulojn. La hunda aro tuj diskuris kaj sidiĝis malproksime, jelpante kaj avido rigardante al la kadavroj. La sangofreŝaodoro des pli intensiĝis.

Yu laŭte kriis: “Japanaj hundoj! Japanaj hundidoj!” Li elpafis ĉiujn kuglojn al la hunda aro. La hundoj jam diskuris senspure. Li diris al Patro: “Ni iru, mia filo!” Ili ambaŭ, maljuna kaj juna, iris al la profundo de sorgokampoj sub la lunlumo. La sangofreŝa kaj dolĉaodoro, kiu ŝvebis super kampoj, saturis la animon de Patro. En postaj pli krizaj kaj kruelaj jaroj ĝi ĉiam akompanis lin.

En nebulo la tigoj kaj folioj de sorgoplantoj furioze sibladis, kaj Inko-rivero, kiu lante fluis sur tiu ĉi malalta ebenaĵo, brile bruis, jen forte jen malforte, jen proksime jen malproksime. Kiam Patro kuratingis la trupon, li aŭdis antaŭ kaj malantaŭ si klakajn paŝojn kaj pezajn spirsonojn. Kolbo de fusilo kunfrapiĝis kun alia kolbo. Piedo surtretis sur ion, kiu ŝajnis osto de mortinto. La ulo antaŭ Patro laŭte ektusis kaj la sonoj de lia tusado estis tre konataj. Je ekaŭdo de tiu tusado Patro tuj ekpensis pri la du grandaj oreloj kongestitaj pro ekscito. Tiuj grandaj oreloj maldike diafanaj kaj plenaj de delikataj vejnoj estis la okulfrapaj organoj sur la kapo de Wang Wenyi. Wang estis malalta, kun granda kapo kuntiriĝinta inter siaj alte levitaj ŝultroj. Patro pene rigardis tra la densa nebulo kaj vidis lian grandan kapon skuantan je ĉiu tusado. Patro rememoris pri lia kompatinda mieno, kiam li, batite, skuadis sian kapon sur la ekzercejo. Tiam Wang ĵus aliĝis al la trupo de Komandanto Yu. Adjutanto Ren ordonis al li kaj aliaj trupanoj: “Dekstren!” Wang ĝojplene stamfis kaj sin turnis al oni ne sciis kiu direkto. Adjutanto Ren donis vipbaton al lia postaĵo, sed li ridete krevis siajn lipojn kaj ekkriis: “Hu, la patrino de miaj infanoj!” Oni ne povis distingi, ĉu lia vizaĝesprimo estas plora aŭ rideta. Vidinte la scenon, la infanoj ekster la ĉirkaŭmuro eksplodis per laŭta ridado.

Komandanto Yu ĵetis sian piedbaton al la pugo de Wang.

“Pro kio vi tusas?”

“Komandanto...” Wang retenis sian tusadon kaj diris: “mia gorĝo jukis...”

“Eĉ se ĝi jukas, ne tusu! Se vi malkaŝus nin, mi vin senkapigus!”

“Jes, Komandanto,” respondante, li nereteneble eligis kaskadon da tusoj el la buŝo.

Patro sentis, ke la komandanto faris grandan paŝon antaŭen kaj subpremas la nukon de Wang. Tiu siblis en la buŝo kaj ĉesis tusi.

Ankaŭ Patro sentis, ke la komandanto malstreĉis sian subpremadon de sur lia nuko, sur kiu restis du fingrospuroj tiel grandaj kiel maturaj purpuraj vinberoj. En liaj malhele bluaj kaj timplenaj okuloj sparkis iom da dankemo kaj ofenditeco.

Tre baldaŭ la trupo sin ŝovis inter sorgoplantojn. Patro instinkte perceptis, ke la trupo marŝas sudorienten. La kota vojpeco, kiun ili ĵus trairis, estis parto de la sola vojo kondukanta de la vilaĝo al la bordo de Inko-rivero. Dumtage la mallarĝa vojo montriĝis pala. Antaŭe ĝi estis pavimita per brile nigra tero, sed pro longatempa surtretado, la nigra koloro precipitiĝis en la suban tavolon. Sur ĝi multaj brutoj restigis siajn hufosignojn unuj sur aliaj: petalformaj hufosignoj de bovoj kaj kaproj, kaj duonrondaj hufosignoj de muloj, ĉevaloj kaj azenoj. La fekaĵoj de ĉevaloj, muloj kaj azenoj similis sekiĝintajn pomojn, la bovaj merdoj ŝajnis maldikaj patkukoj boritaj de vermoj, kaj la kapraj fekaĵoj estis similaj al disĵetitaj nigraj faboj. Patro ofte iris sur tiu ĉi vojo. Poste, kiam li vivis iele-trapele, laborante en japana bakforno por lignokarboj, antaŭ liaj okuloj ofte aperis tiu ĉi vojo. Li ne sciis, kiom da amaventuroj mia avino prezentis sur tiu ĉi vojo, sed mi scias. Ankaŭ li ne sciis, ke mia avino iam kuŝigis sian glatan korpon blankan kiel jado sur la nigra tero sub la ombro de sorgoplantoj, sed mi scias.

Post ilia eniro en la sorgokampojn, la nebulo fariĝis ankoraŭ pli densa, masiva kaj nefluema. Kiam la homaj korpoj kaj aĵoj de ili portitaj kunfrapiĝis kun sorgotigoj, pezaj akvogutejoj susure falis en akompano de klaka grumblado de sorgotigoj. La akvogutoj estis friske malvarmaj kaj bongustaj. Kiam Patro klinis sian vizaĝon malantaŭen, granda akvoguto plonĝis precize en lian buŝon. Li vidis, ke en leĝeraj nebulbuloj skuiĝas la pezaj kapoj de sorgoplantoj. La duraj kaj flekseblaj folioj segis liajn veston kaj vangojn. La venteto produktita pro skuado de sorgoplantoj blovetis de tempo al tempo. La sonoj de fluado de Inko-rivero aŭdiĝis pli kaj pli laŭte.

Patro naĝis en la rivero kaj li ŝajnis bona naĝanto denaske. Mia avino diris, ke, kiam li vidas riveron, li pli ekscitiĝas ol kiam li vidas sian propran patrinon. Kiam li estis kvinjara, li povis subakviĝi kiel anasido, kun rozruĝaj sidvangoj turnitaj al la ĉielo kaj piedoj alte levitaj. Li konis, ke la ŝlimo sur la fundo de la rivero estas glacee nigra kaj tiel mola kiel graso. Sur la humida flusejo kreskas densaj grizverdaj fragmitoj kaj helflav-verdaj plantagoj, ankoraŭ videblas lianoj rampantaj sur la tero kaj rigide starantaj herboj. Kaj la ŝlimo sur la flusejo plenplenas de spuroj de delikataj piedoj de kraboj. Leviĝas aŭtuna vento kaj malvarmiĝas la vetero. Aroj da sovaĝaj anseroj flugas suden, jen krucoforme jen V-forme. Kiam sorgospikoj ruĝiĝas, opoj da kraboj grandaj kiel ĉevalhufoj krablas sur la bordon dumnokte por serĉi nutraĵojn en herbotufoj. Kraboj ŝatas manĝi freŝajn bovfekaĵojn kaj putriĝintajn kadavrojn de animaloj.

Aŭskultante al fluado de la rivero, Patro ekpensis pri la aŭtuna nokto dum sia infaneco, kiam li kaj Avo Arhato, maljuna dungito de mia familio, kaptis krabojn sur la riverbordo. Dum tiu nokto pendis vualo griz-purpura kiel vinberoj kaj ora brizo blovis tra la rivero. La safir-blua ĉielo estis profunda kaj senlima, kaj verdaj steloj aspektis ekstreme brile: la ĉerpila stelo de la Granda Ursino, kiu regas morton, la korba stelo de la Suda Ĉerpilo, kiu estas mastranto de la vivo, Oktanto, la okangula puto, al kiu mankas unu briko, la stelo anksia Bovknabo (Altairo) volas pendigi sin, la stelo afliktita Teksistino (Vego) volas sin ĵeti en riveron.... avo Arhato laboris en nia familio kelkdek jarojn, respondecante pri ĉiuj laboroj de la vinfarejo. Patro sekvis lin tien kaj alien kiel lia

ombro, kvazaŭ sian propran avon.

La koro de Patro, konfuzita de densa nebulo, estis prilumita de lampo garnita per kvar vitropecoj, el kiu kerosena fumo elŝoviĝis el la truoj sur la kovrilo de la lampo. La lamplumo estis tiel febla, ke ĝi povis prilumi nur kvin-ses-metran ĉirkaŭaĵon en mallumo. Kiam la riverakvo fluis en la lumrondon de la lampo, ĝi flaviĝis aminde kiel tromatura abrikoto, sed tia amindeco daŭris nur momenton kaj la akvo forfluis. La rivero en mallumo spegulis la stelojn sur la tuta ĉielo. Kun larĝa pluvmantelo el pajloj sur la ŝultroj Patro kaj avo Arhato, sidante ĉe la lampo, aŭskultis plorecan murmuradon, tre mallaŭtan murmuradon de la rivero. Ambaŭflanke de la rivero aŭdiĝis de tempo al tempo ĝoja hurlado de vulpo en seksardo en senlimaj sorgokampoj. Kraboj inklinemaj al lamplumo krablis por kolektiĝi ĉirkaŭ la lampo. Patro kaj avo Arhato kviete sidis, respektplene aŭskultante al sekretaj vortoj inter la ĉielo kaj la tero. La stinkaodoro el la ŝlimo ĉe la rivera fundo ilin atakis jen kaj jen. Aroj kaj aroj da kraboj alvenis de ĉirkaŭe kaj formis senpaciencajn cirklojn. Patro volis tuj agi pro maltrankvileco, sed avo Arhato mane premis lian ŝultron.

“Ne urĝu!” diris la avo. “Senpaciencaĵoj neniam povas manĝi varmegan kaĉon ĝissate.”

Patro ne moviĝis, forte retenante sian ekscitiĝon. Kiam kraboj krablis en la lumrondon kaj haltis kap-al-voste, kovrante la tutan terpecon. Helverdaj karapacoj briletis kaj paroj da cilindrecaj okuloj elŝoviĝis el okulkavoj. La buŝoj kaŝitaj sub oblikvaj vizaĝoj eligis multekolorajn veziketojn por defii kaptantojn. La pajloj de la pluvmantelo de Patro hirtiĝis.

“Ek!” ordonis Avo Arhato.

Ĉe tio Patro tuj saltis kaj sin ĵetis tien kune kun avo Arhato. Ili kaptis po du angulojn de reto kun densaj maŝoj, jam sternita sur la tero antaŭe. Ili levis la tutan reton da kraboj disde la flusejo. Post kiam ili kunligis la angulojn de la reto kaj ĵetis ĝin flanken, ili levis alian reton same rapide kaj lerte. Ĉiu reto estis tiel pezega, ke ĝi ŝajnis enteni kelkcent, eĉ kelkmil krabojn.

Irinte en sorgokampon kune kun la trupo, Patro krablis kiel krabo kaj liaj piedoj ne elektis malplenajn lokojn, tiel ke li karambole puŝis sorgoplantojn dekstren aŭ maldekstren. Neniel deŝirinte sian manon de la basko de Komandanto Yu, li marŝis antaŭen duone per si mem kaj duone trenate de la komandanto. Lin ekatakis dormemo. Li trovis sian kolon rigida kaj okulojn malviglaj. Li pensis, ke kiam li iras kune kun avo Arhato al Inko-rivero, ili neniam revenas kun malplenaj manoj. Li manĝis tro da kraboj kaj enuiĝis de ili, ankaŭ la samo okazis al Avino. Kvankam ili ne plu ekhavis apetiton al kraboj, ili ne volontis ilin forĵeti. Avo Arhato dispecigis la restantajn krabojn per akra tranĉilo, muelis ilin, aldonis salon, enmetis ilin en vazon kaj elfaris kraban saŭcon, tiel ke ili povis manĝi tra la tuta jaro. Tio, kion ili ne povis finmanĝi, ranciĝis, kaj ili nutris papavojn per ĝi. Mi aŭdis, ke Avino iam fumis opion, sed ne kovis inklinemon al ĝi. Pro tio ŝi ĉiam aspektis sana kaj vigla kun vizaĝo ruĝeta kiel persikfloro. La floroj de papavoj, nutritaj per kraba saŭco, estis grase grandaj, mikskoloraj je rozruĝo, ruĝo kaj blanko, kaj naztikle aromaj. La nigra grundo de la hejmloko estas tre fekunda, tial tieaj produktaĵoj abundas kaj popolanoj havas bonkvalitajn korpon kaj animon, kiujn mi ankaŭ posedas. Inko-rivero riĉas je blankaj angiloj tiel grasaj kiel viandaj kolbasoj, kun nura spinosto de kapo ĝis vosto, kaj ili estas tiel stultaj, ke ili englutas hokon je ekvido de logaĵo sur ĝi.

Avo Arhato, kiun Patro karesis en sia memoro, jam mortis pasintjare sur Jiaozhou-Pingdu-ŝoseo. Lia kadavro estis distranĉita en pecetojn, kiuj ĵetiĝis dise en malordo. Lia torso estis senhaŭtigita kaj la karno tremetis kaj saltetis, kiel ĵus senhaŭtigita rano. Je ekpenso pri la kadavro de avo Arhato, Patro eksentis froston tra la spino. Li ankoraŭ memoris, ke iun nokton

antaŭ ĉirkaŭ sep aŭ ok jaroj Avino ebriiĝis, kaj ŝi, kun la dorso apogita al pajlostako en la korto de la vinfarejo de nia familio, ĉirkaŭprenas la ŝultrojn de avo Arhato, murmurante: “Oĉjo... ne foriru. Se ne por bonzo, restu por la Budho. Se ne por fiŝo, restu por la akvo. Se ne por mi, restu por la juna Douguan. Se vi volas min... mi promesas... Vi traktas min, kiel mia patro.”

En la memoro de Patro, avo Arhato puŝis Avinon flanken kaj ŝancele iris en la stalon aldoni fojnon por muloj. Tiam nia familio bredis du grandajn nigrajn mulojn kaj funkciigis vinfarejon. Nia familio povis esti kalkulata kiel la plej riĉa familio en la vilaĝo. Avo Arhato ne foriris, respondecante kiel gvidanto pri mastrado super nia familio, ĝis japanoj fortiris tiujn du grandajn nigrajn mulojn al la konstruejo de Jiaozhou-Pingdu-ŝoseo por servuti.

Ĝuste tiam alŝvebis treniĝa iaado de mulo el la vilaĝo malproksimiĝanta malantaŭ Patro kaj la trupo. Vigliĝinte, Patro malfermis la okulojn, sed li nur vidis la duonfandiĝantan kaj diafanan nebulon. Kaŝite malantaŭ la nebula vualo staris malklaraj senfinaj spaliroj da altaj kaj fortikaj sorgoplantoj, tra kiuj oni marŝis unu post alia kaj ne povis vidi ilian finon. Kiel longe ili jam eniris la sorgokampojn, Patro jam forgesis. Lia penso longe alkroĉiĝis al flubruanta fekunda rivero en malproksimo kaj al la rememoroj pri longe forpasintaj paseoj. Li eĉ ne komprenis, kial ili hasteme kaj kunpuŝiĝante sin ŝovis en la sonĝecan maron de sorgokampoj. Li misorientiĝis. Antaŭ du jaroj li erarvagis en sorgokampoj kaj fine elvenis, juĝante laŭ la brua fluado de la rivero. Nun li denove sin turnis al indiko de la rivera fluado kaj tuj komprenis, ke la trupo marŝas al la sudo flanka de la oriento — la direkto al la rivero. Kiam li certiĝis pri la direkto, li konsciis, ke ili iras embuski japanojn kaj mortigos ilin kiel hundojn. Li sciis, ke ili baldaŭ atingos Jiaozhou-Pingdu-ŝoseon, kiu kuras trae de la sudo al la nordo kaj duonigas la malaltan ebenaĵon, kunligantan Jiaoxian-urbeton kaj Pingdu-urbeton. Tiun ĉi ŝoseon japanoj kaj iliaj lakeoj devigis la lokanojn konstrui sub vipado kaj bajonetoj.

La tumulto skuiĝo de sorgoplantoj intensiĝis pro oniaj laceco kaj dormemo. Rosoj senĉese falis kaj malsekigis iliajn kaphaŭton kaj kolon. Wang Wenyi tusadis de tempo al tempo, sed li ne povis regi sin, kvankam li estis insultita de Komandanto Yu. Patro sentis, ke ili baldaŭ atingos la ŝoseon. Ĝia helflava konturo svingiĝis antaŭ liaj okuloj. Nerimarkite eĉ malplenaj truoj aperis en la kunfandiĝinta vasto de nebulo. La sorgospikoj tramalsekigitaj de rosoj ĉagreniĝe gapis al Patro tra tiuj nebulaj truoj, kaj li ankaŭ pie rigardis al ili. Lia rigardado subite komprenigis lin, ke ili ankaŭ estas vivestaĵoj. Ili radikiĝas en nigra grundo, ricevas flegadon de la suno kaj la luno, kaj nutradon de pluvo kaj rosoj, kaj konas ĉion inter la ĉielo kaj la tero. Laŭ la koloro de la sorgoplantoj Patro divenis, ke la horizonton ŝirmitan de sorgoplantoj la suno jam bruligis kompatinde skarlata.

Subite io okazis neatendite. Unue Patro aŭdis akran sibladon kaj poste klakan sonon de kreviĝo antaŭe. Komandanto Yu laŭte jelpis: “Kiu pafis? Kiu diable pafis?”

Patro aŭdis kuglon flugi tra la densa nebulo, penetri inter folioj kaj tigoj de sorgopantoj kaj fine faligis sorgospikon teren. Dum momento ĉiuj retenis sian spiron. La kuglo sibladis trae kaj falis oni ne sciis kien. La aromaodoro de pulvo propagiĝis en nebulon. Wang Wenyi eligis tragikan krimon: “Komandanto... mi ne plu havas kapon... Komandanto... mi ne plu havas kapon...”

Post momenta stuporiĝo la komandanto donis piedbaton al Wang: “Fik al vi! Ĉu vi povus paroli, se sen kapo?”

Forlasinte Patron, la komandanto iris al la fronto de la trupo. Wang ankoraŭ triste hurlis. Patro aliris kaj klare vidis lian groteskan vizaĝon. Sur lia vango fluis io malhele blua. Patro etendis la manon kaj tuŝis ian fluidaĵon gluecan kaj varman. Li flaris stinkan odoron preskaŭ similan al tiu

de la ŝlimo, sed multe pli freŝan ol la ŝlimo en Inko-rivero. Ĝi superodoris la delikatan aromon de mento, kaj dolĉecon kaj amarecon de sorgospikoj. Ĝi vekis ĉe Patro la pli kaj pli alproksimiĝantajn rememorojn, kaj kunligis, kiel surfadenigi bidojn, la ŝlimon de Inko-rivero, la nigran grundon ĉe la radiko de sorgoplanto, la neniam formorteban pasintecon kaj la neniam reteneblan nunon. Kelktempe ĉiuj aĵoj povas elspiri la odoron de la homa sango.

“Oĉjo,” Patro diris, “vi estas vundita, oĉjo.”

“Douguan, ĉu vi nomiĝas Douguan? Vidu, ĉu la kapo de via onklo ankoraŭ troviĝas sur la kolo?”

“Jes, oĉjo, ĝi estas en ordo. Nur via orelo sangas.”

Wang Wenyi palpis sian oreton kaj ekhavis la manon plenan je sango. Li eligis ŝrikon kaj paralizigis: “Komandanto, mi estas vundita! Mi estas vundita, mi estas vundita.”

Komandanto Yu revenis de antaŭe kaj kaŭriĝis. Pinĉante la kolon de Wang, li diris per dampita voĉo: “Ne krii. Se vi krios plue, mi pafmortigos vin!” Wang ne plu kuraĝis krii.

“Kie estas via vundo?” demandis la komandanto.

“Je la orelo...” Wang respondis, plorante.

Eltirinte pecon da blanka tolo el sia zono kaj disŝiris ĝin en du pecojn, la komandanto enmanigis ilin al Wang: “Kovru la vundon unue. Ne eligu voĉon. Sekvu nin. Bandaĝu vian vundon, kiam ni suriros la ŝoseon.” Kaj li alvokis: “Douguan.” Patro respondis kaj la komandanto, tirante lin je la mano, ekiris. Wang sekvis, gruntante.

La ĵusa pafo estis misfarita de la granda Mutulo, kiu, kun erpilo sur la ŝultro, gvidis ĉe la kapo de la trupo. Okazis, ke li stumble falis pro malzorgemo kaj la fusilo sur lia dorso akcidente pafiĝis. Mutulo estis unu el la malnovaj amikoj de Komandanto Yu kaj, kiam ili okupis sin kiel banditoj, ili kune manĝis patkukojn en sorgokampoj. Pro tio, ke unu el liaj kruroj vundiĝis en la ventro de lia patrino, li nun iris lame, sed facilmove. Patro kovis iom da timo kontraŭ li.

La nebulo leviĝinta ĉe aŭroro fine dispeliĝis, kiam la trupo sub la gvido de Komandanto Yu suriris Jiaozhou-Pingdu-ŝoseon. Aŭgusto en mia hejmloko estis ofte frekventata de nebulo, eble kaŭzita pro malalta situo kaj humida grundo. Sur la ŝoseo Patro eksentis sian korpon vigla kaj siajn piedojn facilmovaj. Li forlasis sian manon tirantan la baskon de la komandanto. Wang ŝirmis sian oreton per la blanka tolo, kun plora mieno. La komandanto malzorgeme bandaĝis lian oreton, eĉ envolvis duonon de lia kapo. Wang grimace nudigis siajn dentojn pro doloro.

La komandanto diris: “Kiel la ĉielo favoras vin!”

Wang respondis: “Mia sango jam elĉerpiĝis kaj mi ne povos iri kun vi!”

La komandanto diris: “Merdo! Tio similas nenion alian ol piko de kulo. Ĉu vi jam forgesis viajn tri filojn?”

Mallevente sian kapon, Wang murmuris: “Ne, ne.” Li portis longatuban ĉaspafilon kun sangaruĝa kolbo sur la ŝultro, kaj pendigis platan ladskaton kun pulvo sur la postaĵo.

La restantaj nebululoj jam kuntiriĝis en sorgokampojn. Sur la ŝoseo pavimita per krudaj gruzoj videblis nek la hufospuroj de bovoj kaj ĉevaloj nek piedsignoj de homoj. Kontraste kun pompantaj sorgoplantoj ĉe ambaŭ flankoj, la ŝoseo aspektis dezerteca kaj forlasita, impresante omene. Patro jam frue sciis, ke Komandanto Yu gvidas la trupon de malpli ol kvardek homoj, eĉ inkludante lamulon kaj mutulon. Sed kiam tiuj trupanoj loĝis en la vilaĝo, ili levis rumoron kaj ĵetis la tutan vilaĝon en malordon, kaj pro tiu tumulto eĉ kokoj flugis kaj hundoj saltis maltrankvile, kvazaŭ nur soldatoj troviĝus en la vilaĝo. Dume, kiam la trupo iris sur la granda vojo, pli ol tridek homoj ŝajnis ŝrumpinta maso, kiel serpento rigida de frosto. Ili havis

diversspecajn armilojn: forĝita kanono, birdĉasaj pafiloj, malnovaj fusiloj fabrikitaj en Hanyang kaj pafilego, kiu povis pafi pesilojn, ŝultroportita de du fratoj, Fang la Sesa kaj Fang la Sepa. Kaj Mutulo portis sur la ŝultro oblongan erpilon kun dudek ses feraj dentoj, uzatan por ebenigi la teron. Aliaj tri trupanoj ankaŭ ŝultroportis po unu tia erpilo. Tiam Patro ankoraŭ ne sciis, kio estas embusko, kaj des malpli, kial oni devis kunporti kvar ferajn erpilojn por la embusko.



## 2.

Por verki la historieton de nia familio mi reiris al la Nordorienta Vilaĝo de Gaomi kaj faris amason da enketoj. La ĉefa enhavo de enketado temis pri la fama batalo, en kiu Patro partoprenis kaj oni pafmortigis japanan generalmajoron ĉe Inko-rivero.

Maljunulino naŭdek-du-jara laŭde kantis al mi: *“Miloj da homoj el la Nordorienta Vilaĝo, ĉe Inko-rivero batalpretis. Komandanto Yu staris ĉe la fronto, kanonoj sonis je lia ordono. Japanaj diabloj falis en panikon, trafis morton unu post alia. Bela heroino Dai Fenglian, aplikis ruzeme artifikon, lerte aranĝis ferajn erpilojn, por bari antaŭeniron de japanoj...”* La verto de la maljunulino estis tute kalva kiel glazurita poto, ŝia fizionomio estis sulkoplana kaj vejnoj sur ŝiaj malgrasaj manoj elstaris kiel fibraj vaskuloj de lufo. Estis hazarde, ke ŝi postvivis la masakron de la Aŭtunmeza Festo en 1939, ĉar ŝi tiam ne iris pro ulceriĝo en kruro kaj ŝia edzo kaŝis ŝin en la kelon de batatoj. Dai Fenglian, kiun la maljunulino prikantis, estis la nomo de mia avino. Aŭdintion, mi estis ekster mi de ekscito. Tio indikas, ke la artificio bari la antaŭeniron de la japana militaŭtovico estis elpensita eĉ de inoj kia mia avino. Ŝi devas esti kalkulita kiel pioniro en kontraŭjapana rezistmilto, kaj nacia heroino.

Je mencio de mia avino la maljunulino fariĝis babilema, sed ŝiaj vortoj aŭdiĝis hakataj kaj senkoheraj, kiel falfolioj dispelataj de vento sur la teron. Laŭ ŝia diro la piedoj de mia avino estis la plej delikate malgrandaj kaj la alkoholaĵo elfarita de nia familio estis tre forta. Kiam la paroltemo turniĝis al Jiaozhou-Pingdu-ŝoseo, ŝia parolo glate koheriĝis: “Kiam la vojo estis konstruata ĝis nia loko... sorgoplantoj jam kreskis alten ĝis la talio... La japanaj diabloj forkaptis tiujn laborpovajn... Ili laboris por japanoj, mallaboreme kaj malvigle... La du nigraj mulegoj de via familio estis ankaŭ fortrenitaj... Japanoj konstruis ŝtonponton sur Inko-rivero... Arhato, maljuna dungito de via familio... havis ian kaŝitan rilaton kun via avino, tion oni pribabilis... Hoho, via avino havis multajn amaferojn dum sia juneco. Via patro estis tre kapabla kaj li mortigis homon unuafoje je la aĝo de dek kvin jaroj. Naŭ el dek bastardaj idoj kondukas malbone... Arhato iris tranĉi la krurojn de mulo... Li estis kaptita kaj senhaŭtigita per tranĉilo... Japanoj faris malbonojn, fekis en kaldronon kaj pisis en lavpelvon. Tiujare kiam mi iris ĉerpi akvon, divenu, kion mi elĉerpis. Unu kapo, kun longaj harplektaĵoj...”

Avo Arhato Liu estas unu el la gravaj figuroj en la historieto de nia familio. Ĉu li havis ian kaŝitan amrilaton kun mia avino, mi jam ne povas akiri veran pruvon pri tio. Por diri honeste, mi ne volus konfesi, ke tio estas fakto. Kvankam mi tenas min racia, tio, kion la maljunulino kun kalva kapo diris, tamen ĵetis min en embarason. Mi pensas, ke, ĉar avo Arhato traktis mian patron kiel sian propran nepon, li do estas rigardata kiel mia praaavo. Se tiu mia praaavo havis eĉ amaferon kun mia avino, ĉu tio ne estas opiniata kiel incesto? Fakte tio estas nur absurda elpenaĵo, ĉar mia avino ne estis bofilino de avo Arhato, sed lia mastrino, kaj li havis nur ekonomian rilaton kun nia familio, sed ne sangan rilaton. Li, kiel fidela intendanto, ne nur beligis la historieton de nia familio, sed ankaŭ sendube aldonis gloron al ĝi. Ĉu mia avino nutris korinklinon al li kaj ĉu li kuŝis kun mia avino en ties terlito, tio havas nenian rilaton kun moralo. Eĉ se ili enamiĝis unu al la alia, kiom tio gravas? Mi tute kredas, ke mia avino kuraĝis fari ĉion, kion ŝi volis. Ŝi estis ne nur

heroino de rezistmilito kontraŭ Japanio, sed ankaŭ la pioniro de seksa liberiĝo kaj modelo de memstaro por virinoj.

En la libro pri historiaj registroj de la loko, mi trovis, ke en 1938, la dudeksepa jaro de la Ĉina Respubliko, sume kvardek mil homfojoj el Gaomi, Pingdu kaj Jiaoxian estis kaptitaj de la japanaj trupoj kiel laborantoj por konstrui Jiaozhou-Pingdu-ŝoseon. Nekalkulebaj grenplantoj estis difektitaj, kaj la ĉevaloj kaj muloj el la vilaĝoj ambaŭflanke de la ŝoseo tute forrabitaj. Kampulo Arhato Liu enŝteliĝis kaj hakvundis per ŝpato sennombrajn hufojn kaj krurojn de la muloj kaj ĉevaloj, kaj pro tio li estis arestita. La sekvan tagon la japanaj soldatoj ligis lin al fosto kaj senhaŭtigis lin kaj tranĉis lian korpon en publiko. Kun sentima mieno li senĉese insultadis ĝis la morto.

### 3.

Ŝi rakontis la veron. Kiam la peco de Jiaozhou-Pingdu-ŝoseo konstruiĝis ĉe nia vilaĝo, sorgoplantoj en kampoj altis nur ĝis la homa talio. Sur la malalta ebenaĵo longa je sepdek lioj kaj larĝa je sesdek lioj ondadis nur verdaj sorgoplantoj krom dislokitaj kelkdekaj vilaĝoj, du riveroj fluantaj laŭlonge kaj laŭlarĝe, kaj kelkdek serpentumantaj kotaj vojetoj inter kampoj. La blanka ĉevalforma rokego sur Blankaĉevala Monto norde de la ebenaĵo klare videblis de la fino de nia vilaĝo. Kiam kampuloj, kiuj sarkis sorgokampojn, povis vidi la Blankan Ĉevalon je kapolevo kaj la nigran grundon je kapoklino. Kun ŝvito falanta teren, ili eksentis grandan doloron en koro. Aŭdinte, ke japanoj konstruigos ŝoseon en la ebenaĵo, la vilaĝanoj jam dronis en paniko, atendante la venontan katastrofon.

Post nelonge japanoj vere alvenis.

Kiam japanaj diabloj kaj marionetaj soldatoj venis al nia vilaĝo kapti kampul-laborantojn kaj fortiri mulojn kaj ĉevalojn, Patro ankoraŭ dormis en la lito. Li vekigis de bruado el la vinfarejo. Tirante lin je la mano, Avino trotis per siaj malgrande vinditaj piedetoj pintigitaj kiel bambuŝoso en la korton de la vinfarejo. Tiam en la korto sidis dekkelkaj vazegoj da bonkvalita alkoholaĵo, kies aromo ŝvebis tra la tuta vilaĝo. Du japanaj soldatoj flave vestitaj staris en la korto, tenante fusilon kun bajoneto. Du ĉinoj nigre vestitaj kun pafilo surŝultre estis malligantaj la du grandajn nigrajn mulojn ligitajn al sorparbo. Avo Arhato foje kaj refoje sin ĵetis al la malalta marioneta soldato, kiu malligis bridrimenojn, sed li estis foje kaj refoje repuŝita de la alta marioneta soldato per fusiltubo. Tiam je la komenco de la somero avo Arhato surportis solan veston kaj lia nuda brusto plene kovriĝis per purpurruĝaj rondaj ringoj far fusiltubo.

Avo Arhato diris: “Fratoj, ni konsiliĝu pri tio, ni konsiliĝu pri tio.”

La alta marioneta soldato insultis: “Flanken, vi maljuna bastardo!”

“Tiu estas brutoj de mia mastro. Vi ne povas forkonduki ilin,” petis avo Arhato.

“Se vi bruos plu, mi pafmortigos vin porkaĉon!” minace kriis la soldato.

La japanaj soldatoj, kiel kotaj statuoj, ambaŭmane tenis fusilon antaŭ la brusto.

Tuj kiam Avino kaj Patro eniris la korton, avo Arhato diris: “Ili volas fortiri niajn mulojn.”

“Sinjoro, ni estas bonaj popolanoj,” diris Avino.

La japanaj soldatoj ridetis kun mallarĝigitaj okuloj kontraŭ Avino.

La malalta marioneta soldato malligis mulon kaj plenforte ĝin tiris, sed la mulo, kun alte levita kapo, obstine rifuzis movi sin. La alta marioneta soldato aliris kaj spronis ĝian postajon per fusilo. La mulo kolere kalcitris kaj per siaj brilaj hufferoj ĵetis koton al la tuta vizaĝo de la soldato.

Tirinte kulasriglilon, la alta marioneta soldato direktis sian fusilon al avo Arhato, kriante: “Maljuna bastardo, vi ĝin forkonduku, al la konstruejo!” Avo Arhato kaŭris sur la tero, eligante neniun voĉon.

Kun fusilo en ambaŭ manoj japana soldato svingadis ĝin antaŭ la okuloj de avo Arhato, gruntante “vulivalayalalivu!” Vidinte la svingantan brilan bajoneton, avo Arhato fale sidigis sin sur la teron. La japana soldato antaŭen puŝis la fusilon kaj la akra malsupra klingo de bajoneto tranĉis oscedan vundon sur la glata kaphaŭto de avo Arhato.

Kuntiriĝante de tremo, Avino diris: “Oĉjo, vi, forkonduku ĝin por ili.”

Japana soldato malrapide alproksimiĝis al Avino. Patro vidis, ke la japana soldato estas junulo kun du grandaj gagatnigraj okuloj, kaj kiam li ridas, lia supra lipo turniĝas supren kaj vidigis flavan denton. Avino stumble retropaŝis malantaŭ avon Arhato. La vundo sur la kapo de avo Arhato abunde sangis kaj la tuta kapo kovriĝis per sango. La du japanaj soldatoj ridete alproksimiĝis. Avino premis sian manplaton sur la sangantan kapon de avo Arhato kaj tuj ŝmiris dufoje sian vizaĝon per sia manplato. Kaj distaŭzinte sian harojn, ŝi larĝe malfermis la buŝon kaj frenezule saltetadis. La japanaj soldatoj surprizite haltis antaŭ ŝia monstra mieno.

“Via moŝto,” la malalta marioneta soldato diris, “tiu ĉi virino jam freneziĝis.”

Grumblante, japana soldato pafis super ŝia kapo. Ŝi sidiĝis sur la teron kaj laŭtvoĉe ekploris.

La alta marioneta soldato per fusilo devigis avon Arhato stariĝi. Tiu deprenis la bridrimenon de la malalta marioneta soldato. La muloj, kun kapo alte levita kaj tremantaj kruroj, sekvis lin ekster la korton. Sur la strateto trotis muloj, ĉevaloj, bovoj kaj kaproj en malorda amaso.

Avino ne freneziĝis. Apenaŭ japanaj kaj marionetaj soldatoj eliris el la korto, ŝi forlevis la lignan kovrilon de vazego kaj vidis sian terurigan sangomakulitan vizaĝon sur la speguleca sorgo-alkoholaĵo. Patro rimarkis, ke larmoj fluas sur ŝiaj vangoj kaj tuj ruĝiĝas. Ŝi lavis al si la vizaĝon per alkoholaĵo kaj pro tio ruĝigis la tutan vazegon da alkoholaĵo.

Avo Arhato estis eskortita, kune kun la muloj, al la konstruejo. En sorgokampoj jam aperis vojpeco preskaŭ pretigita. La ŝoseo sude de Inko-rivero jam estis finkonstruita kaj ĉaroj, grandaj kaj malgrandaj, alsvarmis sur la ŝoseon kaj malŝarĝis ŝtonojn kaj flavan sablon sur la sudan bordon. Super la rivero troviĝis nur ligna ponteto kaj japanoj intencis konstrui grandan ŝtonponton. Ambaŭflanke de la ŝoseo sorgoplantojn de du vastaj spacoj oni jam perpiede premis sur la teron, sur kiu verda tapiŝo kvazaŭ sterniĝis. Ambaŭflanke de vojbaso ĵus formigita en sorgokampoj sur la norda bordo kelkdek muloj kaj ĉevaloj tiris ŝtonan draŝrulilon por ebenigi, en la maro de sorgoplantoj, du vastajn terspacojn per detruado de sorgokampoj tuj tuŝantaj la konstruejon. Oni kondukis mulojn kaj ĉevalojn kaj paŝis tien kaj reen en sorgokampoj. La freŝaj kaj junverdaj sorgoplantoj rompiĝis kaj falis sub la hufferoj, kaj ade subpremiĝis de draŝruloj kun kaneloj kaj terruliloj sen kaneloj. Diverskoloraj ruliloj ĉiuj fariĝis malhele verdaj, malsekigitaj de la suko de sorgoplantoj. Fortaodoro de verdaj plantoj regis en la konstruejo.

Avo Arhato estis pelita al la suda bordo por transporti ŝtonojn al la norda bordo. Li tre malvolonte enmanigis la bridrimenojn de muloj al maljunulo kun okula malsano. La ligna ponto estis tre ŝanceliĝema, kvazaŭ preta disfali je ĉiu momento. Transpasinte la ponton, avo Arhato starigis sin sur la suda bordo. Ĉino aspektanta kiel laborestro malpeze pikis lian kapon per la purpuruĝa rotanga vipo en sia mano kaj diris: “Iru porti ŝtonojn al la norda bordo.” Avo Arhato ekviŝis siajn okulojn — la sango fluanta el la kapo jam malsekigis liajn brovojn. Portante pli-malpli grandan ŝtonon, li iris de la suda bordo al la norda. La maljunulo, kiu prenis la bridrimenojn de li, ankoraŭ restis tie. Avo Arhato alparolis lin: “Uzu tiujn mulojn zorgeme. Ili apartenas al mia mastro.”

Kun la kapo klinita la maljunulo letargie kondukis la mulojn en la vicaron de muloj kaj ĉevaloj, kiu elhakis vojon tra sorgokampoj. La glacea postaĵo de la nigraj muloj rebrilis de la suno tie kaj tie. Kun ankoraŭ sanganta kapo avo Arhato kaŭriĝis kaj ŝmiris sian vundon per manpleno da nigra grundo. La obtuza doloro de la kapo iris ĝis liaj dek piedfingroj. Li sentis, kvazaŭ lia kapo krevus en du pecojn.

Ĉe la rando de la konstruejo sporade staris japanaj kaj marionetaj soldatoj kun pafilo en la

mano. La vokto, kun rotanga vipo en mano, fantome vagadis tien kaj ĉi tien sur la konstruejo. Je ekvido de la sangomakulita kapo de avo Arhato, kiu iradis tien kaj reen, la aliaj laborantoj ruladis siajn okulojn pro konsterno. Levinte ŝtonon kaj farinte kelkajn paŝojn, avo Arhato aŭdis venteton sibli malantaŭ li kaj tuj poste sentis longan brulan doloron sur la dorso. Li forjetis la ŝtonon kaj vidis la vokton ridetanta kontraŭ li.

“Via moŝto, se vi volas diri ion al mi, do diru,” avo Arhato diris, “Kial vi batis min senkaŭze?”

Anstataŭ respondi, la vokto ridete svingis la vipon kaj vipbatis lian talion. Avo Arhato sentis, ke tiu ĉi vipbato preskaŭ rompus lin en du pecojn, kaj du varmaj larmofluoj svarmis al liaj okulokavoj. Sango sin ĵetis al lia kapo, kaj kune kun cikatro koaguliĝinta per sango kaj grundo, tumulte dancadis, kvazaŭ ĝi eksplode splitiĝus.

Li ekkriis: “Via moŝto!”

La vokto donis al li alian vipbaton.

“Pro kio vi vapis min, via moŝto?” demandis avo Arhato.

Skuante la vipon en la mano, la vokta moŝto diris kun larĝa rideto: “Mi donas al vi guston, vi ido de hundino.”

Avo Arhato englutis koleron, kun larmovualitaj okuloj. Li levis ŝtonegon el ŝtonamaso kaj ŝanceliĝis al la ponteto. Li sentis, ke lia kapo ŝvelas kaj blanka vasto sin prezentas antaŭ liaj okuloj. La akraj kaj malmolaj eĝoj de ŝtono pike premis liajn ventron kaj ripojn, sed li sentis nenian doloron.

La vokto staris senmove, kun rotanga vipo plantita sur la tero. Portante ŝtonon, avo Arhato timoplene lin preteriris. La vokto donis alian vipbaton al lia kolo. Avo Arhato antaŭen falis sur genuojn, kun ŝtono en brakumo. Liaj manoj estis bate lezitaĵoj de la ŝtono kaj lia mentono frapiĝis kontraŭ la ŝtono ĝis sangado. Pro la bato li tute konfuziĝis kaj infane ekploris senmotive. Ĉe tiu momento purpurruĝa flamo malrapide eklumiĝis en lia malplena cerbo.

Li penis eltiri sian manon el sub la ŝtono kaj stariĝinte, arkigis sian korpon, kvazaŭ maljuna malgrasa kato, kiu volis ŝpruci sian koleron.

Mezaĝulo ĉirkaŭ kvardek-jara, kun larĝa rideto, aliris al la vokto. Elpoŝiginte paketon da cigaredoj, li eltiris unu kaj respektoplene alproksimigis ĝin al la lipoj de la vokto. Tiu buŝprenis la cigaredon kaj atendis lin bruligi ĝin.

“Via moŝto,” diris la mezaĝulo, “estas malinde koleri kontraŭ tiu maljuna ŝtupo.”

La vokto elspiris fumon tra la nazo sen diri eĉ unu vorton. Avo Arhato vidis, ke liaj fumbruniĝitaj fingroj de la mano tenanta la vipon urĝe tordiĝas.

La mezaĝulo metis la paketon en la poŝon de la vokto, kiu ŝajne tute ne rimarkis tion. Eliginte “hm” mallaŭte, li permane alpremis sian poŝon, sin turnis kaj foriris.

“Maljuna frato, ĉu vi estas novevenanto?” demandis la mezaĝulo.

Avo Arhato kapjesis.

“Vi ne donis ion al li kiel donacon, ĉu?”

Avo Arhato diris: “Tiuj senraciaj hundoj! Ili trenis min ĉi tien.”

“Donu al li iom da mono,” la mezaĝulo konsilis, “eĉ paketo da cigaredoj sufiĉas. Ili vipas nek la laboremajn nek mallaboremajn, sed nur tiujn, kiuj havas okulojn, sed ne vidas.” Post tio li fiere iris inter laborantojn.

La tutan antaŭtagmezon, kvazaŭ perdinte sian animon, avo Arhato plenforte transportis ŝtonojn. La sanga cikatro sur lia verto bakita de la suno seke doloris al li. Kaj liaj manoj fariĝis malpure makulitaj de sango. Pro vundiĝo de lia mentona osto salivo senĉese elfluis el lia buŝo. Tiu

purpurruĝa flamo brulis jen forte jen malforte en lia menso, konstante sen estingiĝi.

Tagmeze bruna kamiono tange alveturis el la antaŭa vojo, kiu estis ebenigita apenaŭ sufiĉe por trafiko. Li trance aŭdis akutan sonon de fajfilo kaj vidis elĉerpitajn laborantojn ŝancele iri al la kamiono. Sidante sur la tero, li pensis pri nenio kaj ne volis scii, kion signifas la alveno de la kamiono. Nur la purpurruĝa flamo arde saltetis kaj sin ĵetis al liaj oreloj ĝis ili zumadis.

La mezaĝulo aliris kaj ektirinte lin, diris: “Maljuna frato, ni iru. Tempas tagmanĝi. Ni iru gustumi la japanan rizon!”

Avo Arhato stariĝis kaj sekvis lin.

Oni malŝarĝis el la kamiono kelkajn tinegojn da neĝblanka rizo kaj korbegon entenantan emajlajn bovlojn kun blua desegnaĵo sur blanka fono. Ĉe tinego staris malgrasa ĉino kun bronza kulerego en mano kaj ĉe la korbego alia grasa ĉino kun stako da bovloj ambaŭmane tenataj. Kiam iu alvenis, li donis al li bovlon kaj samtempe metis rizon en ĝin per la kulerego. Ĉirkaŭ la kamiono oni prenis per mano la manĝaĵon kaj lupe manĝegis, ĉar mankis manĝbastonetoj.

La vokto denove aliris, kun rotanga vipo en la mano kaj malvarma rideto sur la vizaĝo. La flamo en la cerbo de avo Arhato tuj vigle bruliĝis, klare prilumante jam perdiĝintan rememoron. Li ekpensis pri la koŝmareska okazintaĵo dum la antaŭa duontago. Ankaŭ tiuj japanaj kaj marionetaj soldatoj, kiuj gardostaris, kolektiĝis kaj prenis manĝon ĉirkaŭ tinego el lado. Lufundo kun pintaj oreloj kaj longa vizaĝo sidis malantaŭ la tinego kaj langopende gvatis la ĉi-tieajn laborantojn.

Avo Arhato kalkulis dekelkajn japanajn diablidojn kaj dekelkajn marionetajn soldatojn, kiuj manĝis ĉirkaŭ la tinego, kaj li tuj naskis la ideon eskapi. Eskapi! Se mi nur min ŝovos inter sorgoplantojn, tiuj hundidoj ne sukcesos kapti min. Liaj piedoj fariĝis varmaj kaj ŝvitis. Ekde kiam li ekhavis la ideon eskapi, li sin tenis maltrankvila kaj anksia. Io kaŝiĝis malantaŭ la ridetanta vizaĝo de la vokto kun rotanga vipo en mano. Je ekvido de lia rideto, avo Arhato tuj ekhavis konfuzitan menson.

Antaŭ ol la laborantoj satmanĝis, la grasa ĉino jam reprenis la emajlajn bovlojn. La laborantoj lekis siajn lipojn kaj avide fiksrigardis la restantajn rizgrajnojn en tiuj kelkaj malplenaj tinegoj, sed neniu kuraĝis antaŭeniri. Sur la norda bordo aŭdiĝis raŭka henado de mulo. Avo Arhato rekonis laŭ kriadon la mulon de nia familio. Sur tiu nove elhakita malplena spaco muloj kaj ĉevaloj estis alligitaj al draŝruliloj aŭ terpremiloj. Ili malvigle prenis kiel manĝaĵon ĉifitajn kaj subpremitajn tigojn kaj foliojn el la dise falintaj kadavroj de sorgoplantoj.

Posttagmeze junulo iom pli ol dudekjara, profitante malatentemon de la vokto, fluge sin ŝovis inter sorgoplantojn, sed kuglo kuratingis lin. Li surventre kuŝis senmove ĉe la rando de sorgokampo.

Ĉe sunsubiro la bruna kamiono denove alveturis. Avo Arhato finmanĝis sian porcion da rizo. Kvankam lia stomako, kiu jam kutimis al manĝaĵo el sorgo, obstine rezistis kontraŭ blankaj rizgrajnoj kun ŝimaodoro, li tamen englutis ĝin, retenante la spasmojn de la gorĝo. La ideo pri eskapo pli kaj pli intensiĝis. Li sopiris al la vilaĝo malproksima dekelkajn liojn kaj la korto, kie ŝvebis la bonodoro de alkoholaĵo kaj kie li povis elmontri siajn kapablojn. Pro alveno de japanoj la dungitoj de la vinfarejo ĉiuj fuĝis kaj la varmaj kaldronoj por distili alkoholaĵon ankaŭ malvarmiĝis. Li des pli sopiris al mia avino kaj Patro. La varmo, kiun mia avino donis al li ĉe la stako de sorgopajloj, restis neforgesebla dum lia tuta vivo.

Post vespermanĝo laborantoj estis pelitaj en spacon ĉirkaŭfermitan per abiaj palisoj, kovritaj per kelkaj gudrotukoj. La palisoj estis kunligitaj per ferfadenoj dikaj kiel sojfaboj. La pordo de la

ĉirkaŭpalisaro estis elfarita el kunvelditaj dikaj stangoj el fero. Japanaj kaj marionetaj soldatoj dormis respektive en du tendoj, proksime kelkdek paŝojn de la ĉirkaŭfermita spaco. La luphundo estis alligita ĉe la pordo de la tendo por japanoj. Ĉe la pordo de la ĉirkaŭfermita spaco staris alta stango, sur kiu pendis du lanternoj. Japanaj kaj marionetaj soldatoj alterne vagadis kiel gardostarantoj. Muloj kaj ĉevaloj estis kolektigitaj sur la ruino de sorgoplantoj, kie ili alligiĝis al kelkdek ligfostoj.

En la ĉirkaŭfermita spaco regis stinka haladzo. Kelkaj ronkadis, aliaj pisis en ladan tinon ĉe la angulo kaj la urino tinte tamburis sur la tina vando. La malhela lumo de la lanterno penetris inter la palisojn kaj la longaj ombroj de vagantaj sentineloj skuigadis en lumrondo de tempo al tempo.

Profunde en nokto frosta aero atakis homojn en la ĉirkaŭfermitejo. Avo Arhato neniel povis endormiĝi. Li ankoraŭ pensis pri eskapo. La paŝoj de gardostarantoj sonis ĉirkaŭe de la spaco. Kuŝante, li ne kuraĝis moviĝi kaj konfuzkape endormiĝis. En la sonĝo li sentis, ke lia kapo estas pikita per akra glavo kaj li tenas ardantan ferpecon en la mano. Vekiĝinte, li trovis sin malsekigita de ŝvito trakorpe kaj sian pantalonon humidigita de urino. El la malproksima vilaĝo alŝvebis akuta kokeriko. Muloj kaj ĉevaloj stamfis kaj snufis. Tra la truoj de gurdtko videblis kelkaj ruzemaj steloj.

La mezaĝulo, kiu jam donis helpon al avo Arhato dumtage, ŝtele sidiĝis. Kvankam en obskuro, avo Arhato tamen vidis lian paron da okuloj kiel fajrobuloj, kaj eksciis, ke li ne estas ordinara homo. Li observis lian agadon, kuŝante kviete.

La mezaĝulo genuiĝis ĉe la pordo de la ĉirkaŭfermitejo kaj levis siajn brakojn per malrapidaj movoj. Avo Arhato rigardis al liaj dorso kaj misteroplana kapo. La mezaĝulo, kolektinte sian forton, tuj turnis sian korpon flanken kaj kaptis du ferstangojn, kvazaŭ tirante arkon por pafi sagon. Liaj okuloj pafis malhele verdan lumon, kiu kvazaŭ siblis, kiam ĝi frapiĝis kontraŭ aliaj aĵoj. La du ferstangoj sensone disiĝis. Pli da lanternolumo kaj stellumo filtriĝis el la pordo kaj prilumis trivitan ŝuon kun truita pinto oni ne sciis kies. Vaganta sentinelo returniĝis. Avo Arhato vidis, ke malhela figuro flugis ekster la palisaron kaj la japana sentinelo, post krakado, sensone falis sur la teron sub la tenajlsimilaj brakoj de la mezaĝulo. Li levis lian fusilon kaj senbrue malaperis.

Post longa tempo avo Arhato ekkomprenis, kio okazis. La mezaĝulo ja estas tre kapabla heroo. Ĉar li jam elhakis la vojon por li, kial ne eskapi! Avo Arhato sin ŝovis zorgeme el la aperturo. La mortinta japano surdorse kuŝis, kun unu kruro tike moviĝanta.

Rampinte en sorgokampon, li sin rektigis, iris laŭ la sulko por eviti kunfrapiĝon kun sorgoplantoj laŭeble, tiel ke li ne kaŭzis sonojn, kaj fine suriris la digon de Inko-rivero. Kiam la tri steloj de Oriono brilis ĉe la zenito, falis la mallumo antaŭ aŭroro. Surface de Inko-rivero speguliĝis brilantaj steloj. Singene starante sur la digo, avo Arhato sentis ĝisostan froston. Liaj dentoj senĉese kunbatiĝis, la doloro de la mentono disiris al la vangoj kaj oreloj kaj kuniĝis kun la atakoj de pusanta doloro sur la kapo. La libera kaj malvarma aero miksitita kun odoro de sorgoplanta suko penetris en liajn naztruojn, pulmon, stomakon kaj intestojn. En nebulo brilis tiuj du lanternoj kiel vaglumoj. La spaco ĉirkaŭfermitaj per abiaj palisaroj sin montris malluma, aspektante kiel enorma tombo. Li apenaŭ kredis, ke li sukcesis eskapi tiel facile. Liaj piedoj kondukis lin sur la kadukan ponteton, sub kiu fiŝoj saltetis el akvo kaj fluo glugle kuris. Tiam falstelo fulme tranĉis la ĉielon. Ŝajnis, ke nenio okazis. Povus esti, ke li eskapis al la vilaĝo, sin kaŝis, flegis sian vundon kaj daŭrigis sian vivon. Sed, kiam li paŝadis sur la ponto, li aŭdis maltrankvilan kaj raŭkan henadon de mulo sur la suda bordo. Por la muloj de Avino li reiris kaj

pro tio li prezentis grandiozan kaj tragikan dramon.

La muloj kaj ĉevaloj estis alligitaj al kelkdek fostoj nemalproksimaj de la ĉirkaŭfermitejo. Sur la tero elspiriĝis haladzo de urino kaj fekaĵo. Ĉevaloj snufis kaj muloj ĉirkaŭmordetis lignajn fostojn, ĉevaloj maĉis sorgotigojn kaj muloj lakse fekis. Avo Arhato sturmis per stumblaj paŝoj en la gregon de muloj. Li flaris la intiman odoron de la du grandaj nigraj muloj de nia familio kaj rigardis iliajn konatajn korpojn. Li sin ĵetis antaŭen por liberigi siajn kunulojn en suferado. Tiuj muloj, la senraciaj brutoj, eĉ rapide turnis sian postaĵon kontraŭ li kaj svingis siajn malantaŭajn hufojn. Li murmuris: “Nigraj muloj, nigraj muloj, ni kune eskapu!” La muloj furioze turnis sin dekstren aŭ maldekstren por protekti sian terenon. Ili eĉ ne rekonis sian mastron. Avo Arhato eĉ ne konsciis, ke la freŝa kaj malnova sangodoro, kaj la freŝa kaj malnova cikatroj jam ŝanĝis lin. Li plenis de ĉagreniĝo. Apenaŭ li faris paŝon antaŭen, la mulo donis hufbaton al lia koksosto. La maljunulo elflugis flanken kaj kuŝiĝis teren, kun unu flanko de korpo sensenta. La mulo daŭre kacitris kaj ĝiaj hufteroj brilis kiel lunarko. Li sentis, ke lia koksosto flamiĝas kaj ŝvelas, kvazaŭ peza balasto. Li barakte stariĝis, falis flanken kaj denove barakte stariĝis. Aŭdiĝis alia sekvoĉa kokeriko en la vilaĝo. Mallumo formortis iom post iom kaj la tri steloj de Oriono ankoraŭ pli brilis, prilumante la glaceajn postaĵon kaj okulglobojn de la mulo.

“Kiel belaj brutoj vi ambaŭ estas!”

Avo Arhato krevis de kolero. Li turnis sin jen dekstren jen maldekstren por serĉi armilon kontraŭ ili. Sur la konstruejo de fosado de irigacia kanalo li trovis akran ŝpaton. Li iris senĝene kaj laŭte sakris, tute forgesante pri la homoj kaj luphundo proksimaj cent paŝojn. Li sin trovis libera, ĉar timo estis la kaŭzo de senlibereco. En la oriento la ruĝaĵo malrapide leviĝis kaj samtempe difuzis radiojn. Tuj antaŭ aŭroro la sorgokampoj dronis en tia kvieto, ke ĝi ŝajnis eksplodonta ĉiumomente. Avo Arhato iris sub la matenruĝo al tiuj du grandaj nigraj muloj, kun ĝisosta malamo al ili.

La muloj senmove staris en silento. Li ambaŭmane tenis la ŝpaton horizontale kaj forte hakis per ĝi malantaŭan kruron de nigra mulo. Malvarma ombro falis sur la malantaŭan kruron de la mulo. Ĝi klinis sin dufoje kaj firme tenis sin en stara pozo. Tuj la mulo aŭdigis sovaĝan, konsternan kaj indignan henadon. Tuj poste la vundita mulo alte levis sian pugon kaj ĝia varma sango pluve ŝprucis sur lian tutan vizaĝon. Profitante la okazon, li donis trafan hakon al la alia malantaŭa kruro de la mulo. Kun vea ekkrio la nigra mulo iompostiome faligis sian pugon kaj peze sidiĝis sur la teron. Ĝi ankoraŭ staris per antaŭaj kruroj, kun la kolo pendigita per bridrimeno, kaj kun la buŝo turnita al la griz-bluiĝinta ĉielo. La ŝpato estis subpremita de ĝia peza postaĵo, kaj la avo, kiu jam kaŭriĝis, plenforte eltiris la ŝpaton. Li sentis, ke la ŝpato jam ŝovis sin en la kruroston de la mulo. La alia nigra mulo gapis al la kunulo paraliziĝinta sur la tero kaj plore iais kvazaŭ por peti indulgon.

Li tenis la ŝpaton nivele kaj alpremiĝis al ĝi. Ĝi forte retiriĝis, kaj la bridrimeno preskaŭ tire rompiĝis, tiel ke la ligfosto krake vibris. En liaj okuloj grandaj kiel pugnoj fluetis malhele blua lumo.

“Ĉu vi timas? Vi damninda bruto! Kie troviĝas via aroganteco? Vi damninda bruto! Vi maldankema kaj perfida fiulo! Vi fremdiĝinta bastarda hundo!”

Indigne sakrante, li forte hakis per la ŝpato la oblongan vizaĝon de la nigra mulo. La ŝpato enhakiĝis en la foston. Li skuadis dekstren kaj maldekstren la tenilon de la ŝpato kaj fine ĝin eltiris. Baraktante, la nigra mulo arkigis siajn krurojn, kun la vosto sible balaanta la teron. Li celis la vizaĝon de la mulo, kaj, bum! la ŝpato trafis ĝian larĝan frunton. Kolizio de la ŝpato kontraŭ la



fortika kaposto sendis la tremegon tra la tenilo al liaj brakoj kaj dolorigis ilin. Ĝi senvoĉe svingis siajn hufojn tien kaj reen furioze. Ĝi ne plu povis elteni finfine kaj kolapse falis, kvazaŭ dika muro falus krepitade. La bridrimeno disrompiĝis, unu peco de ĝi pendis sur la fosto kaj la alia kurbe kuŝis ĉe la mula vizaĝo. Silente li staris kun brakoj pendantaj. La glata tenilo de la ŝpato enŝoviĝinta en la mula kapo estis oblikve turnita al la ĉielo. Aŭdiĝis bojado de hundo kaj bruado de homoj. Tagiĝis. El la sorgokampoj en la oriento leviĝis arka sangoruĝa matensuno. Sunlumo rekte falis sur lian nigran buŝon duonfermitan.

## 4.

La trupo laŭvice suriris la digon de la rivero sub la lumo de la ruĝa suno, kiu ĵus barakte elvenis el la maldensa nebulo. Patro, samkiel aliaj, havis la vizaĝon duone ruĝan kaj duone verdan. Ili ĉiuj spektis la elŝiritajn nebululojn super la surfaco de Inko-rivero. Tio, kio kunligis la ŝoseojn de la norda kaj suda bordo, estis la ŝtona pontego kun dek kvar arkoj super la rivero. La antaŭa ligna ponteto situis okcidente de la ŝtona ponto. Ĝiaj tri ĝis kvin spanpecoj jam falis en la riveron kaj nur kelkaj brunaj palisoj staris en la akvo senhelpe kontraŭ helverde blankaj onderoj. Sur la akvosurfaco sub la disrompita nebulo videblis ruĝaj kaj verdaj nuancoj, solenaj kaj minacaj. Starante sur la digo, oni povis vidi la senliman sorgospikan surfacon glatan kiel papero sur la suda bordo. La sorgoplantoj staris absolute senmove kaj ĉiu spiko prezentis skarlatan maturiĝintan vizaĝon. Ĉiuj sorgoplantoj kunfandiĝis en kolosan kaj fortikan kolektivon kaj prezentis grandiozan penson. Tiam Patro estis ankoraŭ tre juna kaj li kompreneble ne scipovis elpensi tiujn belajn vortojn. Tio estas mia vortigo.

Sorgoplantoj kaj homoj atendis la fruktiĝon de la tempaj floroj.

La ŝoseo rekte kuris suden, pli kaj pli mallarĝiĝis kaj fine dronis inter sorgoplantojn. Ĉe la plej malproksima loko, kie la ferblua rando de la ĉielvolbo tuŝis la sorgoplantojn, same prezentiĝis la kortuŝa, trista kaj grandioza spektaklo de sunleviĝo.

Iom scivola, Patro rigardis tiujn stultajn gerilanojn. De kie ili venas? Kien ili iras? Kial ili faras embuskon? Kontraŭ kio ili sin preparos batali post embusko? En solena silento aŭdiĝis pli kaj pli klare, pli kaj pli oreplaĉe, la ritma sonado de onderoj plaŭdantaj kontraŭ la rompita ponteto. La nebululoj estis faligitaj de sunlumo en la akvon unuj post aliaj. Inko-rivero ŝanĝiĝis iom-post-iome de malhela ruĝo al brule ora ruĝo kaj plenis je variantaj koloroj. Ĉe akvorando staris soleca akvoplanto kun flavaj velkintaj folioj malalte mallevitaj kaj kun silkraŭpeska infloresko, antaŭe pompinta kaj nun paliĝinta, inter la branĉetoj.

Nun jam estis krabkapta sezono! En la vizio de Patro aŭtuna vento leviĝas, la vetero malvarmiĝas, aro da sovaĝaj anseroj flugas suden... Avo Arhato ordonis: “Kaptu, Douguan... kaptu!” Kraboj plene presis la spurojn per siaj delikataj piedetoj sur la molan kaj fajnan ŝlimon. Patro jam flaris el la riverakvo la delikatan fiŝsimilan odoron karakterizitan de kraboj. Antaŭ la rezistmilto kontraŭ japanoj nia familio nutris per krabkaĉo papavojn, kies floroj kreskis grandaj kaj grasaj, kun gaja koloro kaj nazplaĉa aromo.

“Vi ĉiuj kaŝu vin malantaŭ la digon,” ordonis Komandanto Yu, “Mutulo aranĝu erpilojn.” Demetinte kelkajn volvojn da ferfadenoj, Mutulo kunligis la kvar erpilojn. Li krie alvokis kelkajn trupanojn kaj portis la kunligitajn erpilojn al la kunigejo inter la ŝoseo kaj la ŝtona ponto.

La komandanto diris: “Bone kaŝu vin, fratoj. Kiam la japanaj aŭtoj suriros la ponton kaj la homoj de taĉmentestro Leng baros al japanoj la retretvojon, pafu kune je mia ordono kaj batu ilin en la riveron kiel manĝaĵon de angiloj kaj kraboj.”

Li mansignis al Mutulo. Tiu ekbalancis la kapon kaj forĝvidis duonon de la trupo al la ĉevojaj

sorgokampoj por embusko. Wang Wenyi sekvis lin okcidenten, sed estis forpuŝita returnen de Mutulo.

“Ne iru tien. Ĉu vi timas ĉe mia flanko?” la komandanto demandis.

Wang senĉese kapneis: “Mi ne timas...ne...”

La komandanto ordonis al fratoj Fang bone starigi gisan kanonon sur la digo, kaj turnis sin al Trumpetisto Liu. “Tuj kiam ni ekpafos, maljuna Liu, faru nenion alian ol sonigi vian trumpeteton kiel vi povos. Japanoj timas sonigantajn instrumentojn, ĉu vi komprenas?”

Trumpetisto Liu estis laborkunulo de la komandanto en pli fruaj jaroj. Tiam la komandanto estis seĝoportisto kaj li trumpetisto de funebra muziko. Kaj nun li firme tenis la trumpeteton, kvazaŭ fusilon.

La komandanto diris al siaj homoj: “Mi diru orelmalplaĉajn vortojn por averti vin ĉiuj. Mi pafmortigos tiujn, kiuj fariĝos malkuraĝuloj kiel kokoj. Ni bone agu kaj montru nian kapablon antaŭ taĉmentestro Leng kaj liaj homoj. Tiuj bastardoj nur povas ŝajni sin bravuloj per siaj flagoj kaj klarionoj. Mi neniel obeos al li. Li volas konvertigi nin kiel parton de lia trupo, tamen mi volas reorganizi ilin kiel mian trupon!”

Ĉiuj sidis ĉirkaŭe en sorgokampo. Fang la Sesa elprenis pipon kaj plenigis ĝin per tabako, kaj elpoŝiginte silikon kaj fajrestigan ŝtonpecon por bruligi ĝin. La ŝtonpeco, ruĝa kiel kuirita kokhepato, klake frapiĝis kontraŭ la nigran silikon, eligante grandajn fajrerojn. Granda sparko ŝpruce falis sur la meĉon el sorgotigo pinĉita inter liaj polekso kaj ringofingro, kaj pintigante siajn lipojn, li elbuŝigis ekblovon. La meĉo levis blankan fumon kaj ruĝiĝis. Per ĝi li bruligis la pipon kaj faris elsuĉon. La komandanto enspiris fumon tra la nazo kaj diris: “Estingu la pipon. Ĉu japanoj suriros la ponton, se ili flaros la tabakodoron?”

Fang la Sesa tuj faris du elsuĉojn el la pipo, frape malplenigis la pippelvon kaj bone pakis tabakon.

La komandanto ordonis: “Kuŝu surventre sur la deklivo de la digo, vi ĉiuj, alie vi montriĝos senrimede konfuzitaj, kiam japanoj alvenos.”

Kun iom da nervozeco, ili, apogante sin sur la deklivo de la digo, tenis pafilon en brakumo, kvazaŭ alfrontante la timindan malamikon. Patro kuŝis surventre ĉe la komandanto, kaj tiu demandis: “Ĉu vi timas?”

“Ne!” estis la respondo de Patro.

La komandanto laŭdis: “Brila ulo! Vi ja estas mia vera filo! Vi estas mia stafeto. Ne foriru de mi, kiam ni batalos. Vi komunikos, kion mi ordonos, al la okcidenta flanko.”

Patro kapjesis. Li fiksis sian avideman rigardon al du pistoloj, unu granda kaj la alia malgranda, ĉe la zono de la komandanto. La granda estis germana aŭtomata pistolo kaj la malgranda franca Browning-pistolo. Ĉiu pistolo havis sian devenon.

Patro elbuŝigis: “Pafilo!”

“Ĉu vi volas ĝin?” demandis la komandanto.

Patro kapjesis: “Pafilo.”

“Ĉu vi scipovas uzi ĝin?” demandis la komandanto.

“Jes!” diris Patro.

Komandanto Yu eltiris Browning-pistolon kaj pesis ĝin en la mano. La pistolo estis longe uzita kaj ĝia emajlo jam tute malaperis. Li tiris la ellasilon kaj kupra kuglo kun ronda kapo elsaltis el la ŝargilo. Li ĵetis la kuglon tre alten, kaptis ĝin per la mano kaj denove premis ĝin en la pistolon.

“Jen prenu ĝin!” diris la komandanto, “Uzu ĝin kiel mi, via patro.”

Patro kaptis ĝin de lia mano. Kun ĝi enmane Patro ekpensis, ke la komandanto pafrompis vintason per tiu ĉi pistolo mem nokte antaŭhieraaŭ.

Tiam la lunarko ĵus leviĝis kaj malalte pendis super la branĉoj de velkinta arbo. Kun vinpoto en brakumo kaj kupra ŝlosilo en mano, Patro iris al vinfarejo plenigi la poton per alkoholaĵo laŭ la ordono de Avino. Kiam Patro malŝlosis la pordon, li trovis, ke silento regas en la korto, la stalo de muloj obskuras kaj la vinfarejo elspiras la malbonodoron de vinfeĉoj. Levinte la kovrilon de vinvazego, li vidis, sub stelbrilo, sian ostecan vizaĝon sur la trankvila surfaco de la vino. Li konsideris, ke li mem estas turpa pro siaj mallongaj brovoj kaj maldikaj lipoj. Li mergis la poton en la vazegon kaj la vino glugle enfluis en la poton. Kiam li levis la poton el la vazego, la vingutoj sur la poto tiktake falis en la vazegon.

Patro ŝanĝis sian ideon kaj li verŝis la vinon de la poto en la vazegon. Li ekpensis pri la vazego da vino, per kiu Avino lavis al si la vizaĝon makulitan de sango. Nun en la ĉambro ŝi drinkis alkoholaĵon kune kun Komandanto Yu kaj Taĉmentestro Leng. Ŝi kaj la komandanto estis bonaj drinkantoj, dum la taĉmentestro iom ebriiĝis. Patro iris al tiu vazego da vino, sur kies ligna kovrilo peze sidis ŝtona muelilklapo. Demetinte la poton, li forlevis ĝin per tuta forto. La muelilklapo faris du ruliĝojn, koliziis kontraŭ alia vinvazego kaj boris sur la vando grandan truon, el kiu elŝprucis torente la alkoholaĵo. Tion li ignoris. Forpreninte la kovrilon, li flaris la sangan odoron de avo Arhato. Ties sanganta kapo kaj la sangomakulita vizaĝo tuj eniris en lian cerbon. Tiuj kapo kaj vizaĝo varie aperis kaj reaperis en la vazego. Li preme mergis la poton en la vazegon, plenigis ĝin per la sanga alkoholaĵo kaj reiris hejmen, ambaŭmane tenante ĝin.

Kandeloj brile brulis sur la kvadrata tablo, trans kiu Komandanto Yu kaj Taĉmentestro Leng minace rigardis unu al la alia, spiregante. Avino staris inter ili, kun la maldekstra mano premanta la revolveron de la taĉmentestro kaj la dekstra mano la Browning-pistolon.

Patro aŭdis Avinon persvadi: “Eĉ se vi ne povas akordiĝi, vi ne devus perdi fratecon kaj sincerecon. Ĉi tie ne estas la taŭga loko por vi ambaŭ uzi pistolojn. Se vi kapablas, direktu ilin al japanoj.”

“Vi bastardo,” Komandanto Yu kolerege sakris, “vi ne povas timigi min, eĉ se vi agas pere de la forto de Brigadestro Wang. Mi ja estas la reĝo sur tiu ĉi teritorio. Ĉi tie mi manĝigas min per patkukoj dek jarojn, kaj mi donas nenian atenton al tiu azenido Krifego Wang!”

La taĉmentestro rikanis: “Frato Zhan’ao, mi faras bonon por vi, ankaŭ Brigadestro Wang. Se vi trenos vian trupon kaj kunigos ĝin kun la nia, vi povos komandi kiel batalionestro. Brigadestro Wang provizos vin per soldo. Tio estos pli bona ol kiam vi agas kiel bandito nun.”

“Kiu estas bandito? Kiu estas bandito? Tiu, kiu povas bati japanojn, estas ĉina heroo. Lastjare mi mortigis tri japanajn sentinelojn kaj gajnis tri fusilojn. Vi taĉmentestro ne estas bandito, sed kiom da japanaj diabloj vi mortigis? Vi eĉ ne tuŝis unu hareton de japanoj.”

Leng sidiĝis, kaj elpoŝiginte cigaredon, bruligis ĝin.

Profitante la ŝancon, Patro aliris kun la vinpoto tenata ambaŭmane. Transpreninte la poton, Avino tuj ŝanĝis sian vizaĝkoloron kaj ĵetis minacan rigardon al Patro. Ŝi verŝis vinon en tri bovlojn eĉ ĝisrande!

Avino diris: “En la vino troviĝas la sango de onklo Arhato. Eltrinku, se vi estas indaj viroj. Postmorgaŭ vi kune embuskos la japanan aŭtovicon. Post tio, kiel proverbo diras, koko iros sian vojon kaj hundo la sian. Putakvo neniam miksiĝos kun riverakvo<sup>1</sup>.” Ŝi prenis bovlon da vino kaj englutis ĝin glugle.

---

<sup>1</sup> Tiu ĉi proverbo signifas, ke oni iras sian propran vojon sen ŝovi sian nazon en alies afero.

La komandanto ankaŭ prenis bovlon da vino kaj englutis ĝin je eklevo de la kapo.

La taĉmentestro levis bovlon kaj trinkis duonon de vino. Demetinte la bovlon, li diris: “Komandanto Yu, mi ne kapblas trinki ĉiom. Adiaŭ!”

Avino permane premis la revolveron, demandante: “Embuski aŭ ne?”

La komandanto kolere diris: “Ne petu lin. Eĉ se li ne batalos, mi batalu!”

Leng diris: “Mi batalos.”

Avino lasis la manon for, kaj Leng, ekkaptinte la revolveron, pendigis ĝin al la zono.

Taĉmentestro Leng havis blankan haŭton kaj dekkelkajn nigrajn variolmarkojn ĉirkaŭ la nazo. Li havis kartoĉrubandon ĉirkaŭ sia talio, kaj kiam li pendigis sian revolveron ĉe la talio, lia zono kurbiĝis suben kiel lunarko.

“Zhan’ao,” diris Avino, “mi konfidas Douguan al vi. Postmorgaŭ kunportu lin.”

Ekrigardinte Patron, li ridete demandis: “Mia adopta filo, ĉu vi estas sufiĉe brava?”

Patro malŝate rigardis la brunflavajn, sed fortikajn dentojn montritajn inter la lipoj de la komandanto, kaj diris nenion.

La komandanto prenis vintason, ĝin metis sur la kapon de Patro kaj ordonis al tiu retropaŝi ĝin la pordo. Tenante la Browning-pistolon, li iris al murangulo.

Patro vidis la komandanton fari tri grandajn, sed malrapidajn paŝojn en la direkto al la murangulo. Avino paliĝis. Ĉe la buŝanguloj de Taĉmentestro Leng ludis du strioj da moka rideto.

Ĉe la murangulo la komandanto haltis kaj abrupte sin turnis. Patro vidis lin nivele teni sian brakon kaj liajn nigrajn okulojn ruĝe radii. El la aperturo de la pistolo ŝprucis strio da blanka fumo. Aŭdiĝis laŭta eksplodo super la kapo de Patro kaj la vintaso dispeciĝis pro eksplodo. Unu rompita porcelana peco sin ĵetis sur lian kolon. Je ekmovo de lia kapo ĝi glite falis ĝis la talio sub la vesto, sed li diris nenion. La vizaĝo de Avino ankoraŭ pli paliĝis. Leng peze sidiĝis sur la benkon, kaj post longa tempo, li diris: “Kiel trafa pafu!”

La komandanto diris: “Mia bona filo!”

Kun Browning-pistolo enmane Patro sentis ĝian eksterordinaran pezon.

Komandanto Yu diris: “Vi ne bezonas mian instruadon kaj vi mem scipovas, kiel uzi ĝin. Transdonu mian ordonon al Mutulo, ke ili sin pretigu!”

Tenante la pistolon en la mano, Patro sin ŝovis inter sorgoplantojn, transiris la ŝoseon kaj aliris al Mutulo. Tiu, kiu sidis sur siaj krucitaj kruroj, akiris longan sabron per freŝverda ŝtono. Kaj aliaj trupanoj aŭ sidis aŭ kuŝis.

“Estas ordonite, ke vi pretigu vin,” Patro transdiris al Mutulo.

Ĵetinte straban rigardon al li, Mutulo daŭrigis akrigon. Post kelka tempo da akrigado li deŝiris sorgofoliojn kaj forviŝis per ili ŝtonŝaŭmon de sur la klingo. Per eltirita maldika herbo li provis la akrecon de la klingo, kaj la herbo sensone rompiĝis je ektuŝo al la akra eĝo de la klingo.

“Ke vi pretigu vin!” Patro diris duafoje. Mutulo ingis la sabron kaj metis ĝin ĉe si. Timinda rideto naĝis al lia vizaĝo. Li levis manegon kaj mansigne alvokis Patron.

“Uhu, uhu!” li gruntis.

Patro aliris per kataj paŝoj kaj haltis je unu paŝo antaŭ li. Mutulo iom klinis sin, kaptis la baskon de Patro, ektiris lin en sian sinon. Li pinĉis la orelon de Patro, kiu grimacis kun tordita buŝo ĝis la vango. Patro, per Browning-pistolo, pikis lian spinon. Mutulo premis lian nazon kaj forte lin ekpuŝis. Larmoj de Patro elŝprucis. Mutulo eksplodis per stranga ridado.

La trupanoj, kiuj dise sidis ĉirkaŭ Mutulo, ankaŭ eksplodis per laŭtaj ridoj.

“Ĉu li similas Komandanton Yu?”

“Li estas la semo de Komandanto Yu.”

“Mi sopiras al via patrino, Douguan.”

“Douguan, mi volas manĝi paron da vaporumitaj pastoj kun po jujubo enŝovita de via patrino.”

Furioza pro honto, Patro levis la pistolon kaj pafis al tiu, kiu volis manĝi vaporumitajn pastojn, sed la pistolo nur klakis kaj ne kuglo elpafiĝis.

Tiu homo, kies vizaĝkoloro fariĝis livida, tuj eksaltis por kapti la pistolon de Patro. Kun flamanta kolero Patro sin ĵetis sur lin, piedbatante kaj mordante.

Stariĝinte, Mutulo kaptis Patron je la kolo kaj forte deŝiris lin. Patro ŝvebe leviĝis kaj derompinte kelkajn sorgotigojn, falis teren. Post ruliĝo sur la tero Patro sin starigis kaj sakrante, sin ĵetis al Mutulo, kiu eligis du gruntojn. Rigardante lian lividan vizaĝon, Patro fiksiĝis surloke en stuporo. Mutulo forkaptis Browning-pistolon, tirmalfermis ŝargilon kaj kuglo falis en lian manon. Tenante la kuglokapon inter siaj fingroj, li observis la trueton ĉe la kuglofino borita per perkutito, kaj mansignis kontraŭ Patro. Li ŝovis la pistolon ĉe la zonan de Patro kaj frapetis lin sur la kapon.

“Kial vi levis tian bruon tie?” demandis la komandanto.

Patro elverŝis sian plendon: “Li diris, ke li...volas kuŝi kun mia patrino.”

“Kion vi kontraŭdiris, do?” demandis la komandanto, kun rigida vizaĝo.

Ekviŝinte siajn okulojn per brako, Patro diris: “Mi donis pafon al li.”

“Ĉu vi pafis?”

“Kuglo ne elpafiĝis,” dirante, Patro enmanigis al li la orflavan kuglon, kiu ne eksplodis.

La komandanto transprenis la kuglon, ekzamenis ĝin kaj laŭplaĉe forĵetis ĝin, kiu arke flugis kaj falis en la riveron.

“Bona tipo!” diris la komandanto. “Unue pafu japanojn. Post ekstermado de japanoj, pafu tiun, kiu kuraĝas diri, ke li volas kuŝi kun via patrino. Pafu lian ventron. Memoru, pafu lian ventron, sed nek lian kapon nek lian bruston.”

Patro apogis sin al la komandanto kaj fratoj Fang sin lokis ĉe lia dekstra flanko.

La gisa kanono jam instaligis sur la digo kaj ĝia buŝo estis direktita al la ŝtona ponto. En ĝia buŝo ŝtopiĝis ĉifona vato kaj ĉe ĝia vosta parto paradis fuzeo. Ĉe la flanko de Fang la Sesa metiĝis maso da tindro elfarita per spongecaj fibroj de sorgotigoj, iom el kiu estis brulanta. Kaj apud Fang la Sesa kuŝis botelkukurbo entenanta pulvon kaj ladskatolo kun plumberoj.

Maldekstre de la komandanto estis Wang Wenyi, kiu, firme tenante longan birdpafilon per ambaŭ manoj, tremis tra la korpo kuntiriĝanta, kaj lia vundita orelo jam kungluiĝis kun blanka tuko.

Jam moviĝis iom alten la matensuno kun blanka kerno ĉirkaŭita de helruĝa haloo. La riverakvo brilis. Aroj da sovaĝaj anasoj alflugis super sorgoplantoj. Post tri ĉirkaŭflugoj pliparto de ili oblikve plonĝis en herbotufojn sur la flusejo kaj nur areto da ili, falintaj sur la riveron, drivis laŭflue. La sovaĝaj anasoj sur la rivero tenis sian korpon senmova kaj nur turnadis sian facilmovan kolon jen kaj jen. Patro sentis sin varma tra la korpo. Lia vesto malsekigita de rosoj jam tute sekiĝis. Post kelka tempo da surventra kuŝado li sentis, ke ŝtonero dolorigas lian bruston, tiel ke li sidiĝis kun la kapo kaj brusto enŝovitaj pli alte ol la digo-surfaco.

“Kuŝigu vin,” la komandanto ordonis.

Patro malvole kuŝiĝis. Fang la Sesa eligis ronkojn tra la nazo. La komandanto levis terbulon kaj ĝin ĵetis sur lian vizaĝon. Fang la Sesa malklarkape sidiĝis kaj oscedante, elŝovis du

malgrandajn larmogutojn.

“Ĉu japanaj diabloj alvenas?” Laŭte demandis Fang la Sesa.

“Fik!” sakris la komandanto. “Ne licas dormi.”

Silento regis sur la norda kaj suda bordoj. La larĝa ŝoseo kuŝis senvive tra inter sorgoplantoj. La ŝtona pontego montriĝis belaspekta. Senlimaj sorgospikoj prezentis sian skarlatan kaj belan vizaĝon sub la altiĝanta suno. Ĉe malprofundejo de la rivero sovaĝaj anasoj serĉadis ion per sia plata beko, kvakante.

Kun sia rigardo ripozanta sur la sovaĝaj anasoj Patro esploris iliajn belan plumaron kaj facilmovajn okulojn. Tenante la pezan Browning-pistolon ambaŭmane, li celis per ĝi la platajn dorsojn de la sovaĝaj anasoj. Li jam pretigis sin pafi. La komandanto premis lian manon, dirante: “Kion vi volas fari, vi testudido?”

Patro fariĝis malpacienca. La ŝoseo ankoraŭ kuŝis morte. Sorgospikoj ankoraŭ pli skarlatiĝis.

“Tiu bestio Variolulo Leng, se li aŭdacus mistifiki min!” minace diris Komandanto Yu.

Sur la suda bordo ne aŭdiĝis ia voĉo nek vidiĝis signo de la taĉmento de Leng. Patro sciis, ke Taĉmentestro Leng akiris la informon pri la trapaso de la japana aŭtovico tra tiu ĉi loko, kaj ke tiu petis kunagadon de la komandanto por embuski la aŭtovicon, timante la nesufiĉe grandan forton de sia trupo.

Dum momento Patro nervoziĝis kaj poste malstreĉiĝis. Lia rigardo estis allogita de la sovaĝaj anasoj fojrefoje. Li ekmemoris pri pafado al anasoj kune kun avo Arhato. Tiu havis birdpafilon kun malhela ruĝa kolbo kaj bovleda rimeno. Sed nun ĝi restis en la manoj de Wang Wenyi.

La okuloj de Patro plenis je larmoj, sed ankoraŭ ne ĝis tia grado, ke ili elruliĝis el la okul kavoj. Ĝuste okazis kiel en tiu tago de la lasta jaro. En varma sunlumo Patro sentis pikan froston disvastiĝantan tra la tuta korpo.

Tiun tagon avo Arhato kaj la du muloj estis forkaptitaj de japanaj diabloj kaj marionetaj soldatoj. Avino lavpurigis la sangomakulojn de sur sia vizaĝo. Kun vinodoro sur la vizaĝo Avino ekhavis ruĝiĝintan haŭton. Ŝiaj palpebroj iom ŝveliĝis kaj la brusto de ŝia blanka vesto jam malsekiĝis de vino kaj sango. Starante ĉe la vazego, ŝi fiksrigardis la vinon ene. La vino spegulis ŝian vizaĝon. Laŭ la memoro de Patro, ŝi falis sur siajn genuojn kaj faris tri koŭtoŭojn kontraŭ la vazego. Poste ŝi stariĝis kaj eltrinkis la vinon elĉerpitan per ambaŭ manoj. La ruĝo de ŝia tuta vizaĝo koncentriĝis sur ŝiaj vangoj, kaj ŝiaj frunto kaj mentono aspektis pale.

“Genuiĝu!” Avino ordonis al Patro, “kaj koŭtoŭu.” Patro genuiĝis kaj faris koŭtoŭojn.

“Ĉerpu vinon per ambaŭ manoj kaj eltrinku ĝin!” Patro faris tion laŭ ŝia ordono.

Strioj da sango fadene falis al la fundo de la vazego. Ene ŝvebis malgranda blanka nubpeco kaj seriozaj vizaĝoj de Avino kaj Patro. El la mallarĝaj kaj longaj okuloj de Avino pafiĝis brulanta lumo, al kiu Patro ne kuraĝis direkti sian rigardon. Kun brue batanta koro Patro refoje elĉerpis vinon per ambaŭ manoj. Vino gutis el inter liaj fingroj, kio taŭzis la bildon de la blua ĉielo kun blankaj nuboj, kaj grandan kaj malgrandan vizaĝojn en la vazego. Patro trinkis el la manoj buŝplenen da vino, kaj la sanga odoro firme algluiĝis al lia lango. Sangostrioj jam falis sur la fundon de la vazego kaj kolektiĝis, forminte malklaran mason grandan kiel pugno. Avino kaj Patro ĝin rigardis longan tempon. Avino almetis kovrilon sur la vazegon, alrulis muelilklapon el murangulo, fortostreĉe levis ĝin kaj premis ĝin sur la kovrilon.

“Ne tuŝu ĝin plu!” Avino ordonis.

Rigardante la humidan grundon kaj la rampantajn grizverdajn vermojn en la kaneloj de la muelilklapo, Patro maltrankvile kaj panike balancis sian kapon.

Tiun nokton Patro, kuŝante en la liteto, aŭdis Avinon paŝi tien kaj reen. Knarado de ŝiaj paŝoj kaj silblado en sorgokampoj plektis lian konfuzitan sonĝon. Kaj li ankaŭ aŭdis en la sonĝo henadon de la belaj nigraj mulegoj de nia familio.

Tuj ĉe tagiĝo Patro vekigis. Kiam li nuda elkuris pisi en la korto, li vidis Avinon stari tie kaj ŝtoniĝe gapi al la ĉielo. Li vokis ŝin per “panjo”, sed ŝi ne respondis. Pisinte, li tiris ŝin je la mano al la domo. Ŝi lace sekvis lin en la domon. Apenaŭ ili trapasis la sojlon, aŭdiĝis tajdsimila bruado en la sudorienta direkto. Tuj poste sonis pafo, tre akuta, kvazaŭ akra ponardo tranĉus streĉe tiratan pecon de sateno.

Tiam sur la loko, kie Patro kuŝis surventre, abunde amasiĝis purblankaj ŝtonslaboj kaj ŝtonpecoj, kaj amasoj da flava kruda sablo piramidis kiel vicoj da tomboj. Komence de la lastjara somero sorgoplantoj ekster la digo morne staris ŝtoniĝantaj. La vojo, kiu formiĝis post kiam terruliloj premfaligis sorgoplantojn, etendiĝis norden. Tiam la ŝtonponto ankoraŭ ne konstruiĝis, dum la lignoponteto estis elĉerpita kaj multe vundita sub surtretado de miloj da piedoj kaj miloj da hufferoj de muloj kaj ĉevaloj. La odoro elspirita el sorgoplantoj premrampitaj kaj ĉifitaj, kiu tremiĝis en nokta nebulo, fariĝis des pli forta frumatene. Sorgoplantoj tra la kampoj malĝoje ploris. Post tiu pafo Avino kaj Patro, kune kun aliaj maljunuloj, malfortuloj, virinoj kaj infanoj de la vilaĝo, estis pelitaj ĉi tien de japanaj soldatoj. Tiam la suno ĵus leviĝis tuj super sorgoplantoj. Avino kaj Patro kun amaso da vilaĝanoj staris okcidente de la ŝoseo sur la suda bordo, surtretante la kadavrojn de sorgoplantoj. Patro kaj aliaj rigardis la stalsimilan grandan ĉirkaŭfermitejon, ekster kiu granda amaso da laborantoj en ĉifonaĵo kunŝoviĝis. Poste du marionetaj soldatoj pelis ilin al la okcidenta flanko de la ŝoseo, kaj tuj apud Patro kaj la aliaj ili formis alian homamason. Antaŭ la du homamasoj troviĝis la loko, kie muloj kaj ĉevaloj ligiĝis kaj kiu poste timigos la vilaĝanojn. Tie oni staris senemocie, kaj post longa tempo ili vidis alveni el la tendo malgrasvizaĝan japanan oficiron, kun po unu ruĝa tolpeco sur la ŝultroj kaj ŝtala sabro ĉe sia flanko, kondukante luphundon per siaj blanke gantitaj manoj. Ĉe lia flanko la luphundo pendigis sian brilkoloran langon kaj ĝin sekvis du marionetaj soldatoj portantaj rigidan kadavron de japana soldato. Ĉe la vosto iris du japanaj soldatoj, eskortante avon Arhato plene sange ŝmiritan, kiu estis apogita de du marionetaj soldatoj. Patro pene alpremis sin al Avino kaj tiu tuj ĉirkaŭis lin per brako.

Kondukante la hundon, la japana oficiro haltis sur la neokupita loko. Pli ol kvindek blankaj birdoj elflugis el la fluejo de Inko-rivero, svingante flugilojn, trapasis tra la blua ĉielo super la homamaso kaj giris orienten al la ora suno. Patro vidis tie tiujn malpurajn brutojn kun distaŭzitaj haroj kaj du nigrajn mulegojn de nia familio kuŝantaj sur la tero, unu el kiuj jam mortis, ankoraŭ kun la ŝpato oblikve enŝovita en la kapo. Nigra sango multe malpurigis la dispecigitajn sorgoplantojn sur la tero kaj glate puran vizaĝon de la mulo. La alia sidis sur la tero: ĝia vosto plene makulita de sango balaadis la grundon, la dika haŭto ĉe ĝia ambaŭ flankoj susure tremis, ĝiaj naztruo, kiuj jen fermiĝis jen malfermiĝis, fajfile snufis.

Ja Patro tre ŝatis la du nigrajn mulojn. Kun elstarigita brusto kaj alte levita kapo Avino rajdis sur la mulo kaj Patro nestis en ŝia sino. La mulo, kun Avino kaj Patro sur la dorso, galopis sur la kota vojo borderita per sorgoplantoj ambaŭflanke. Ili tangis supren aŭ malsupren surdorse de la mulo, kiu galopis, klinante sian kapon antaŭen aŭ malantaŭen. La maldikaj kruroj de la mulo levis nubojn da polvo laŭ la vojo. Patro gajoplene kriadis pro tio. Tenante pioĉon aŭ aliajn agrokulturilojn, kampuloj sporade starantaj ĉe la rando de sorgoplantoj envie rigardis la pudritan vizaĝon de la mastrino de la vinfarejo. Kaj nun unu el la du nigraj mulegoj de nia familio mortis



kun malfermitaj lipoj kaj vico da blankaj oblongaj dentoj tuŝantaj la grundon, kaj la alia sidis, suferante multe pli ol morti.

Patro diris al Avino: “Jen la muloj de nia familio, panjo.” Ŝi tuj kovris lian buŝon per sia mano.

La kadavro de la japana soldato estis metita antaŭ la japana oficiro, kiu staris, apogante sin al la sabro kaj tenante la hundon per rimeno. Du marionetaj soldatoj trenis avon Arhato plene sangomakulitan al ligfosto por ĉevalo. Patro ne rekonis en li avon Arhato.

Patro nur vidis la homan monstron sangantan kaj solide batitan. Kiam tiu estis trenata al la ligfosto, lia kapo svingiĝis jen maldekstren jen dekstren. La sanga cikatro, kiel glita ŝlimo sedimentigita sur flusejo, ŝrumpiĝis ĉe la rando kaj sulkoplendiĝis, sub la bakado de la suno. Liaj piedoj plugis la teron, lasante sinuajn liniojn sur la tersurfaco. La homamaso sensone kunpremiĝis. Patro sentis, ke Avino firme tenas liajn ŝultrojn per manoj. Ĉiuj vilaĝanoj ŝajne malgrandiĝis. Pro timo iuj el ili ekhavis flavan mienon kaj aliaj nigran mienon. Dum tiu momento ĉiuj mutiĝis. Aŭdiĝis nur la sonoj de spirado de la luphundo kondukata de la japana oficiro, kiu ellasis sonorant furzon. La marionetaj soldatoj trenis la homan monstron ĝis alta ligfosto, kaj kiam ili malstreĉis siajn manojn, la monstro paralize falis sur la teron, kiel senosta karnomaso.

Patro surprizite eligis ekkrion: “Onklo Arhato!” Avino denove kovris lian buŝon per la mano.

Avo Arhato malrapide moviĝis ĉe la piedo de la ligfosto. Unue li alte levis sian pugon kaj formis arkon, poste genuiĝante premis la teron per ambaŭ manoj kaj starigis sian kapon. Lia vizaĝo briletis pro ŝveliĝo kaj liaj okuloj fariĝis maldikaj linioj, el kiuj elpafiĝis du radioj da malhele verda lumo. Ĉar li staris ĝuste kontraŭ avo Arhato, Patro kredis, ke tiu certe vidis lin. La organoj en lia brusto kunfrapiĝis unu kontraŭ la alia. Li ne povis juĝi, ĉu estiĝis paniko aŭ indigno en si. Li volis plengorĝe krii, sed lian buŝon Avino firme kovris per la manplato.

La japana oficiro tenanta la rimennon de la luphundo laŭte kriis kelkan tempon al la homamaso. Ĉino kun brosfurma hararo interpretis, kion la japana oficiro diris.

Patro ne kaptis ĉiujn vortojn de la interpretisto, ĉar li nur vidis orajn steletojn flirti antaŭ siaj okuloj kaj aŭdis zumadon ĉe la oreloj pro firma kovrado de Avino al lia buŝo.

Du ĉinoj nigre vestitaj nudigis avon Arhato kaj alligis lin al la fosto. Je eksvingo de la mano de la japana oficiro, aliaj du homoj nigre vestitaj elpuŝis el la ĉirkaŭfermitejo Sun la Kvinan, la faman porkobuĉiston de la Nordorienta Vilaĝo de Gaomi. Li estis malaltekreska kaj karnoplena, kun kalva kapo kaj ruĝa vizaĝo. Liaj okuloj tre proksimis unu de la alia kaj profunde kaviĝis ĉe ambaŭ flankoj de la nazo. Kun akra tranĉilo en maldekstra mano kaj sitelo da pura akvo portata per dekstra mano, li treme iris antaŭ avon Arhato.

La interpretisto diris: “Lia moŝto volas, ke vi bone senhauĝigu lin. Se vi ne bone faros tion, la luphundo ŝirmalfermos vian ventron.”

Sun la Kvinan senĉese jesis. Liaj okuloj rapide palpebrumadis. Kun tranĉilo prenita per la buŝo, li levis la sitelon kaj verŝis akvon sur la kapon de avo Arhato. Pikite de malvarma akvo, tiu abrupte levis sian kapon. La sangoakvo malpure fluis de liaj vizaĝo kaj kolo ĝis la kalkanoj. Vokto ĉerpis akvon el la rivero kaj ĝin alportis. Sun la Kvinan trempis ĉifonon en akvon kaj viŝis lin pura. Post tio Sun, svingante sian pugon, diris: “Granda frato...”

Avo Arhato diris: “Mortigu min per unu tranĉo. Mi ne forgesos vian favoron en Flava Fonto<sup>2</sup>.”

La japana oficiro eligis ekkrion.

“Rapide agu!” diris la interpretisto.

Kun ŝanĝita mieno Sun etendis siajn dikajn kaj mallongajn fingrojn kaj pinĉis la oreton de avo

---

<sup>2</sup> Flava Fonto estas la subtera loĝejo de mortintoj laŭ superstiĉo.

Arhato, dirante: “Granda frato, mi povas fari nenion alian ol...”

Patro vidis, ke Sun segas per la tranĉilo lian oreton kiel lignon. Avo Arhato furioze senĉese kriadis, kaj flava urino ŝprucis el inter du femuroj de tempo al tempo. Patro tremis per ambaŭ kruroj. Japana soldato, kiu ambaŭmane tenis blankan porcelanan pleton, alvenis kaj haltis apud Sun la Kvina, kiu metis sur la pleton la grasan kaj masivan oreton de la avo. Sun fortranĉis lian alian oreton kaj ĝin metis sur la pleton. Patro vidis, ke la du oretoj vigle saltetis sur la pleto kaj tinte frapis la pleton.

Kun la pleto tenata per ambaŭ manoj la japana soldato malrapide paŝis preter la laborantoj kaj vilaĝanoj, junaj kaj maljunaj. Patro vidis, ke tiuj oretoj estas palaj kaj belaj, ankoraŭ pli sone frapante la pleton.

La japana soldato alportis la oretojn antaŭ la japanan oficiron, kaj tiu ekbalancis la kapon. Kaj li metis la porcelanan pleton apud la kadavron de la japana soldato kaj staris silente dum momento. Li relevis la pleton kaj metis ĝin sub la buŝon de la luphundo. Ĝi retiris sian langon kaj ekflaris la du oretojn per sia pinta kaj nigra nazo. Skuinte la kapon, ĝi eligis sian langon kaj sidiĝis.

La interpretisto ordonis al Sun la Kvina: “He, daŭrigu!”

Sun rondiradis ĉeloke, murmurante. Patro vidis, ke li, kun oleeca ŝvito sur la tuta vizaĝo, palpebrumis tre rapide, kiel kokoj bekis rizgrajnojn.

El la oretradikoj de avo Arhato nur eksudis kelkaj sangogutoj. Sen oretoj lia kapo fariĝis tre simpla. Tiam la japana oficiro ekkriis.

La interpretisto ordonis: “Rapide tranĉu!”

Klininte sin, Sun la Kvina fortranĉis la seksorganon de avo Arhato per unu hako kaj metis ĝin sur la pleton ambaŭmane portatan de la japana soldato, kiu, kun la brakoj rigide etenditaj kaj la rigardo direktita rekte antaŭen, preterpasis la homamason kiel fadenpupo. Patro sentis, ke Avino preskaŭ enfosas per siaj glaciaj fingroj la karnon de liaj ŝultroj.

La japana soldato metis la pleton sub la buŝon de la luphundo, kiu faris du mordojn kaj denove elvomis ĝin.

Triste kriegante, avo Arhato furioze tordis sian skeletan korpon alligitan al la fosto.

Forĵetinte tranĉilon, Sun la Kvina genuiĝis kaj laŭte ploregis.

La japana oficiro delasis la rimenon kaj la luphundo tuj sin ĵetis al Sun. Ĝiaj antaŭaj kruroj premiĝis sur la ŝultrojn de Sun kaj ĝiaj akraj dentoj svingiĝis antaŭ lia vizaĝo. Kuŝante sur la tero, li kovris sian vizaĝon per la manoj.

La japana oficiro ekfajfis kaj la hundo rekuris al li, trenante la rimenon.

“Rapide lin senhaŭtigu!” kriis la interpretisto.

Leviĝinte, Sun la Kvina, kun la tranĉilo en la mano, iris ŝanceliĝe al avo Arhato.

Avo Arhato laŭte sakris kaj ĉiuj rigardantoj levis la kapon.

“Granda frato... granda frato...” Sun petis, “iom eltenu...”

Avo Arhato sputis sangan kraĉaĵon sur lian vizaĝon.

“Senhaŭtigu! Fik al vi! Senhaŭtigu!”

Per la tranĉilo Sun la Kvina komencis senhaŭtigi lin de la aperta vundo sur lia kaphaŭto, pertranĉile malzipante lian haŭton malsupren. Li laboris tre zorgeme kaj detranĉis la skalpon de avo Arhato, kies verdepurpuraj okulgloboj kaj tavoloj da karno montriĝis...

Patro diris al mi, ke post detranĉo de lia vizaĝhaŭto lia deformita buŝo ankoraŭ murmuris, kaj grapoloj da skarlataj sangogutetoj fluas malsupren de lia bruna skalpo. Sun la Kvina jam ne ŝajnis humana. Li manipulis la tranĉilon tiel lerte, ke li eĉ elfaris senmankan haŭton el homo. Kiam avo

Arhato fariĝis senhaŭta karnomaso, la intestoj en lia ventro videble moviĝis kaj aroj da verdaj muŝoj flirtis en la aero. Virinoj en la homamaso ĉiuj genuiĝis kaj ĉielskue ploregis. Tiun nokton verŝiĝis pluvego, kiu lavpurigis la sangajn makulojn sur la tero de la kolektejo de muloj kaj ĉevaloj. Kaj la kadavro kaj haŭto de avo Arhato malaperis senspure. En la vilaĝo cirkulis la famo pri malapero de lia kadavro, de unu al dek, de dek al cent homoj, de generacio al generacio, kaj tio eĉ fariĝis bela legendo.

“Se li kuraĝas ruzi kontraŭ mi, mi tordrompos lian kapon kiel urinpoton!”

La suno, kiu pli kaj pli altiĝis kaj malgrandiĝis, elĵetis ardajn radiojn. La rosoj sur sorgoplantoj maldensiĝis. Aro da sovaĝaj anasoj forflugis kaj alia aro alflugis. La homoj de Taĉmentestro Leng ankoraŭ ne alvenis. Sur la ŝoseo videblis neniu signo de vivestaĵoj krom leporoj, kiuj okaze trakuris. Kaj poste ŝtele elsaltis fajroruĝa vulpo.

Post sakrado al Taĉmentestro Leng, Komandanto Yu laŭte kriis: “He, leviĝu, vi ĉiuj. Probable ni estas trompitaĵoj de Variolulo Leng.”

Jam lacaj de surventra kuŝado, la trupanoj tre soifis aŭdi tiujn vortojn. Ĉe la ordono ili tuj leviĝis. Iuj, sidante sur la digo, bruligis la pipon, kaj aliaj, starante sur la digo, pisis malsupren longe retenitan urinon.

Saltinte sur la digon, Patro ankoraŭ dronis en la rememoroj pri la lastjara sceno. Antaŭ liaj okuloj senĉese viziĝis la senhaŭtigita kapo de avo Arhato. Timigite de subite aperanta homamaso, la sovaĝaj anasoj ĉiuj forflugis, poste falis unuj post aliaj sur neproksiman flusejon kaj ŝanceliris tie, jen kaj jen vidigante siajn junverdajn kaj brunflavajn plumojn inter herbotufoj.

Tenante siajn glavon kaj malnovan fusilon fabrikitan en Hanyang, Mutulo iris antaŭ Komandanton Yu. Kun malĝoja mieno kaj rigidaj okuloj, li montris al la suno, kiu jam sin trovis sudoriente super ili, montris al la ŝoseo, kiu estis malplena, kaj montris al sia ventro, kiu grumbladis pro malsato. Li svingis sian brakon al la direkto de la vilaĝo. Post momenta pripensado, la komandanto kriis al la homoj okcidente de la ŝoseo: “Alvenu ĉi tien!”

La trupanoj trairis la ŝoseon kaj kolektiĝis sur la digo.

La komandanto alparolis: “Fratoj, se Taĉmentestro Leng faras artifikon kontraŭ ni, mi iros fortranĉi lian kapon! Nun estas ankoraŭ ne tagmezo. Ni atendu kelkan tempon. Se post tagmezo la aŭtoj ankoraŭ ne alvenos, ni rekte direktos nin al Tanjiawa-vilaĝo por reguligi la kontojn kun Variolulo Leng. Unue ripozu en sorgokampoj. Mi volas, ke Douguan reiru al la vilaĝo kaj revenigu manĝaĵojn. Douguan!”

Patro levis sian vizaĝon kaj rigardis al la komandanto.

“Reiru kaj diru al via patrino, ke ŝi preparigu patkukojn, kaj alportu ilin ĉe tagmezo. Petu vian patrinon alporti la patkukojn persone.”

Kapjesinte, Patro ektiris sian pantalonon supren, enŝovis la pistolon en la zonon kaj fluge kuris malsupren de la digo. Kurinte norden iom da tempo laŭ la ŝoseo, li enŝovis sin inter sorgoplantojn kaj rapide sin direktis nordokcidenten. En la maro de sorgokampoj li trafis oblongajn kraniojn de muloj kaj ĉevaloj kaj piedbatis ilin, el kiuj elsaltis du vilaj kampmusoj kun mallonga vosto. Ili ne tre surprizite rigardis lin dum momento kaj denove sin ŝovis en la skeletojn. Ree venis al li la ekpenso pri la du nigraj mulegoj de nia familio, kaj pri la nazpika haladzo de kadavroj, kiun vilaĝanoj povis flari ĉe ekblovo de la sudorienta vento eĉ longe post la finkonstruado de la ŝoseo. Lastjare kelkdek kadavroj de muloj kaj ĉevaloj putriĝis pro trempado en herboplana malprofunda akvo de Inko-rivero. Bakate de la sunlumo, iliaj ventroj pufiĝis ĝis ekstremo kaj eksplode krevis,

tiel ke iliaj intestoj eliĝis kiel pompaj floroj kaj malhele verdaj fluidoĵ lante fluis en Inko-riveron.

## 5.

Tiun jaron, kiam Avino atingis la aĝon de dek ses jaroj, ŝia patro laŭ sia volo edzinigis ŝin al Chan Bianlang, la solfilo de Chan Tingxiu, la fama riĉulo de la Nordorienta Vilaĝo de Gaomi. Familio Chan funkciigis vinfarejon, kiu estis multe konata en ĉirkaŭaĵo de cent lioj pro tio, ke tie produktiĝis bonkvalita alkoholaĵo per sorgograjnoj je malalta prezo kiel krudaj materialoj. La situo de la Nordorienta Vilaĝo estis malalta kaj ĝi ofte estis inundita de aŭtuna pluvakvo. Ĉar sorgoplantoj kun longaj tigoj povis rezisti kontraŭ inundo, ili estis vaste plantitaj tie kaj oni ricevis bonan rikolton ĉiujare. Familio Chan profitis en vinfarado per malmultekostaj krudaj materialoj kaj fariĝis la plej riĉa en la loko. La edziniĝo de mia avino al Chan Bianlang glorigis ŝian patron. Tiutempe multaj familioj soifis ligiĝi kun familio Chan per geedziĝo, kvankam ĉirkaŭis la famo, ke Chan Bianlang jam frue suferas de lepro. Chan Tingxiu estis malgrasa kaj malalta maljunulo, kun maldika harligo ĉe malantaŭa parto de la kapo. Kvankam la ŝrankoj en lia hejmo plenplenis de mono, li ĉiam sin vestis per eluzitaj vestaĵoj kun pajlo-ŝnuro ĉirkaŭ la talio.

Fakte la edziniĝo de mia avino estis favorata de providenco. Tiutage Avino amuze ludis kun kelkaj fraŭlinoj kun vinditaj piedetoj<sup>3</sup> kaj longaj harligoj apud balancilo. Estis Festo de Mortintoj, dum kiu oni devis fari vizitojn al la tomboj de mortintoj por rememori. Persikaj arboj pompis per ruĝaj floroj kaj salikoj plene verdis, pluvetoj flirtis en aero kaj la vangoj de knabinoj belis kiel persikfloroj. Tiuj fraŭlinoj ĝuis tempon de neokupiteco. Tiujare Avino altis cent sesdek centimetrojn kaj pezis ses dek kilogramojn. Ŝi surhavis veston el flordeseignita tolo kaj verdan pantalonon el sateno, kun skarлата silka rubando ĉirkaŭ la maleolo. Pro pluvo ŝi surportis broditajn ŝuojn, kiuj estis trempitaj en aleŭrit-oleo dekkelk-foje. Kiam ŝi paŝis, la ŝuoj knare sonis. Dika kaj oleece brila harplektaĵo pendis malantaŭ ŝia kapo kaj peza arĝenta medaliono pendolis ĉirkaŭ ŝia kolo — ŝia patro estis ordinara arĝentaĵisto. Ĉar ŝia patrino estis filino de ruinigita bienulo, ŝi konis, kiel gravas paro da vinditaj piedetoj por virinoj, Avino komencis vindi siajn piedojn kaj strikti la vindiĝon tagon post tago. La vindon, kiu longis ĉirkaŭ tri jardojn, ŝia patrino uzis por vindi ŝiajn piedojn, kaj pro tio rezultis, ke ŝiaj krurosto rompiĝis kaj ok piedfingroj rompiĝe alpremiĝis al piedplatoj. Kiel tragika! Mia patrino ankaŭ havis vinditajn piedetojn. Ĉiufoje kiam mi vidis ilin, mi sentis grandan bedaŭron kaj volus krei: “For feŭdismon! Longe vivu la libereco de homaj piedoj!” Post multaj suferoj Avino sukcesis akiri perfektan paron da vinditaj piedetoj. Je la aĝo de dek ses jaroj, ŝi, jam plenkorpa kaj belaspekta, iris kun swingantaj brakoj kaj skuanta talio, kvazaŭ plorsaliko flirtanta en vento.

Tiutage Chan Tingxiu, kunportante korbon, kolektis fekaĵojn tie kaj alie en la vilaĝo de ŝia patro, kaj ĉe la unua ekvido li tuj ekŝatis Avinon inter tiuj florsimilaj knabinoj. Post tri monatoj Avino estis forportita per palankeno por edziniĝo.

En la sufoka palankeno Avino sentis kapturton. Ŝiajn okulojn kovris la ruĝa tuko sur ŝia kapo<sup>4</sup>, kiu eligis fortan ŝiman odoron. Kiam ŝi permane levis la ruĝan tukon — ŝia patrino fojerefoje

<sup>3</sup> En feŭda Ĉinio knabinoj, ekde la aĝo de kvin aŭ ses jaroj, estis postulataj vindi siajn piedojn per longa vindtuko, tiel ke iliaj piedoj deformiĝis kaj fariĝis multe pli malgrandaj ol la ordinaraj piedoj.

<sup>4</sup> Laŭ malnova moro de Ĉinio, kiam novedzino estis transportata per palankeno al la hejmo de novedzo, oni kovris ŝian kapon per ruĝa silka tuko, kiun rajtis forlevi la novedzo en la nupta ĉambro.

admonis, ke ŝi ne forlevu la ruĝan tukon —, peza tordita arĝenta braceleto glitis malsupren sur la antaŭbrakon. Je ekvido de serpentforma tordiĝo sur la braceleto ŝi fariĝis konfuzita en la koro. Varma brizo blovis inter junverdajn sorgoplantojn ĉe ambaŭ flankoj de la mallarĝa kota vojo. Alŝvebis kukuado de livioj el la sorgokampoj. Delikata poleno flirtis super la arĝentegrizaj spikoj, kiuj elŝoviĝis el sorgoplantoj antaŭ nelonge. Sur la palankena kurteno, al kiu ŝi vizaĝis, troviĝis brodaĵo de drako kaj fenikso, kaj la fona ruĝa tolo de la kurteno, vaste makulita per oleo en ĝia mezo, jam senkoloriĝis pro multajara luigado. Ĉe turniĝo de somero kaj aŭtuno la sunlumo ardis ekster la palankeno. La facilaj movoj de la palankenportistoj treme dancigis la palankenon kaj la ŝnuroj el kruda bovvelo, kiuj kunligis la stangojn de la palankeno, knare sonis. La kurteno leĝere flagris kaj enlasis radiojn de lumo kaj blovojn de pli friska zefiro. Kun ŝvito tra la korpo kaj tambure batanta koro Avino aŭskultis al egalritmaj paŝoj kaj pezaj elspiroj de la palankenportistoj. En ŝia menso alterne aperis rulŝtonece glita frostoj kaj kapsikece kruda varmego.

Ekde kiam Avino estis elektita de Chan Tingxiu, multaj homoj gratulis ŝiajn gepatrojn pro tio. Kvankam ŝi soifis vivi riĉan vivon, ŝi tamen des pli volis, ke ŝia estonta edzo estas klera, belaspekta kaj zorgema. Dum ŝi brodis siajn vestaĵojn por edziniĝo, ŝi per brodado skizis belajn bildojn pri mia estonta avo. Iam ŝi deziris edziniĝi pli frue, sed kiam ŝi aŭdis de siaj kunulinoj, ke la filo de familio Chan estas leprulo, ŝia sango glaciĝis. Ŝi plende elverŝis sian koron al siaj gepatroj, sed ŝia patro eviteme ne donis respondon kaj ŝia patrino ĵetis insultojn super ŝiajn kunulinojn, ke ili ŝajnis la vulpo, kiu nomis tion acidaj vinberoj. Poste ŝia patro diris, ke la filo de familio Chan estas pure blanka kaj impone bela ulo, kiu legas vaste klasikajojn kaj ĉiam sin tenas hejmosida. Avino falis en tian nebulecon, ke ŝi eĉ ne scias, ĉu tio estas vera aŭ ne. Ŝi nur pensis, ke ne troviĝas senkompataj gepatroj en la mondo kaj eble ŝiaj kunulinoj diris sensencaĵojn. Denove ŝi ekhavis la deziron edziniĝi pli frue. Ŝia plena juneco elradiis fortajn zorgojn kaj delikatan solecon, kaj ŝi soifis kuŝi en la brakumo de altstatura kaj fortika viro por forigi siajn zorgojn kaj solecon. Finfine ŝi treniĝis al la tago de edziniĝo. Ŝi estis metita en la palankeno de kvar portistoj. Trumpetoj kaj ŝona-oj<sup>5</sup> triste sonadis antaŭ aŭ malantaŭ la palankeno kaj ĉe tio ŝi nereteneble verŝis larmojn sur la tutan vizaĝon. En la palankeno ŝi troviĝis kvazaŭ en nuboj. La mallaboremaj trumpetistoj jam ĉesis ludi siajn instrumentojn nemalproksime de la vilaĝo kaj la portistoj plirapidigis siajn paŝojn. La odoro de sorgoplantoj penetris en la koron de homoj kaj kuriozaj birdoj en sorgokampoj ĉirpis kaj pepis melodie. Kiam radioj de sunlumo sin ĵetis en malhelan palankenon, la figuro de la edzo en ŝia koro iom post iom klariĝis. Ŝia koro ŝajnis pikita de aleno, dolorplene, profunde kaj forte.

“La Ĉielo, benu min!” La preĝo en ŝia koro elĵetiĝis el inter ŝiaj belaj lipoj. Kun tavolo da delikataj viloj super sia supra lipo, ŝi aspektis freŝa, plena de suko de la juneco. Ŝia murmuro el la buŝo estis jam tute ensorbita de dikaj vandoj kaj la kurteno de la palankeno. Ŝi deŝiris la acidodoran tukon for de la kapo kaj metis ĝin sur la genuojn. Laŭ la tradicio de edziniĝo ŝi surportis novajn vatitajn veston kaj pantalonon. En la palankeno vidiĝis tie kaj alie trivitaĵoj kaj malpuraĵoj. Ĝi ŝajnis ĉerko, en kiu sidis sennombraj novedzinoj neeviteble destinitaj por fariĝi kadavroj pro malfeliĉa edziniĝo. La subŝtofitita flava sateno sur la vandoj estis oleece malpura. Tri muŝoj flugis zumante super ŝia kapo, kaj aliaj du sidis sur la kurteno, viŝante la okulojn per siaj stangecaj kruroj. Ne plu povante elporti la sufokan aeron, ŝi ŝtele etendis sian bambuŝos-similan pintigitan piedeton, puŝis la kurtenon por formi fendeton, kaj kaŝe rigardis eksteren. Ŝi vidis la belajn kaj longajn krurojn malklare videblajn sub lozaj vestoj kaj pantalono el nigra silko kaj

---

<sup>5</sup> Ĉina muzikilo, akresona kaj forme simila al trumpeto.

dikajn piedojn en sandaloj el kanabaj fibroj. Iliaj piedoj brue levis polvon. Imagante ilian fortikan torson, ŝi plue iom levis la piedpinton kaj sin klinis antaŭen. Ŝi sukcesis vidi la glatajn palankenstangojn el amorfo (*Amorpha fruticosa*) kaj larĝajn ŝultrojn de la portistoj. Ambaŭflanke de la vojo sorgoplantoj kunpremiĝis strikte kvazaŭ kunfandiĝe. Grizverdaj sorgospikoj ankoraŭ ne malfermis siajn okulojn, apenaŭ distingeblaj unu disde la alia. Sorgokampoj etendiĝis senlime, kvazaŭ murmurantaj fluoj de la rivero. Pro mallarĝa vojo la folioj de sorgoplantoj kun sekreciaĵoj de afidoj sible frotadis la du flankojn de la palankeno.

La korpoj de la portistoj elspiris acidan odoron de ŝvito. Avino ravite enspiris la odoron de tiuj viroj. Estis certe, ke tiam ŝian koron atakis ondo kaj ondo da pasio. Kiam la portistoj pasis tra la strato, ili impone paŝis kun piedoj iom turnitaj eksteren. Tia irmaniero nomiĝis “stratotretado”. Ili faris tion, unuflanke por vekti ŝaton ĉe la kliento kaj vringi de li pli da gratifiko, kaj aliflanke por montri la elegantan konduton de la profesio. Kiam ili “stratotretis”, estis malbone farite, se ili paŝis malorde aŭ apogis siajn manojn sur la palankenstangoj. Dume la vere kapablaj portistoj paŝis bonorde kun siaj manoj ĉe talio kaj igis la ritmon de tangado de la palankeno adaptiĝi al tiu de trista kaj bela muziko ludita de trumpetistoj kaj tamburistoj, tiel ke ĉiuj rigardantoj povis senti, ke tiom da doloro kaŝiĝas malantaŭ kiom da feliĉo.

Irante sur ebenaĵo, la portistoj de la palankeno ekis agi malserioze kaj maldece por rapidigi sian paŝadon kaj samtempe turmenti la novedzinon. Iuj novedzinoj, pro troa tangado de la palankeno, faris laŭtan vomadon kaj la vomaĵoj malpurigis iliajn silkajn vestaĵojn kaj broditajn ŝuojn. Pro la vomado de novedzino, ili ĝuis la ĝojon de senbrida liberiĝo. Tiuj junaj kaj fortikaj viroj, kiuj ŝultroportis novedzinon por aliulo, kompreneble sentis korŝiron, kaj pro tio ili faris turmentojn al la novedzino.

Unu el la kvar portistoj, kiuj portis la palankenon de Avino, poste fariĝis mia avo — li estis Komandanto Yu Zhan’ao. Tiam, kiel junulo ĉirkaŭ dudek-jara, li estis la plej bona kapablulo en la Nordorienta Vilaĝo en la profesio porti ĉerkon aŭ palankenon. La junuloj de la generacio de mia avo ĉiuj posedis la frapantan karakteron de anoj de la Nordorienta Vilaĝo de Gaomi, nesupereblan de ni plijuna malforta generacio. Laŭ siatempa tradicio palankenportistoj faris nedecajn ŝercojn kun novedzino survoje, ĝuste kiel dungitoj en vinfarejo trinkis alkoholaĵon, tio estis tute senriproĉebla afero. Ili eĉ kuraĝus ĝeni la novedzinon de la Ĉiela Dio.

Folioj de sorgoplantoj sible frotadis la palankenon. Subite alŝvebis el la profundo de sorgokampoj treniĝa plorsono, kiu rompis la monotonecon sur la vojo. La plorsono tre similis la arion luditan de la trumpetistoj kaj tamburistoj. Je la ario, Avino ekpensis, ke tiuj tristaj muzikiloj certe estas tenataj en iliaj manoj. Levante la kurtenon per sia piedo, ŝi vidis la talion de portisto plenan de ŝvito. Kaj plie ŝi vidis siajn piedojn en broditaj ŝuoj, pintajn kaj mallarĝajn kun triste bela eksteraĵo. La sunlumo filtriĝinta de ekstere prilumis ilin similajn al du petaloj de lotusfloro kaj des pli al du orfiŝoj sur la fundo de klara akvo. Du ruĝetaj larmoperloj grandaj kiel sorgograjnoj elsaltis el ŝiaj okulharoj kaj fluis tra la vangojn ĝis la buŝanguloj. En ŝia koro kirliĝis tristeco kaj amareco. La figuro de la edzo bona kiel la rolo en opero, kiu sin montris eleganta kaj ŝika, kun alta ĉapelo kaj bela zono, unue krepuskiĝis kaj poste tute malaperis. Viziante la deformitan vizaĝon de leprulo Chan Bianlang, ŝi ekhavis glacian senton en la koro. Ĉu leprulo ĝuu ŝiajn paron da amindaj piedetoj kaj rozruĝan vizaĝon, kune kun ŝiaj tenereco kaj pasio? ŝi pensis. Ŝi preferis morti ol vivi tiamaniere.

La treniĝaj plorsonoj en sorgokampo estis punktitaĵoj per jena teksto: “Ho, la verda ĉielo... Ho, la blua ĉielo... Ho, la kolorriĉa ĉielo... Ho, la ligna batilo... Ho, mia samsanga frato, vi mortis... Ho,

vi faligis la ĉielon de via fratino...

Mi devas diri al vi, ke la virinoj de nia Nordorienta Vilaĝo de Gaomi funebre ploras tiel bele kiel ili kantas. En 1912, la unua jaro de la Respubliko, la profesiaj funebrantoj el Qufu, la hejmloko de Konfuceo, speciale venis ĉi tien por lerni la teknikojn de plorado.

En tia ĝojiga tago, dum kiu vidvino funebre priploris sian mortintan edzon, Avino konsideris tion omeno kaj ŝia peza sento fariĝis ankoraŭ pli peza.

Tiam portisto malfermis sian buŝon: “Novedzineto en la palankeno, diru kelkajn vortojn al ni viaj fratoj! Longa vojirado morte enuigas nin.”

Avino tuj prenis la ruĝan tukon kaj remetis ĝin sur la kapon. Ankaŭ la piedetojn, kiuj subtenis la kurtenon, ŝi kaŝe retiris. Inka mallumo denove regis en la palankeno.

“Kantu arion al ni viaj fratoj. Ni portas la palankenon por vi!”

Kvazaŭ vekiginte el sonĝo, la trumpetistoj kaj tamburistoj forte ludis instrumentojn. La trumpetoj muĝe sonis “mu-dong-mu-dong”. Iu antaŭ la palankeno eligis “meng-tong-meng-tong” (tiuj ĉinaj vortoj signifas “forte ŝovu ĝin en ŝin”), imitante la trumpetsonojn kaj tio vekis krudajn ridojn antaŭ kaj malantaŭ la palankeno.

Avino jam plenis de ŝvito tra la korpo. Antaŭ ol ŝi suriris en la palankenon, ŝia patrino fojerefoje admonis al ŝi, ke ŝi ne buŝe batalu kontraŭ tiuj portistoj kaj trumpetistoj dumvoje, ĉar ili ĉiuj, malvirtaj kaj ruze strangaj, povas fari ajnajn malbonojn.

La portistoj plenforte skuadis la palankenon. Avino ne povis sidi stabile kaj ŝi firme tenis la tabulon de la sidloko per ambaŭ manoj.

“Ne eligi voĉon? Ni skuu! Se ni ne povas elskui ŝiajn parolon, ni elskuu ŝian urinon!”

La palankeno ŝajnis boato en vento kaj ondoj. Ŝi firme tenis la tabulon. La du ovojn, kiujn ŝi manĝis kiel matenmanĝon, turniĝadis en ŝia ventro. Muŝoj zume flirtis ĉe ŝiaj oreloj. Ŝia gorĝo streĉiĝis. Laodoro de la ovojn jam sin ĵetis al la buŝkavo. Ŝi kunpremis siajn lipojn. Nepre ne elvomu, ne elvomu! Ŝi ordonis al si: “Ne elvomu, Fenglian. Oni diras, ke elĵeti vomajon en la palankenon naskas grandan malfeliĉon kaj alportos dumvivan malbonŝancon...”

La portistoj diris pli krudajn vortojn. Iu el ili insultis, ke ŝia patro estas malnobla homo avida je mono, la alia diris, ke ŝi ŝajnas freŝa floro enŝovita en bovfekaĵo, kaj la tria asertis, ke Chan Bianlang estas leprulo, el kies korpo fluas blanka puso kaj flava likvaĵo. Ili konfirmis, ke starante ekster la korto de familio Chan, oni povas flari malbonodoron de putriĝinta karno, kaj en la korto de la familio flirtas aroj da verdkapaj muŝoj...

“Novedzineto, ne lasu Chan Bianlang aglui sian korpon al vi, alie via korpo putriĝos!”

Kiam oni blovis trumpetojn kaj ŝona-ojn per treniĝa tono, la pikaodoro de la ovojn plifortiĝis, tiel ke Avino prenis sian malsupran lipon per la dentojn. Ŝajnis, ke pugno batis ŝin en ŝia gorĝo. Ŝi ne plu sin tenis. Tuj kiam ŝi malfermis sian buŝon, vomajo abrupte ŝprucis kaj malpurigis la kurtenon de la palankeno. La kvin muŝoj kugle pafiĝis sur la vomajon.

“Ŝi vomis, ŝi vomis. Ni daŭre skuu!” furioze kriis la portistoj. “Ni skuu ĝis ŝi malfermos sian buŝon por paroli.”

“Indulgu min... grandaj fratoj...” ŝi suferplene petis en ruktado. Post tio ŝi ekploris plengorĝe. Mistraktite, ŝi sentis, ke ŝia estonteco plenas je danĝeroj kaj malfacilas por ŝi elturniĝi el la maro de amareco. Ho, paĉjo, ho, panjo, monavidema paĉjo, senkompata panjo, vi ruinigis min.

La plengorĝa plorado de Avino vibrigis sorgoplantojn. La portistoj ĉesis furioze skui la palankenon kaj ankaŭ la ĝenantaj muzikistoj maldaŭrigis ludadon. Aŭdiĝis nur ŝia plorsingultado. Kaj aldoniĝis tristaj sonoj de malgranda ŝona-o, kies plora tono estis pli bela ol tiu de ĉiuj virinoj.



En ŝona-a muziko ŝi ĉesis plori kaj aŭskultis la muzikon kvazaŭ el la ĉielo. Kun velkinte pudrita vizaĝo makulita per larmgutoj, ŝi, en la trista ario, aŭdis la voĉon de la morto, flaris la odoron de la morto kaj vidis la sorgospike skarlatajn lipojn kaj la maizgrajne orflavan ridetantan vizaĝon de la morto.

Senvortaj, la portistoj faris pezajn paŝojn. La plorado de la novedzino en la palankeno kaj la akompananta ludado de la ŝona-o malantaŭ la palankeno jam dronigis ilin en grandan malbonhumoron. Ŝajne tiuj ĉi homoj irantaj sur la vojo inter sorgoplantoj jam ne plu estis la homvico por eskorti la novedzinon, sed la funebra procesio. Tuj ĉe la piedo de mia avino la portisto Yu Zhan'ao, kiu poste fariĝis mia avo, interne naskis neordinaran antaŭsenton, kiu, kiel arde brulanta fajro, prilumis lian estontan vojon. La plorado de Avino vekis ĉe li la amemon longe kaŝitan en lia korfundo.

Dumvoje la portistoj faris ripozon kaj demetis la palankenon sur la teron. Pro plorado la kapturnigita Avino senkonscie etendis sian piedeton eksteren de la palankeno. La delikata kaj bela piedeto fascinis la portistojn. Yu Zhan'ao aliris, malpeze prenis ĝin, kiel birdeton sen plena plumaro, kaj remetis ĝin en la palankenon. Emociite pro la tenereco, ŝi tre volis flankenmovi la kurtenon por vidi, kiu estas la juna portisto kun tiel varma manego.

Laŭ mia opinio, tio nekritikeble veras, ke la geedziĝo estas destinita de la Ĉielo per nevidebla fadeno. Ĝuste pro tio, ke Yu Zhan'ao ekprenis ŝian piedeton, la inspiro al la nova vivo vekigis en lia koro. De tiu momento tio tute ŝanĝis kiel lian vivon, tiel ankaŭ ŝian vivon.

Denove la palankenon la portistoj surŝultrigis. La trumpeto eligis longan treniĝan jelpon kiel simio, kaj tute ĉesis soni. Leviĝis vento el nordoriento. Nuboj sur la ĉielo amase kolektiĝis kaj ŝirmis la sunon. En la palankeno pli malheliĝis. Avino aŭdis, ke la vento frapas sorgoplantojn unuj post aliaj ĝis ĝi iras malproksimen. En la nordoriento aŭdiĝis tondra bruoj. La portistoj plirapidigis siajn paŝojn. Kiel longe ŝi distancas de familio Chan, ŝi ne sciis. Kiel ligita ŝafido, ŝi ju pli proksimis al la morto, ŝi des pli kvietiĝis. Ŝi jam kaŝis akran tondilon en la sinon, preparitan eble por Chan Bianlang, eble por si mem.

La evento pri prirabado al Avino ĉe la Bufa Malaltejo okupas gravan lokon en la historio de nia familio. La Bufa Malaltejo estis la plej granda vastejo el malaltaĵoj, kun plej fekunda grundo kaj plej sufiĉa akvoprovizo, kaj tie sorgoplantoj kreskis plej dense. Kiam la palankeno de Avino atingis tien, sangoruĝa fulmo tranĉis la nordorientan ĉielon, kaj abrikot-flava fragmenta rubando da sunlumo disŝiris la densan nubon kaj sin ĵetis al la vojo. La portistoj baniĝis en varma ŝvito, anhelante. En la Bufa Malaltejo regis peza aero. Sorgoplantoj ambaŭflanke de la vojo ebene briletis, densaj kaj senlimaj. Sovaĝaj herboj kaj floroj tiel prosperis, ke ili preskaŭ obstrukcis la vojon. Tiom da cejanoj kun purpuraj, bluaj, rozaj aŭ blankaj floroj alte etendis siajn maldikajn tigojn en herbaĉoj. En la profundo de sorgoplantoj aŭdiĝis ĉagrena kvakado de ranoj, trista ĉirpado de griloj kaj melankolia hurlado de vulpoj. En la palankeno subite frostoj atakis Avinon, kiu iom anserhaŭtiĝis. Antaŭ ol kompreni, kio okazis, ŝi aŭdis ulon antaŭ la palankeno laŭte krei: "Restigu monon por trapasi la vojon!"

Ŝi perdis unu korbatojn. Ĉu malfeliĉo aŭ feliĉo? Ho, la Ĉielo. Ŝi pensis, ke ili renkontas la homojn, kiuj vivas de patkukoj!

En la Nordorienta Vilaĝo de Gaomi banditoj multas kiel haroj. Ili neatendite aperis kaj malaperis kiel naĝantaj fiŝoj en sorgokampoj. Grupiĝinte en bandoj, ili rabis mulojn aŭ kidnapis homojn, faris ĉiajn ajn malbonojn aŭ konspiris kontraŭ ĉiuj bonaferoj. Kiam ili malsatis, ili kidnapis du homojn, retenis unu kaj liberigis la alian, por ke tiu reiru al la vilaĝo kaj preparu

patkukojn longajn je du spanoj volvitajn kun omleto kaj tubajlo interne, por liberigi la retenitan homon. Pro tio tiuj banditoj estis nomitaj homoj, kiuj vivas de patkukoj.

“Restigu monon por trapasi la vojon!” laŭte kriis la homo kiu vivas de patkukoj. La portistoj haltis kaj gapis al la bandito kun du kruroj plantitaj sur la vojo. La bandito, kun malalta staturo, havis la vizaĝon ŝmiritan per fulgo, surportis ĉapelon el sorgotigoj sur la kapo kaj lozan pluvmantelon el pajloj. El la vaste malbutonumita mantelo vidiĝis nigra vesto kun kompakte aranĝitaj butontruoj kaj larĝa zono ĉirkaŭ la talio. Ĉe la zono estis enŝovita pufiĝanta objekto pakita per ruĝa silka tuko. Li premis tiun pakaĵon per unu mano.

Penso trakuris la menson de Avino, ke estas nenio timinda. Se ŝi ne timas morton, kion alian ŝi timas? Levinte la kurtenon de la palankeno, ŝi direktis sian rigardon al la homo, kiu vivas de patkukoj.

Refoje li kriis: “Restigu monon por trapasi la vojon! Alie mi pafmortigos vin!” Kaj li frapetis la objekton pakitan per ruĝa tuko ĉe la zono.

Elpoŝiginte la grapolojn da moneroj, per kiuj la patro de Avino gratifikis ilin, la trumpetistoj ĵetis ilin ĉe la piedojn de tiu ulo. Kaj la portistoj demetis la palankenon kaj elpoŝiginte monerojn, ili ankaŭ ĵetis ilin sur la teron.

Kolektinte per la piedo la grapolojn de moneroj en amason, la ulo fiksrigardis Avinon sidantan en la palankeno.

“Vi ĉiuj, iru malantaŭ la palankenon, alie mi pafos!” li laŭte kriis, frapetante la objekton ĉe la zono.

La portistoj malrapide iris malantaŭ la palankenon. Yu Zhan’ao iris ĉe la vosto de la homvico. Li abrupte sin turnis kaj premis la ulon per sia rigardo. Tiu tuj ŝanĝis sian mienon. Firme premante la pakaĵon en ruĝa tuko, li akutvoĉe kriis: “Ne returnu vian kapon. Se vi returnos vian vizaĝon refoje, mi pafmortigos vin!”

Kun la mano premanta la objekton ĉe la zono, la ulo trenis siajn paŝojn antaŭ la palankenon kaj permane knedis la piedeton de Avino. Ŝi ekridetis kaj li tuj retiris sian manon, kvazaŭ brogite.

“Malsupreniru kaj sekvu min!” li diris.

Avino rekte sidis senmove, kaj la rideto sur ŝia vizaĝo kvazaŭ glaciigis.

“Malsupreniru!”

Avino stariĝis kun klinita korpo, senĝene transpasis la palankenstangon kaj staris en la pompaj cejanoj. Ŝi rigardis la ulon per la dekstra okulo kaj la portistojn kaj trumpetistojn per la maldekstra.

“Eniru la sorgokampon!” diris la rabanto, premante la objekton volvitan per ruĝa tolo ĉe la zono.

Ŝi staris en trankvila maniero. La fulmo en nubo vibris kun metalaj sonoj kaj dispecigis ŝian rideton sur la vizaĝo en sennombrajn fragmentojn.

La ulo devigis ŝin iri en sorgokampon, ĉiam premante la pakaĵon ĉe la zono.

Ŝi rigardis Yu Zhan’ao-n per ekscititaj okuloj.

Yu rekte iris al la rabanto. Li rezolute streĉis siajn maldikajn lipojn kiel linion, kun unu lipo turnita supren kaj la alia falinta malsupren.

“Haltu!” kriis malvigle la rabanto, “Se vi faros unu paŝon antaŭen, mi pafos!” Li premis sian manon sur la umon volvitan per ruĝa tolo ĉe sia zono.

Yu trankvile iris renkonte kontraŭ li. Kiam li faris paŝon antaŭen, la rabanto iom retroiris. Verdaj sparkoj ŝajnis elsalti el ties okuloj kaj fluoj da kristalaj ŝviteroj panike eksudis el ties

vizaĝo. Kiam Yu distancis de li tri paŝojn, tiu honteme eligis ekkrion kaj sin turnis por forkuri. Yu sin ĵetis antaŭen kaj facile donis piedbaton al lia pugo. La rabanto elflugis horizontale, tanĝante per sia korpo herbopintojn kaj cejanflorojn, grate svingis siajn manojn kaj piedojn en malalta aero kiel naiva bebo, kaj fine falis inter sorgoplantojn.

“Ŝparu mian vivon, vera bravulo! Mi havas okdek-jaran patrion en la hejmo, kaj mi devigite faras tion por gajni mian panon,” la rabanto lerte kriis al Yu.

Kaptante lian nukon, Yu trenis lin antaŭ la palankenon, forte ĵetis lin sur la vojon kaj piedbatis lian senĉese kriantan buŝon. Tiu eligis tragikan ŝrikon, kaj sango jam elfluis el lia nazo antaŭ ol lia ŝriko finiĝis.

Klininte sian korpon, Yu eltiris la umon el lia zono, deŝiris la ruĝan tolon de sur ĝi kaj vidigis kurban arbostumpeton. Ĉiuj eligis surprizan elspiron.

La ulo tuj falis sur genuojn kaj ripetade frapis sian kapon kontraŭ la teron por peti indulgon.

“Ĉiuj rabantoj diras, ke ili havas okdek-jaran patrion hejme,” Yu diris.

Yu flankeniris kaj rigardis la portistojn kaj trumpetistojn, kvazaŭ gvida hundo gapus al la aliaj hundoj.

Je ekkrio ili svarmis al la ulo de ĉirkaŭe kaj batadis lin per siaj manoj aŭ piedoj. Komence aŭdiĝis liaj akutvoĉaj plorkrioj kaj poste nenia voĉo el li. Avino staris ĉe la vojrande. Aŭdinte obtuzajn sonojn de frapado al karno, ŝi ĵetis rigardon al Yu Zhan'ao kaj poste levis sian kapon al fulmoj ĉe horizonto. Sur ŝia vizaĝo ankoraŭ fiksiĝis la rideto disflora, ora kaj nobla.

Trumpetisto eksvingis trumpeteton kaj forte hakis la ulon per ĝi je la mezo de lia frunto. La randa rando de la trumpetbuŝo estis enhakita en lian kranion kaj eltiriĝis post granda fortostreĉo. Aŭdiĝis gluglado en la ventro de la rabanto kaj lia spasmana korpo malstreĉite sterniĝis mola laŭ la tuta longo. Fluidaĵo ruĝe kaj blanke miksis elŝoviĝis malrapide el la profunda fendeto sur la kranio.

“Ĉu li mortis?” demandis la trumpetisto, kun la kaviĝinta trumpeto en la mano.

“Li mortis. Tiu bastardo, li eĉ ne elportis tian frapadon!”

La trumpetistoj kaj tamburistoj paliĝis, kun maltrankvila mieno.

Senparola, Yu direktis siajn okulojn al la mortinto kaj poste al la vivantoj. Deŝirinte folion de sorgoplanto, li forviŝis la malpuran vomaĵon de Avino en la palankeno. Li levis la arbostrumpeton por iom ĝin ekzameni, volvis ĝin per ruĝa tolpeco kelkfoje kaj plenforte ĝin ĵetis en la aeron. Dum flugado antaŭis la arbostumpeto kaj sekvis la ruĝa tolpeco, kiu, kiel granda skarлата papilio, falis sur la verdan sorgoplanton.

Yu helpis Avinon eniri la palankenon kaj diris: “Tuj pluvos. Ni rapidu!”

Deŝirinte la kurtenon, ŝi enŝovis ĝin en la angulon de la palankeno, por ke ŝi povu libere enspiri la aeron kaj vidi liajn larĝajn ŝultrojn kaj maldikan talion. Li troviĝis tiel proksime al la palankeno, ke, se nur Avino iom levus sian piedon, ŝi povus tuŝi per sia piedo lian lividan kaj streĉitan haŭton de la razita kapo.

Vento forte blovis sibilante. Sorgoplantoj puŝis sorgoplantojn, kiel ondoj pelis ondojn. La sorgoplantoj ĉe unu flanko de la vojo sin klinis kvazaŭ saluti Avinon. Kvankam la portistoj rapidis per grandaj paŝoj, la palankeno veturis eksterordinare stabile, kiel boato rapide glitanta sur ondoj. Ranoj ĝojplene kvakadis por bonvenigi la tuj venontan pluvon de la profunda somero. La malalte pendanta vualo de la ĉielo sombre gapis al la arĝentegrizaj vizaĝoj de sorgoplantoj. Sangoruĝaj fulmoj krevis unu post alia super sorgoplantoj, en akompano de surdigaj eksplodoj de tondrado. Kun ekscitiĝo en la koro Avino sentime rigardis la verdajn ondojn levitajn de nigraj ventoj. Sonoj

en nuboj muelile alproksimiĝis en tumultaj ventblovoj. Sorgoplantoj skuiĝis ĉiudirekten kaj kaŭzis grandan malordon al la kampoj. La unuaj minacaj pluvgutoj frape tremigis sorgoplantojn, susurigis herbojn, disbatis la ĵus buliĝantan polvon sur la vojo, tamburis la tegmenton de la palankeno, frapis la broditajn ŝuojn de Avino, draŝis la kapon de Yu Zhan'ao kaj oblikve resalte batis ŝian vizaĝon.

Yu kaj aliaj rapide kuradis, kiel leporoj, sed ili ne povis fuĝi el la tondra ekpluvego antaŭ tagmezo. La pluvego batfaligis sennombrajn sorgoplantojn. En la pluva orgio ranoj ŝirmis sin ĉe la radikoj de sorgoplantoj, plaŭde tremigante la blankan haŭton malsupre de siaj makzeloj, vulpoj kaŭris en malhelaj truoj, observante akvogutetojn disŝprucatajn el de sorgoplantoj, la vojo tuj fariĝis kota kaj glitiga, herbaĉoj sterniĝis sur la grundo, kaj cejanoj klarmense etendis sian malsekan kapon. La nigraj lozaj pantalonoj de la portistoj strikte gluiĝis al la haŭto, tiel ke ili aspektis glate kaj svelte. La razita kapo de Yu Zhan'ao estis lavita pura kaj brila, kvazaŭ brilanta plenluno en la okuloj de Avino. Ŝiaj vestaĵoj tramalsekiĝis de pluvo. Ŝi povus pendigi la kurtenon por ŝirmi sin kontraŭ la pluvo, sed ŝi ne ĝin pendigis kaj ŝi ne volis ĝin pendigi, ĉar ŝi volis, tra la larĝe malfermita pordo de la palankeno, rigardi la grandiozan mondon en maltrankvileco kaj tumulto.

## 6.

Dispuŝante sorgoplantojn, Patro ŝovis sian vojon tiel rapide kiel li povis, al la nordokcidenta direkto, la direkto de nia vilaĝo. Sablomelo mallerte fuĝis laŭ la sulko en sorgokampo, sed li donis nenian atenton al ĝi. Kiam li suriris la kotan vojon, pro manko de malhelpo de sorgoplantoj, li kuris tiel rapide kiel leporo. La peza Browning-pistolo tiris malsupren lian zonon el ruĝa tolo kiel lunarkon kaj ĝi balance frapiĝis kontraŭ lian postaĵon. En la pika sufero li sentis sin vera viro rajdanta ĉevalon kun glavo en la mano. La vilaĝo jam videblis kaj la centjara ginko-arbo kun verdaj folioj en prospero solene atendis lin. Li eltiris la pistolon kaj levis ĝin alten en la mano. Kurante, li celis per ĝi la birdojn elegante glitantajn sur la ĉielo.

Sur la strato vidiĝis neniuj signoj de homoj. Mulo lama kaj blinda, ligita al angulo de argila muro kun mortero deskvamiĝinta, senmove staris kun pendanta kapo. Sur la ŝtonmuelilo sub la libera ĉielo staris du malhelbluaj korvoj. La vilaĝanoj ĉiuj kolektiĝis sur la kota placo antaŭ la vinfarejo de nia familio. Iam sur la placo plene amasiĝis skarlataj sorgograjnoj aĉetitaj de nia familio. Tiam kun blanka ĉevalvosta polvoforigilo en la mano Avino malrapide movis siajn piedetojn sur la placo. Kiam ŝi rigardis la ebriajn dungitojn aĉetkolekti sorgograjnojn per ligna mezurilo, ŝia vizaĝo farbiĝis per lumanta matenruĝo. Nun la homoj sur la placo staris vizaĝe al sudorienta direkto kaj pretis aŭdi pafojn, kiuj ĉiumomente alŝvebos. Kelkaj buboj de pli-malpli sama aĝo de Patro, kvankam emaj petoli, ne kuraĝis fari petolaĵojn.

En la placon enkuris el malsamaj direktoj Patro kaj Sun la Kvina, kiu senhaŭtigis Avon Arhato per tranĉilo lastjare. Post kiam Sun la Kvina faris senhaŭtigon, lin trafis mensa malordo: li senĉese svingadis manojn kaj piedojn, li ekhavis rigide gapantajn okulojn, tiko vidiĝis sur liaj vangoj, li deliris de tempo al tempo, el lia buŝo elfluis blankaj ŝaŭmoj kaj subite falis sur genuojn, kriante, “Granda frato, granda frato, granda frato, lia japana moŝto ordonis al mi fari tion, mi ne kuraĝis ne agi tiamaniere... Post via morto, vi ascendos al la ĉielo, rajdos sur blanka ĉevalo kun ĉizita selo, surportos robon kun desegnaĵo de boao kaj svingos oran vipon...” Vidinte lin en tia stato, la vilaĝanoj kovis malpli da malamo kontraŭ li. Post kelkaj monatoj al lia malsana stato aldoniĝis aliaj simptomoj: post kiam li kriadis dum kelka tempo, liaj okuloj kaj buŝo subite oblikvis, nazmuko kaj bavo plene elfluis kaj li ne povis elparoli klare. La vilaĝanoj asertis, ke tio estas karmo falanta el la ĉielo.

Tenante Browning-pistolon en la mano, Patro enkuris anhele, kun la verto plene kovrita de blankaj kaj ruĝaj poleneroj de sorgospikoj. Dume Sun la Kvina, ĉifone vestita kaj sulkoplana je la ventro, lamis en la placon per rigide malmola maldekstra kruro kaj mola dekstra, sed neniuj donis atenton al li. Ĉiuj direktis sian rigardon al Patro, mia vigloplena patro.

Al li aliris Avino, kiu, ĵus atinginte la aĝon de tridek jaroj, portis hartuberon kaj harfranĝojn, kvazaŭ maldensan vualon sur sia brilanta frunto. Ŝi ĉiam tenis siajn okulojn akvobrilaj kaj viglaj. Oni diris, ke la fumo en preparado de alkoholaĵo el sorgograjnoj igis siajn okulojn tiaj. Post dek kvin jaroj da amaj aventuroj tra ventpluvoj Avino jam fariĝis el virgino seksalloga virino.

“Kio okazis?” Avino demandis.

Spiregante, Patro enŝovis la pistolon en la zonon.

“Ĉu japanaj diabloj ne alvenis?” ŝi demandis.

“Taĉmentestro Leng, tiu hundido, ni ne indulgos lin!” diris Patro.

“Kio okazis do?”

“Preparu patkukojn.”

“Sed mi ankoraŭ ne aŭdis pafadon!” diris Avino.

“Preparu patkukojn. Aldonu pli da omleto kaj tubajlo,” diris Patro.

“Japanaj diabloj ne alvenis, ĉu?” demandis Avino.

“La komandanto ordonas, ke oni preparu patkukojn kaj vi persone kunportu ilin!”

Avino diris: “Vilaĝanoj, reiru pretigi patkukojn.”

Apenaŭ Patro sin turnis por forkuri, Avino tiris lin per mano. Ŝi demandis: “Douguan, diru al mi. Kio pri Taĉmentestro Leng?”

Liberiginte sin el ŝia mano, li kolere diris: “Ni vidis nenian signon de Taĉmentestro Leng. Komandanto Yu ne donos indulgon al ili.”

Patro forkuris. Okule sekvante lian maldikan kaj malaltan dorsfiguron, ŝi eligis suspiron. Sur la malplena placo Sun la Kvina, starante oblikve, rigide rigardis ŝin kaj gestadis per manoj al ŝi, kun salivo elfluanta el la buŝo.

Ignorante lin, ŝi iris al la knabino kun longa vizaĝo, kiu apogis sin kontraŭ la muro. La knabino ridklukis al ŝi. Kiam Avino aliris antaŭ ŝin, tiu subite kaŭriĝis kaj akutvoĉe ekploris, stringante la pantalonalion per ambaŭ manoj. El ŝiaj profundaj okuloj saltetis sparkoj de stulta frenezeco.

Karesante ŝian vizaĝon, Avino konsolis: “Lingzi, bona infano, ne timu.”

Tiam Lingzi, deksep-jara, estis la plej bela knabino en nia vilaĝo. Kiam Komandanto Yu komencis varbi siajn homojn kaj kolektis pli ol kvindek homojn en sian trupon, en tiuj varbitoj troviĝis malgrasa pala junulo kun longaj haroj, vestita en nigra uniformo kaj blankaj ledŝuoj. Laŭdire Lingzi korinklinis al li. Li parolis kun bela akĉento de Pekino kaj neniam ridetis. Tuttage liaj brovoj strikte kuntiriĝis kaj tri vertikalaj sulkoj montriĝis inter liaj brovoj. Oni nomis lin Adjutanto Ren. Ŝi sentis, ke sub lia malvarma kaj bela eksteraĵo brulas ardanta varmo kaj igas ŝin sidi kvazaŭ sur la flamo. Tiam la trupo de Komandanto Yu ĉiumatene ekzercis sin per marŝado sur la placo de nia familio destinita por aĉetkolekti sorgograjnojn. Liu Sishan, kiu antaŭe estis trumpetisto por geedziĝa kaj funebra ceremonioj, rolis kiel klarionisto de la trupo, kun trumpeto kiel militista klariono. Ĉiufoje antaŭ ekzercado Liu klarionis kolektiĝon. Tuj kiam ŝi aŭdis klarionadon, ŝi vente elrapidis el la hejmo, kuris al la rando de la placo kaj ventrokuŝigis sin sur kotan muron, atendante rigardi Adjutanton Ren, kiu kiel militinstruisto, zonis sin per larĝa bovleda rubando kun Browning-pistolo pendanta sur ĝi.

Kun elstarigita brusto kaj retirita ventro li paŝis antaŭ la trupon. Je lia ordono “Atent!”, du linioj da trupanoj forte kunfrapiĝis per ambaŭ kalkanoj.

La adjutanto instrukciis: “Je la ordono ‘Atent!’ vi devas streĉi viajn krurojn, retiri la ventron, elstarigi la bruston kaj larĝigi la okulojn, kiel la hommanĝonta leopardo.”

“Kiel vi pozas!” dirante, li piedbatis Wang Wenyi. “Via pozo kun duonkaŭrantaj gamboj ĝuste similas mulon pisantan. Eĉ se mi batus vin, vi ne povus bone pozi.”

Lingzi ŝatis rigardi Adjutanton Ren bati sian homon kaj aŭdi lin sakri al sia subulo. Lia despota konduto ŝin multe ravis. Kiam li estis libera, li ofte promenis sur la placo de nia familio, kun krucitaj manoj malantaŭ la dorso, kaj ŝi kaŝe rigardis lin malantaŭ la muro.

“Kiel vi nomiĝas?” demandis Adjutanto Ren.

“Lingzi.”

“Kion vi rigardis, kaŝante vin malantaŭ la muro?”

“Jen vin.”

“Ĉu vi scipovas legi?”

“Ne.”

“Ĉu vi volas soldatiĝi?”

“Ne.”

“Ho, vi ne volas.”

Poste ŝi sentis penton. Ŝi diris al mia patro, ke se Adjutanto Ren demandos ŝin refoje, ŝi respondos, ke ŝi volas soldatiĝi. Sed li ne demandis al ŝi la duan fojon.

Ventrokuŝante sur la mursupro, Lingzi kaj mia patro rigardis Adjutanton Ren instrui al siaj homoj revoluciajn kantojn. Patro estis tiel malaltkreska, ke li metis tri adobojn sub siajn piedojn por klare vidi, kio okazas trans la muro, dum Lingzi, apogante sian delikate belan mentonon sur la kota muro, fiksrigardis Adjutanton Ren banatan en matenuĝo. Li instruis al la trupanoj kanti: *“Sorgospikoj ruĝas, sorgospikoj ruĝas, la japanaj diabloj alvenas, la japanaj diabloj alvenas. Nia lando estas konkerita, nia familio ruinigita. Leviĝu, niaj samlandanoj. Prenu glavon kaj pafilon. Batalu kontraŭ diabloj kaj defendu nian landon...”*

La trupanoj havis mallertan langon kaj ĉiam kantis per malĝusta tono, dum la infanoj, kiuj surventre kuŝis sur la mursupro, jam batis la kanttekston en sian kapon. Antaŭ sia morto Patro ankoraŭ parkere memoris la muzikon kaj tekston de la kanto.

Iutage knabino Lingzi riskis serĉi Adjutanton Ren, sed ŝi misvadis en la ĉambron de provizanta sekciestro Dentego Yu, drinkema kaj avidema je mono kaj virinoj, kiu estis la pli-ol-kvardek-jara onklo de Komandanto Yu. Tiutage li jam preskaŭ ebriiĝis. Kiam Lingzi enstrudiĝis en lian ĉambron, tio estis ĝuste kiel noktopapilio sinĵetanta al lampoflamo aŭ ŝafo mispaŝanta en la kavernon de tigro.

Adjutanto Ren ordonis al kelkaj trupanoj ligi Dentegon Yu, kiu seksatencis la knabinon.

Tiam Komandanto Yu loĝis en nia domo. Kiam Adjutanto Ren iris raporti tion al li, li ankoraŭ dormis sur la terlito de Avino. Post tualetado Avino apenaŭ pretis friti kelkajn haringojn kiel almanĝaĵon al vintrinkado, kiam Adjutanto Ren kolerplene ensturmis, kio timigis ŝin.

“Kie estas la komandanto?” li demandis.

“Li dormas en la terlito,” ŝi respondis.

“Ellitigu lin.”

Avino vekis Komandanton Yu.

Kun dormemaj okuloj, la komandanto etendis sin kaj oscedis. Li demandis: “Kian aferon vi havas?”

“Komandanto,” demandis Adjutanto Ren, “se japanoj perfortas niajn fratinojn, ĉu ili meritas mortpunon?”

“Jes ja!” la komandanto respondis.

“Komandanto, se ĉinoj perfortas niajn fratinojn, ĉu ankaŭ ili meritas mortpunon?”

“Jes ja!”

“Bone, Komandanto, mi atendas vian jeson,” Adjutanto Ren diris, “Dentego Yu seksatencis knabinon Cao Lingzi. Mi jam ordonis lin ligi.”

“Ĉu okazis tia afero?” demandis la komandanto.

“Kiam ni pafmortigos lin, Komandanto?”

Eliginte rukton, la komandanto diris: “Ne estas grava afero kuŝi kun virino, ĉu?”

“Eĉ princo agas kontraŭ la leĝo, kaj li devas meriti la saman punon!”

“Kian krimon vi imputas al li?” demandis la komandanto kun malhela mieno.

“Mortpunon!” diris senhezite la adjutanto.

La komandanto snufis. Li paŝadis tien kaj reen kun kolera mieno. Poste li trudis rideton kaj diris: “Adjutanto Ren, doni al li kvindek vipbatojn en publiko kaj kompensi al la familio de Lingzi dudek arĝentajn dolarojn, ĉu tio decas?”

“Ĉu vi tion decidus, nur pro tio, ke li estas via propra onklo?” la adjutanto acerbe demandis.

“Donu al li okdek vipbatojn kaj punu lin per edziĝo al Lingzi. Ankaŭ mi rekonos, ke ŝi estas mia onklino!”

Adjutanto Ren malligis sian zonon kun la Browning-pistolo kaj ĵetis ĝin en la sinon de la komandanto. Riverencinte kun kunmetitaj manoj, li diris: “Faru tion laŭ via bontrovo, Komandanto!”

Li grandpaŝe eliris el la korto de nia familio.

Kun la pistolo en la mano, Komandanto Yu rigardis lian dorsofiguron, dirante el inter la kunpremitaj dentoj: “Mil diabloj prenu vin! Vi pedanto volas regi min. Mi jam manĝis patkukojn dek jarojn kiel bandito. Neniu kuraĝas agi tiel arogante kontraŭ mi.”

“Zhan’ao,” Avino diris, “ne lasu Adjutanton Ren for. Estas facile kolekti mil soldatojn, sed malfacile akiri kapablan generalon.”

“Kion vi scias, vi virino!” kriis la komandanto ĉagrenite.

“Mi pensis, ke vi estas bravulo, sed vi estas eĉ sentaŭgulo,” diris Avino.

La komandanto ŝargis la pistolon kaj minacis: “Ĉu vi ne volas vivi plu?”

Ŝi ŝirmalfermis sian korsaĵon kaj montris sian pastecan bruston. Ŝi defiis: “Donu pafon al mi!”

Patro laŭte kriis, “Panjo!” kaj ĵetis sin en la sinon de Avino.

Kiam li rigardis la regule rondan kapon de Patro kaj la belan vizaĝon de Avino, lin atakis svarmo da okazintaĵoj en lia koro. Kun vesuspiro, li retiris la pistolon kaj diris: “Butonumu vian veston!” Post tio li prenis la vipon kaj eniris en la korton. Li malligis de la fosto la fajnan brunan poneon. Sen selo li rajdis sur ĝi kaj trotis al la ekzercejo.

Kiam la trupanoj, kiuj inerte apogis sin kontraŭ la muro, vidis la komandanton alrajdi, ili tuj rekte stariĝis en plena atento senparolaj.

Dentego Yu estis alligita al arbo, kun la manoj ŝnuritaj.

Deĉevaliĝinte, Komandanto Yu aliris antaŭ lin: “Ĉu vi vere faris tion?”

“Malligu min, Ao-ĉjo! Mi ne plu volas servi al vi!” diris Dentego Yu.

La trupanoj gapis per rondigitaj okuloj al la komandanto.

“Oĉjo,” diris la komandanto, “mi volas pafmortigi vin.”

Dentego Yu kriis: “Bastardo, ĉu vi volas pafmortigi vian propran onklon? Pensu pri mia favoro al vi. Via patro mortis jam frue, kaj mi, via onklo, perlaboris por vivteni vin kaj vian patrinon. Se ne estus mi, vi jam fariĝus manĝaĵo de hundo!”

Je eklevo de la vipo la komandanto vipbatis lian vizaĝon, sakrante: “Vi senhontulo!”

Kaj post tio, genuiĝinte, la komandanto diris: “Oĉjo, mi neniam forgesos vian favoron vivteni min. Post via morto mi surportos funebran veston por vi kaj faros oferadon ĉe via tombo en ĉiuj festoj.”

Surĉevaliĝinte, la komandanto donis vipbaton al la postaĵo de la ĉevalo kaj galopis al la direkto, en kiu Adjutanto Ren foriris. Klakado de ĉevalaj hufoj eĉ tremigis la mondon.



Patro iris rigardi ĉe la loko, kie Dentego Yu estis pafmortigota. Mutulo kaj du trupanoj eskortis lin al la okcidenta vilaĝfino. La ekzekutejo troviĝis ĉe la rando de arkforma kurbiĝo de rivero, kie punktiĝis flakoj da stinka akvo kaj abundis larvoj de muŝoj kaj moskitoj. Sur la klifo de la rivera kurbiĝo staris izole malgranda salikarbo kun flavaj velkintaj folioj. Bufoj plaŭde saltetis ĉe la kurbiĝo. Apud amaseto da forĵetaĵoj kaj distaŭzitaj haroj kuŝis trivita ŝuo de virino.

La du trupanoj trenis la ekzekutoton sur la klifon, malstreĉis sian mankaptadon kaj direktis sian rigardon al Mutulo. Depreninte la fusilon de sur la ŝultro, tiu ektiris kulasriglilon kaj klarsone ŝargis ĝin.

Sin turninte, Dentego Yu ekridetis kontraŭ Mutulo. Patro trovis lian rideton afabla kaj bonkora, kiel tuj formortontan subiran sunon.

“Frato Mutulo, malligu min. Mi ne povas morti kun ŝnuro!”

Post iom da pensado Mutulo, kun fusilo en la mano, aliris kaj eltirinte la ponardon el la zono, dispecigis la ŝnuron per kelkaj ektranĉoj.

Etendante siajn brakojn, Dentego sin turnis kaj kriis: “Pafu, frato Mutulo. Pafu trafe. Ne suferigu min!”

Patro opiniis, ke dum la momento tuj ĉe la morto, la mortonto vekas solenan respekton ĉe rigardantoj.

Kiel la semo de nia Nordorienta Vilaĝo de Gaomi, Dentego Yu faris gravan sed neripareblan krimon, li tamen montris sian heroan spiriton ĉe la morto. Patro tiel varme kortuŝiĝis, ke li sentis emon salteti en la aero.

Vizaĝe al la river-kurbiĝo kun stinka stagnanta akvo, ĵetinte rigardon al la verda limfeo sovaĝe kreskanta en la brilanta akvo, blanka kaj maldika lotusfloro kaj sorgoplantoj en brila pompo sur la transa bordo, li laŭte kantis: “*Sorgospikoj ruĝas, sorgospikoj ruĝas, la japanaj diabloj alvenas, la japanaj diabloj alvenas. Nia lando estas konkerita, nia familio ruinigita...*” Mutulo levis la fusilon kaj mallevis ĝin, levis ĝin kaj mallevis ĝin.

La du trupanoj diris: “Mutulo, petu la komandanton indulgi lin.”

Apogante sin sur la fusilo plantita sur la tero, Mutulo aŭskultis al li kanti malorde la kanton.

Dentego Yu turnis sin kaj kolere kriis, kun larĝigitaj okuloj: “Pafu do, frato! Ĉu vi volas, ke mi mortigos min mem!”

Levinte la fusilon, Mutulo celis lian tegolsimilan frunton kaj ektiris la ellasilon.

Patro vidis, ke la frunto de Dentego Yu eksplode krevis kiel disrompitaj tegolpecoj, kaj tuj baldaŭ aŭdis la obtuzan pafon. En pafsono Mutulo mallevis sian kapon. Strio da neĝblanka fumo sputiĝis el la pafiltubo. La korpo de Dentego Yu senmoviĝis dum tempdaŭro de du palpebrumoj kaj tuj falis plumbe sur la teron de la river-kurbiĝo, kiel lignopeco.

Trenante la fusilon, Mutulo ekiris kaj lin sekvis la du trupanoj.

Patro kaj aro da infanoj timplene svarmis al la klifo kaj rigardis de alte la Dentegon Yu kuŝantan kun vizaĝo al la ĉielo. Sur lia vizaĝo restis nur buŝo sendifekta, lia kranio jam disflugis, liaj du oreloj ŝmiriĝis per lia cerba fluidaĵo, kaj lia okulglobo eliĝis pro eksplodo el la okulkavo kaj, kiel granda vinbero, pendis ĉe la orelo.

Kiam lia korpo atingis la teron, ĝi peze falegis sur molan ŝlimon kaj disŝprucigis ŝlimon. La tigo de la maldika blanka lotusfloro derompiĝis kun kelkaj blankaj filamentoj ligataj al ĝi, tuj apud la mano de la kadavro. Patro flaris la delikatan aromon de la lotusfloro.

Poste Adjutanto Ren pretigis ĉerkon el cipresaj tabuloj kun internaj vandoj kovritaj per flava sateno kaj eksteraj diko vernisita, por solene entombigi Dentegon Yu. La tombo estis starigita sub

la malgranda saliko ĉe la river-kurbiĝo. En tiu tago de enterigo Adjutanto Ren surportis bone gladitan nigran veston kaj havis siajn harojn brile kombitaj, kun ruĝa silka bendo ĉirkaŭ la maldekstra supra brako. Komandanto Yu, funebre vestita per kanaba tuko pendanta ĉe la kapo, laŭte ploradis. Tuj kiam la funebra procesio forlasis la vilaĝfinon, li forte ĵetis novan argilan pelvon sur brikon.

Tiutage Avino volvis blankan funebran tukon ĉirkaŭ la kapo de Patro kaj ŝi mem surhavis funebran veston el kanaba tolo. Kun freŝa salika stango Patro sekvis Komandanton Yu kaj Avinon. Patro propraokule vidis, kiel la argila pelvo dispeciĝis kontraŭ la briko, kaj li tuj viziis, kiel la kranio krevis kiel tegolpecoj. Li malklare perceptis, ke inter tiuj du eventoj pri dispeciĝo ekzistas konsekvenca interligo. La renkontiĝo de unu evento kun la alia ĉiam neeviteble estigas la trian eventon.

Patro ne verŝis eĉ unu larmguton, flegme observante la funebrantojn. Kiam la procesio haltis sub la saliko kaj oni starigis sin en rondo, la peza ĉerko, tiritita de dek ses fortikaj junuloj per ok dikaj kabanŝnuroj, estis malpeze mallevita en profundan tombokavon. Komandanto Yu ekprenis manplendon da grundo kaj malmolkore ĵetis ĝin sur la brilantan kovrilon de la ĉerko. Bum! La sono tremigis la koron de la funebrantoj. Per ŝpatoj kelkaj homoj ŝovelis grandajn pecojn da nigra grundo en la tombokavon. La ĉerko, kiu kolere eligis obtuzajn sonojn, iom post iom malaperis en nigran grundon. La tombokavo malrapide pleniĝis je nigra grundo kaj la teramaso leviĝis sur la tersurfaco ĝis formiĝis ronda duno. Eliginte la pistolon, la komandanto faris tri pafojn en la aeron super la saliko. La kugloj sinsekve pafiĝis tra la arbokronon, faligis kelkajn flavajn brovosimilajn foliojn, kiuj kirle flirtis en la aero. Tri brilaj kugloŝeloj falis en la river-kurbiĝon kun fetoro el putraĵoj. Knabo saltis en la river-kurbiĝon kaj plaŭde vadante en verdeca ŝlimo, levkolektis la kugloŝelojn. Adjutanto Ren eligis la Browning-pistolon kaj faris tri pafojn unu post alia. La kugloj sonis kokerikeske fajfe el la pafiltubo kaj pafiĝis en la aeron super sorgoplantoj. Tenante la fumantan pafilon, Komandanto Yu kaj Adjutanto Ren vidalvide rigardis. Ekbalancinte la kapon, la adjutanto diris: “Li mortis kiel heroo!” Post tio li ŝovis la pistolon en la zonon kaj grandpaŝe iris al la vilaĝo.

Patro trovis, ke Komandanto Yu malrapide levas la brakon kun la pistolo en la mano kaj direktas la pistolon al la dorsfiguro de Adjutanto Ren. La funebrantoj multe surpriziĝis, sed neniu kuraĝis eligi sonon. Tute senkonscie pri tio, Ren, kun starigita brusto, grandpaŝe iris trankvile al la vilaĝo, renkonte al la suno turnanta kiel dentrado. Patro vidis, ke la pistolo ekstremetas en la mano de la komandanto. Li apenaŭ aŭdis la pafon tiel malfortan kiel malproksiman. Li vidis, ke la kuglo libere flugas en malalta aero kaj glitas tuj preter la ebon-nigraj haroj de la adjutanto. Sen returni la kapon, la adjutanto daŭre iris antaŭen per regulaj kaj egalritmaj paŝoj. Patro ankaŭ aŭdis la tre konatan arion, kiun la adjutanto fajfis per pintigitaj lipoj, “*sorgospikoj ruĝas, sorgospikoj ruĝas!*” Pro tio la okulkavoj de Patro pleniĝis je varmaj larmoj. La adjutanto iris pli kaj pli malproksimen, sed lia figuro sin montris pli kaj pli granda.

Komandanto Yu faris alian pafon, kiu skuis la ĉielon kaj la teron. Patro perceptis samtempe la flugon de la kuglo kaj la flugon de la pafsono. La kuglo trafis sorgotigon kaj spiko falis teren. Dum ĝia falado, alia kuglo ĝin dispecigis. Patro nebule sentis, ke la adjutanto deŝiris orflavan floron de amara herbo ĉe vojrando kaj almetis ĝin al la nazo por longe flari.

Patro iam diris al mi, ke la adjutanto probable estis komunisto, ĉar estis malfacile trovi tian bravulon alie krom en kompartio. Estis malfeliĉe, ke Adjutanto Ren havis mallongan vivon. Tri monatojn post kiam li prezentis tian imponan kaj heroan paŝadon, lia Browning-pistolo malfeliĉe

mispafis kaj mortigis lin, dum li viŝpurigis ĝin. La kuglo eniris tra la maldekstra okulo kaj eliris el la dekstra orelo, lasante ŝtal-bluan pulvoron plene sur la duono de lia vizaĝo. El lia dekstra orelo elfluis tri ĝis kvin nigraj sangogutoj. Kiam oni alkuris al li je ekaŭdo de la pafo, li jam oblikve kuŝis sur la tero.

Komandanto Yu levprenis lian Browning-pistolon kaj tenis sin silenta dum longa tempo.

## 7.

Avino vektportis du korbojn da patkukoj kaj la edzino de Wang Wenyi du sitelojn da supo de verdaj fazeoloj, kaj ili hasteme iris al la ŝtonponto super la Inko-rivero. Ili volus oblikve trairi la sorgokampojn rekte al la sudorienta direkto. Sed kiam ili eniris inter sorgoplantojn, ili trovis, ke estas malfacile por ili marŝi kun ŝarĝo sur la ŝultroj inter sorgoplantoj.

Avino proponis: “Bofranjo, ni iru sur la rekta vojo. Kvankam ĝi estas pli longa, ni tamen povas atingi tien plej rapide.”

Kiel flugantaj birdegoj ili solide moviĝis en tre libera aero. Avino surhavis malhele ruĝan veston kaj nigrajn harojn brile pomaditajn. La edzino de Wang estis malalta, sed vigla virino, kaj ŝi havis facilmovajn manojn kaj piedojn. Kiam Komandanto Yu varbis rekrutojn, ŝi akompanis Wang Wenyi al nia domo kaj petis Avinon rekomendi lin kiel gerilanon. Avino tuj konsentis. Dank’ al ŝia patronado Komandanto Yu akceptis Wang Wenyi.

La komandanto demandis al li: “Ĉu vi timas morton?”

“Jes,” Wang respondis.

“Kiam li respondis jes, fakte li volis diri ne, Komandanto,” diris lia edzino. “La japana flugmaŝino bombe dispecigis niajn tri filojn.”

Wang Wenyi ne estis destinita por esti soldato denaske. Li reagis malrapide kaj ne povis distingi dekstron disde maldekstro. Pro tio, kiam li ekzercis sin en marŝado, li suferis multe da batoj de Adjutanto Ren.

Lia edzino elpensis bonan ideon por li. Ŝi proponis al li, ke li tenu pecon da sorgotigo en dekstra mano kaj turnu sin al la direkto de la mano tenanta la tigopecon je la ordono “dekstren”. Pro manko de armilo post lia soldatiĝo Avino donacis al li la birdopafilon de nia familio.

Irante sur la serpentuma digo ĉe la Inko-rivero, ili emis rigardi nek la flavajn florojn en pompo sur la diga deklivo nek skarlatajn sorgospikojn interpuŝiĝantajn ekster la digo, kaj nur rapidigis siajn paŝojn al oriento. La edzino de Wang Wenyi kutimis al penado, dum Avino vivis ĝueman vivon. Pro tio Avino baniĝis en ŝvito kaj la edzino de Wang neniom ŝvitis.

Patro rekuris al la pontfino jam frue. Li raportis al la komandanto, ke baldaŭ patkukoj alvenos. Kun kontenteco tiu donis baton al lia kapo per manplato. La trupanoj plejparte kuŝis en sorgokampo, kun la naztruoj turnitaj al la ĉielo por sunumo. Pro neokupiteco Patro iris en la kampon je la okcidenta flanko de la ŝoseo por vidi, kion Mutulo kaj aliaj faras. Mutulo zorgeme akiris la glavon. Premante la Browning-pistolon ĉe la zono, Patro starigis sin antaŭ li, kun rideto de venkinto. Je ekvido de Patro, li ridete vidigis siajn dentojn al li. Dormanta trupano eligis sonorajn ronkadojn. La trupanoj, kiuj ne dormis, malvigle kuŝis. Neniu alparolis lin.

Li denove saltis sur la ŝoseon, kiu iom blankiĝis sur la bruna fono, kvazaŭ elĉerpite. Tiuj kvar erpiloj kuŝantaj kun la dentoj turnitaj al la ĉielo transverse baris la vojon. Patro pensis, ke ili certe jam brulis de atendado. La ŝtonponto liganta la du bordojn tuj super la akvosurfaco aspektis kiel paciento ĵus resaniĝinta el grava malsano. Poste li iris al la digo kaj sidiĝis. Li direktis sian rigardon jen al oriento jen al al okcidento, jen al la fluoj en la rivero, jen al sovaĝaj anasoj. La pejzaĝo sur la rivero estis bela: ĉiuj akvoherboj vegetas kaj ĉiuj ondetoj prezentas misteron. Patro

trovis blankajn ostojn de mulo aŭ ĉevalo, ĉirkaŭvolvitajn de prosperaj akvoherboj. Lia penso denove vagis al la du mulegoj de nia familio. Printempe aroj da leporoj kuris ĉie en kampoj. Rajdante sur mulo, Avino, kun ĉaspafilo en la mano, persekutis leporojn kaj Patro sidis malantaŭ ŝi, brakumante ŝin ĉirkaŭ la talio. La mulo surprize elpelis leporon kaj Avino pafmortigis ĝin. Kiam ili reiris hejmen, ili ĉiam kunportis pendaĵon da mortintaj leporoj ĉirkaŭ la kolo de la mulo. Kiam Avino manĝis viandon de leporo, plumbero granda kiel sorgograjno enŝoviĝis en la spaceton inter ŝiaj malantaŭaj dentoj kaj ŝi neniel sukcesis eligi ĝin.

Patro direktis sian rigardon al formikoj sur la digo. Trupo da malhelaj ruĝaj formikoj hasteme transportis grundon. Li metis terbulon inter formikojn, sed la formikoj, barataj de la terbulo, ne ĉirkaŭiris ĝin kaj kun penado ĝin transgrimpis. Li ekprenis la terbulon kaj plenforte ĝin ĵetis en la riveron. Ĝi plonĝis en akvon, sed la rivero sensone ĝin akceptis. La suno atingis la zeniton. Varma fiŝodoro leviĝis ĉie el la rivero, rebriloj glimis ĉie kaj sibloj aŭdiĝis ĉie. Patro sentis, ke inter la ĉielo kaj la tero plene ŝvebas ruĝa pulvoro de sorgospikoj kaj bonodoro de sorgovino. Je ekkline malantaŭen li kuŝigis sin sur la digon. Dum tiu ĉi momento li sentis fortan korbatadon. Iom poste li komprenis, ke ĉiaj atendoj ricevas rezulton kaj la rezulto aperas tiom ordinare kaj nature. Li trovis, ke sur la ŝoseo ambaŭflanke borderita de sorgoplantoj alrampas kvar malhele verdaj skarabo-similaj monstroj senbrue.

“Aŭtoj,” Patro murmuris, sed neniu respondis al li.

“La aŭtoj de japanaj diabloj!”

Patro eksaltis kaj stupore rigardis tiujn kamionojn, kiuj alpafiĝis falstele. Ili trenis brunan longan voston kaj sur ilia kapo klake brilis inkandeska lumo.

“Aŭtoj alvenas!”

La krio de Patro similis glavon, kiu senkapigis ĉiujn trupanojn, tiel ke regis stulta silento en sorgokampoj.

Komandanto Yu ĝojplene kriis: “Finfine tiuj diabloj alvenas. Fratoj, pretigu vin bone. Pafu, kiam mi ordonos.”

Okcidente de la ŝoseo Mutulo saltetis, frapante al si la sidvangojn. Kelkdek trupanoj, klinante sin, kun pafilo en la mano, surventre kuŝiĝis sur la deklivon de la digo.

Jam aŭdiĝis la zuma muĝado de la kamionoj. Apud Komandanto Yu Patro surventre kuŝis, levante la pezan Browning-pistolon en la mano. Lia pojno arde doloris kaj lia manplato malsekiĝis de ŝvito. Karnopeco ĉe la spaceto inter liaj polekso kaj montra fingro subite eksaltis kaj iom poste ĝi tumulte saltetadis. Surprizite li rigardis laŭritman saltadon de la karnopeco, granda kiel abrikotkerno, kvazaŭ en ĝi kaŝiĝis birdido volanta elŝeliĝi. Li ne volis, ke ĝi saltu, sed pro fortostreĉo lia tuta brako eĉ tremis. La komandanto donis alpremon al lia dorso kaj la karnopeco abrupte ĉesis salti. Patro ŝanĝis la maldekstran manon por teni la pistolon, ĉar la fingroj de lia dekstra mano spasmiĝis kaj ne povis sin etendi dum longa tempo.

La kamionoj rapide alkuris kaj pligrandiĝis. Hufgrandaj okuloj ĉe la kamionkapoj pafis blankan lumon kaj bruado de iliaj motoroj hurlis kiel venta hojlado antaŭ torenta pluvego, alportante fremdan kaj korporeman ekscitiĝon. La unuan fojon Patro vidis aŭtojn. Li divenis, ĉu tiuj monstroj manĝas herbojn aŭ fojnojn, ĉu ili trinkas akvon aŭ sangon, ĉar ili kuras multe pli rapide ol la muloj kun maldikaj kruoj de nia familio. La plenluno-similaj radoj flugrapide turniĝadis kaj levis nubojn da flava polvo en la aeron. Iom post iom vidiĝis klare la kamionoj. Proksime al la ŝtonponto ili malrapidiĝis. La flavaj polvonuboj disvastiĝis el la vosto de la kamionoj ĝis ilia kapo kaj nebule ŝirmis pli ol dudek homojn sur la unua kamiono, kiuj surportis abrikotflavan uniformon

kaj nigre brilantan feran kepon sur la kapo. Poste Patro eksciis, ke tia fera kepo nomiĝas “ŝtala kasko”. — En 1958, kiam oni faris ŝtalon tra la tuta lando, la gisa kaldrono de nia familio estis rekviziita, kaj mia frato ŝtelis ŝtalan kaskon el amaso da ferrubo kaj preparis manĝon per ĝi pendanta super karba fajro. Patro observis la ŝtalan kaskon, kies koloro variis en fajra fumo. En liaj verdaj okuloj brilis trista braveco, kiun li jam spertis, kvazaŭ maljuna ĉevalo en stalo aspirus galopi.

La du kamionoj meze de la aŭtovico estis ŝarĝitaj per neĝblankaj sakoj montete amasigitaj, kaj en la lasta kamiono, kiel en la unua, staris pli ol dudek japanaj soldatoj kun ŝtala kasko sur la kapo.

La vico de kamionoj alpremiĝis al la digo kaj la turniĝantaj radoj vidiĝis altaj kaj pezaj. En la okuloj de Patro la kvadrata kapo de la kamiono ŝajnis la kapo de enorma akrido. La flava polvo iom post iom maldensiĝis kaj la vosto de kamiono jen kaj jen furzadis per blua fumo.

Forte retirante sian kapon, Patro sentis, ke la neniam spertita frideco de li leviĝas de la plandoj al la abdomeno, kie ĝi konverĝas en bulon kaj produktas grandan premforton. Li tuj ekhavis emon pisi kaj la pisaĵo en la urinveziko igis lian kacon skuiĝi. Li forte tordis sian postaĵon por reteni la tuj ŝpruciĝontan pisaĵon.

“Ne moviĝu, vi leporido!” diris la komandanto seriozmiene.

Senhelpe Patro vokis, “Adopta patro!” kaj petis forpermeson por pisi.

Kun permeso de la komandanto Patro retiriĝis en sorgokampon kaj ellasis pisaĵon skarlatan kiel sorgospiko, kaj arde pikantan lian kacon. Pro tio li sentis sin multe malŝarĝita. Senintence li rimarkis, ke la mieno de la trupanoj montriĝas feroca kaj timinda, kiel tiu de la statuoj en templo. Wang Wenyi elŝovis sian langopinton, kun rigida rigardo simila al tiu de lacerto.

Kvazaŭ singardemaj bestegoj, la kamionoj rampis antaŭen, kun retenita spiro. Patro flarsentis la parfuman odoron de ilia korpo. Tiam aperis sur la sinua digo Avino kun ruĝa silka vesto malsekigita de ŝvito kaj la spireganta edzino de Wang Wenyi.

Avino vektopotis du korbojn da patkukoj kaj la edzino de Wang Wenyi du sitelojn da supo de verdaj fazeoloj. Ili faciligite gapis al la ŝtonponto super la Inko-rivero.

Avino plezure diris al la edzino de Wang: “Bofranĵo, ni fine atingis ĉi cellokon.”

Post edziniĝo Avino vivis en lukso kaj komforto. Tiu ĉi korboparo da patkukoj elpremis sur ŝiaj delikataj ŝultroj purpuran kontuzaĵon, kiu akompanis ŝin ĝis ŝi forlasis la mondon kaj eniris en la ĉielan landon. La purpura kontuzaĵo estis glora marko por Avino en ŝia brava batalado kontraŭ la japanaj invadantoj.

Estis Patro, kiu la unua trovis Avinon. Kiam ĉiuj aliaj fiksrigardis la malrapide alproksimiĝantajn kamionojn, li, pere de diktado de ia mistera forto, flankenigis sian kapon al okcidento kaj vidis Avinon gracie alflugi kiel ruĝa papiliego.

“Panjo!” li laŭte kriis.

Lia ekkrio ŝajnis ordono, laŭ kiu densa pluvo da kugloj alpafiĝis de la tri mitraloj instalitaj sur la japanaj kamionoj. La pafoj sonis obtuze, kiel hunda sombra bojado en nokta pluvo. Li vidis, ke du kugloj kreve boris du truojn sur la brusto de ŝia vesto. Post gaja ekkrio ŝi tuj falis teren, kaj la vektalo falis kaj premis sur ŝian dorson. Unu el du korbojn da patkukoj ruliĝis suden de la digo, kaj la alia norden de la digo. Tiuj blankaj patkukoj, verdaj tubaĵoj kaj pecigitaj omletoj disŝutiĝis sur la herbozan deklivon. Post falo de Avino, el la oblonga kapo de la edzino de Wang Wenyi ŝprucis ruĝa kaj flava fluidaĵo tre malproksimen, eĉ sur la sorgoplantojn sube de la digo. Vidinte tiun malaltstaturan virinon pafita, Patro retroiris unu paŝon, falis korpoflanken sude de la digo kaj

ruliĝis al la riverbordo. La du siteloj da supo de verdaj fazeoloj renversiĝis kaj disverŝiĝis ĉien kiel elverŝita sango de heroo. Unu el la du feraj siteloj stumbe ensaltis en la riveron kaj drivis antaŭen en nigra fluo preter Mutulo. Ĝi karambolis kelkfoje kun piliero de la ŝtonponto, enŝoviĝis sub pontarkon kaj flosis preter Patro, Wang Wenyi, Fang la Sesa kaj Fang la Sepa.

“Panjo...” korŝire laŭte kriis Patro kaj resaltis sur la digon. Komandanto Yu volis retiri lin, sed vane.

“Revenu!” kriis la komandanto.

Sed Patro ne aŭdis lian ordonon kaj fakte li aŭdis nenion. Kun malforta korpo kaj malalta staturato, li kuris sur la mallarĝa digo, brile banite en sunlumo. Kiam li resaltis sur la digon, li jam forĵetis la pistolon, kiu falis sur orflavan floron kun rompita folio. Kun disetenditaj brakoj, kiel flirte fluganta birdeto, li impetis al Avino. Tomba silento regis sur la digo, eĉ polvo aŭdigis sonon, kiam ĝi falis sur la teron. La akvo en la rivero ĉesis flui, nur brilante, kaj la sorgoplantoj ekster la digo aspektis solene trankvilaj. Kurante sur la digo, li ŝajnis alta kaj belaspekta, kvankam kun malforta korpo, kriante: “Panjo...panjo...panjo...” Lia kriado saturiĝis per homaj sango kaj larmo, per profunda sento de ostoj kaj karno kaj per noblaj motivoj. Finkurinte la orientan pecon de digo, li transsaltis la barikadon de ligitaj erpiloj kaj suprenkuris la okcidentan pecon de la digo. La fosili-similaj vizaĝoj de Mutulo kaj la aliaj malsupre de la digo fulmis preter Patron. Li sin ĵetis sur la korpon de Avino kaj vokis “Panjo”. Avino surventre kuŝis sur la digo, kun la vizaĝo tuŝanta la herbojn ĉe la dig-rando. Sur ŝia dorso vidiĝis du malfermitaj kuglotruoj, el kiuj elsvarmis odoro de sorgovino. Prenante ŝin je la ŝultro, li rulis ŝin al la surdorsa kuŝo. Ne vundo troviĝis sur ŝia vizaĝo kun seriozaj trajtoj, ŝiaj haroj estis en bona ordo kaj sub ŝiaj harfranĝoj sur la frunto arkis malsupren ŝiaj brovoj. Ŝi tenis siajn okulojn duonfermitaj, kun skarlatataj lipoj sur la junverda vizaĝo. Patro ekkaptis ŝian manon kaj vokis “Panjo” refoje. Ŝi malfermis siajn okulojn kaj prezentis naivan rideton sur la tuta vizaĝo. Ŝi etendis la brakon kaj donis sian manon al li.

La kamionoj de la diabloj haltis sur la pontkapo kaj motoroj bruis jen laŭte jen mallaŭte.

Fulmis alta figuro sur la digo kaj li fortiris Patron kaj Avinon malsupren de la digo. Tion faris Mutulo. Antaŭ ol Patro komprenis, kio okazis, kugloj, kiel furioza vento, alflugis super ili kaj disrompis sennombrajn sorgoplantojn.

La kvar kamionoj staris unu tuj apud la alia, senmovaj ekster la ponto. Ok mitraloj instalitaj en la unua kaj la lasta kamionoj sputis kuglojn, kiuj teksis sekajn kaj malmolajn lumbendojn kaj kruciĝis kiel nekompletaj ventumilaj formoj direktitaj jen al la oriento jen al la okcidento de la ŝoseo. Sorgoplantoj bruis lamente en unisono. La difektitaj folioj kaj tigoj de sorgoplantoj peze falis aŭ arklinie disflugis. La kugloj levis bulojn da flava fumo, kun paf-sonoj.

Senmove la trupanoj strikte alpremis sian korpon al la herboj kaj nigra grundo sur la diga deklivo. Tri minutojn poste la mitraloj subite ĉesis pafi. Sur la tero ĉirkaŭ la kamionoj vidiĝis orbrilaj kugloŝeloj tie kaj ĉi tie.

“Ne pafu!” subvoĉe diris Komandanto Yu.

La japanaj diabloj dronis en silento. Maldensa strio da pulvofumo sur la rivero drivis orienten je bloveto de zefiro.

Patro rakontis al mi, ke dum tiu ĉi momenta kvieto Wang Wenyi ŝancele suriris la digon kaj tenante longtuban pafilon en la mano, kun buŝo kaj okuloj larĝe malfermitaj, li amare laŭtvoĉe kriis: “Patrino de miaj infanoj!” Antaŭ ol fari paŝojn, li estis trafita de kelkdek kugloj je la ventro, kiu vere similis grandan truegon travideblan kiel plenluno. La kugloj makulitaj de liaj intestoj klake flugis super la kapo de la komandanto.

Wang falis kapantaŭe malsupren de la digo kaj ruliĝis ĝis la bordo, vidalvide al sia mortinta edzino trans la ponto. Lia koro ankoraŭ batadis kaj lia kapo estis sendifekta. Li sentis eksterordinare klaran komprenemon svarmi al lia koro.

Patro diris al mi, ke lia edzino naskis tri filojn en sinsekvaj jaroj kaj nutris ilin per manĝaĵoj el sorgograjnoj en pufajn kaj vigloplenajn knabojn. Iutage kiam Wang kaj lia edzino iris sarki sorgokampojn, iliaj tri filoj ludis en la korto. Japana biplano, brue muĝante, flugis super la vilaĝo, kaj demetis obuson en la korton de Wang. La obuso eksplodis, kaj ŝiris tiujn tri infanojn en pecetojn, kiuj disflugis aŭ sur la tegmenton, aŭ sur arbobranĉojn, aŭ sur la muron..... Kiam Komandanto Yu starigis la flagon por rezisti kontraŭ la japanoj, la edzino de Wang tuj sendis lin al la komandanto...

Kunpremite la dentojn, la komandanto rigardis per larĝigitaj okuloj Wang Wenyi, kies duono de kapo jam mergiĝis en riverakvo. Refoje li mallaŭte kriis: “Ne moviĝu!”



## 8.

Flugfalantaj sorgograjnoj saltetis sur la vizaĝo de Avino, unu el ili eĉ saltis inter iom malfermitajn lipojn kaj restis sur ŝia blanka dento. Rigardante ŝiajn lipojn, kies ruĝo malpliiĝis, Patro plorsingulte vokis “Panjo!” Du larmgutoj falis sur lian bruston. En pluvo de sorgograjnoj ŝi malfermis la okulojn, kiuj pafis perlecan ĉielarkan lumon.

Ŝi demandis: “Infano... kie estas via patro...”

Patro respondis: “Li estas en batalo, mia patro.”

“Li estas via propra patro...” diris Avino. Patro ekbalancis la kapon.

Avino baraktis al sida pozo, sed kiam ŝi moviĝis, du sangofluoj torentis elen.

“Panjo, mi iras alvoki lin,” diris Patro.

Skuinte la manon, ŝi subite sidiĝis, dirante: “Douguan...mia filo...subtenu min...ni rehejmeniĝu, rehejmeniĝu...”

Patro genuiĝis kaj lasis ŝin ĉirkaŭi lian kolon per siaj brakoj. Poste li fortostreĉe stariĝis kaj levis ŝin. La sango sur ŝia brusto baldaŭ malsekigis lian kolon. Li flaris el la freŝa sango densan bonodoron de alkoholaĵo el sorgograjnoj. Kun ŝia peza korpo sur li, Patro tremis per la kruroj kaj ŝancele iris al la profundo de sorgoplantoj, dum kugloj flugis super ilia kapo kaj falĉis sorgoplantojn. Dispuŝante la densajn sorgoplantojn, li pene faris unu paŝon post alia antaŭen. Ŝvito, larmoj kaj ŝia freŝa sango tute deformis lian vizaĝon. Li sentis, ke ŝi fariĝas pli kaj pli peza. Sorgotigoj senkompate implikis lin kaj sorgofolioj malsimpatie segis lin. Li falis surteren kaj ŝi peze subpremis lin. Li elŝovis sin el sub ŝia korpo kaj kuŝigis ŝin laŭlonge. Kun la vizaĝo turnita al la ĉielo ŝi eligis longan elspiron kaj ekridetis al li. Tiu mistera rideto, kiel brulstampilo, lasis hufforman markon en lia memoro.

Kuŝante, ŝi sentis la brulan doloron sur la brusto iom post iom malpliiĝi. En tranco ŝi kredis, ke lia filo malbutonumis ŝian veston kaj kovras per la manoj du kuglotruojn supre kaj malsupre de ŝia mammo. Ŝia sango tinkturis lian manon ruĝa, kaj poste verda, dum ŝia blanka brusto estis tinkturita de ŝia sango verda, kaj poste ruĝa. La kugloj trapafis ŝian noblan mamon kaj malkaŝis ĝian ruĝetan celulan histon. Rigardante ŝiajn mamojn, li naskis grandan doloron. Ĉar li ne povis haltigi sangadon de ŝiaj vundoj, pro sangado ŝia vizaĝo fariĝis pli kaj pli pala kaj ŝia korpo pli kaj pli leĝera, kvazaŭ prete forflugi en la aeron je ĉiu momento.

Avino feliĉe rigardis la delikatan vizaĝon de Patro, kiun ŝi kreis kune kun Komandanto Yu en la ombro de sorgoplantoj. Antaŭ ŝiaj okuloj la vivaj bildoj de la pasintaj jaroj fulme pasis kiel galopanta ĉevalo.

Tiujare, kiam Avino sidis en sia edziniĝa palankeno skuiĝanta kiel en boato en torenta pluvo, kaj eniris la vilaĝon, kie loĝis la familio de Chan Tingxiu, en la strato brile fluis pluvakvo kaj ŝeloj de sorgograjnoj floris surakve. Ĉe la pordo de la hejmo de Chan, la palankenon renkontis nur osteca maljunulo kun guŝ-simila harplektaĵo sur la kapo. Post pluvego sporadaj pluvgutoj tamburis la flakojn sur la tero. Kvankam la trumpetistoj ludis arion por sciigi pri la alveno de la novedzino, neniuj tamen spektis la spektaklon. Avino konsciis, ke io malbona okazos. Tiuj du viroj, kiuj subtenis Avinon por plenumi nuptajn ritojn, estis avo Arhato Liu je la aĝo de pli ol kvindek jaroj

kaj dungito de vinfarejo je la aĝo de pli ol kvardek jaroj.

La portistoj de la palankeno kaj muzikistoj staris en pluvakvo, kiel malsekigitaj kokoj, kaj seriozmiene rigardis du seke malgrasajn virojn helpi irigi ŝin en malhelan halon. Ŝi flaris fortan odoron de alkoholaĵo el la korpo de la du viroj, kvazaŭ ili estus trempitaj en alkoholaĵo.

Kiam ŝi trapasis la nuptajn ritojn, ŝi ankoraŭ kovris sian kapon per tiu stinka ruĝa tuko. En odoro de brulantaj kandeloj, ŝi ricevis finon de mola silka rubando kaj estis kondukita de homo. Ŝi spertis peĉnigran, sufokan kaj terurplenan iradon, antaŭ ol ŝi estis kondukita al terlito kaj sidiĝis sur ĝi. Neniu venis forlevi la ruĝan tukon de sur ŝia kapo dum longa tempo, kaj ŝi mem deŝiris ĝin. Ŝi vidis viron kun tikanta vizaĝo, kuntiriĝe sidantan sur tabureto ĉe la terlito. Lia kapo estis plata kaj longa, kaj liaj malsupraj palpebroj ruĝe ulceriĝantaj. Li stariĝis kaj etendis kok-ung-forman manon al ŝi. Kun ekkrio ŝi eltiris tondilon el la sino, stariĝis sur la terlito kaj kolere premis lin per la okuloj. La viro mizeraspekte residiĝis sur la tabureton. Tra tiu nokto ŝi neniam demetis la tondilon en la mano kaj la platkapa viro neniam forlasis la tabureton.

La sekvantan frumatemon, kiam la viro estis en dormo, Avino glitis de sur la terlito kaj elkuris el la ĉambro. Malferminte la pordegon de la korto, ŝi apenaŭ volis peli siajn piedojn, kiam ŝi estis ekkaptita de la malgrasa maljunulo kun guŝ-simila harplektaĵo, kiu minace rigardis ŝin.

Post du sekaj tusoj Chan Tingxiu retiris sian minacan mienon kaj trudis rideton al la vizaĝo, dirante: “Infano, ĉar vi jam edziniĝis al mia filo, vi estos traktita kiel mia propra filino. Bianlang ne suferas de tia malsano, pri kia oni deliras. Nia familio havas grandan entreprenon kaj Bianlang estas tro honesta por ĝin funkciigi. Ĉar vi alvenas, mi metas ĝin sub vian zorgon.”

Chan Tingxiu donis al ŝi grandan faskon da ŝlosiloj, sed ŝi ne ĝin akceptis.

La duan nokton, ankoraŭ kun la tondilo en la mano, ŝi sidis ĝis tagiĝo.

Antaŭtagmeze de la tria tago la patro de Avino kondukis malgrandan azenon tien por irigi ŝin hejmen, laŭ la loka moro de la Nordorienta Vilaĝo de Gaomi, ke oni irigas novedzinon al ŝia gepatra domo post tri tagoj de ŝia edziniĝo. Drinkinte kun Chan Tingxiu ĝis iom post tagmezo, ŝia patro ekiris.

Avino rajdis kun siaj kruroj ĉe unu flanko de la azeno, kiu kovriĝis per maldika litkovrilo, kaj ambliis ekster la vilaĝon. Tri tagojn tuj post pluvego la vojsurfaco ankoraŭ humidis. En sorgokampoj jen kaj jen leviĝis blanka vaporo, kaj verdaj sorgoplantoj estis volvitaj de blanka vaporo, kvazaŭ en fea lando. Kun tintado de arĝentaj moneroj en la dusako ŝia patro ŝanceliĝis pro ebrieco, direktante vageman rigardon tien kaj ĉi tien. La malgranda azeno, kun kuntirita longa frunto, malrapide paŝis kaj lasis klarajn hufsignojn sur la malsekan vojon. Ondoj da kapturnemo atakis la rajdantinon kun ruĝe ŝvelintaj palpebroj kaj distaŭzitaj haroj. La sorgoplantoj, kiuj kreskis pli alten dum ĉi tiuj tri tagoj, moke rigardis ŝin.

“Paĉjo,” ŝi diris, “mi ne plu reiros al lia hejmo. Eĉ se mi mortos, mi neniel reiros al lia hejmo...”

“Filino mia,” diris ŝia patro, “vi vere havas fortunon! Via bopatro volas donaci al mi grandan nigran mulon. Se mi vendos la azenon...”

La azeno etendis sian kvadratan kapon kaj pinĉis buŝplenon da herboj makulitaj per koto ĉe la vojrandoj.

Plorante, ŝi diris: “Li estas leprulo, paĉjo...”

“Via bopatro donacos al ni mulon...” murmuris ŝia patro.

Ŝia patro estis jam morte ebria kaj senĉese vomis buŝplenon post buŝplenon da alkoholaĵo kaj viando, kiujn li jam manĝis, en herbotufojn ĉe la vojrandoj. La malpuraj vomaĵoj provokis al ŝi

kirladon de visceroj. Pro tio ŝi kovis grandan malamon al li.

Kiam ili atingis la Bufan Malaltejon, nazpika haladzo atakis ilin, tiel ke la mulo pendigis siajn orelojn malsupren pro la pika malbonodoro. Avino vidis la kadavron de la kidnapinto, kies ventro pufiĝis tre alte kaj kies karno kaj haŭto kovriĝis per tavolo da junverdaĵ muŝoj. Kiam la azeno kun Avino sur la dorso preteriris la putriĝintan kadavron, muŝoj indigne ekflugis en verda maso. Sekvante la mulon, ŝia patro ŝajne moviĝis pli larĝe, jen maldekstren puŝante sorgoplantojn, jen dekstren tretante sur la herbojn. Kiam li iris antaŭ la kadavron, li senĉese lamentis kaj diris kun lipoj tremetantaj: “Malriĉa diablo... vi malriĉa diablo... ĉu vi jam endormiĝis ĉi tie?...”

Avino neniam forgesis la kukurbo-similan vizaĝon de la kidnapinto. Dum la momento, kiam muŝoj ekflugis surprizite, la eleganta vizaĝesprimo de la mortinta kidnapinto kaj la malica, sed timema mieno de la vivinta kidnapinto prezentis klaran kontraston en ŝia menso. Vojpeco post vojpeco ili iris, kun la suno disverŝanta siajn oblikvajn radiojn sur la lazura ĉielo. Ŝia patro postiris malantaŭ la azeno je longa distanco. La azeno, kiu konis la vojon, libere antaŭeniris, kun Avino sur la dorso. Kiam la azeno iris ĉe vojturno, ŝia korpo sin klinis malantaŭen kaj leviĝis el la azena dorso. Iu prenis ŝin aksele per forta brako kaj iris en la profundon de sorgoplantoj.

Avino ne havis forton por barakti nek volis barakti. La nova vivo de tri tagoj ŝajnis al ŝi vekigo el la sonĝo. Iu sukcesis fariĝi granda gvidanto dum unu minuto, dum Avino malkaŝis la misteron de la homa vivo en tri tagoj. Ŝi eĉ levis brakon kaj ĉirkaŭprenis lian kolon, por ke li povu facile preni ŝin en siaj brakoj. Folioj de sorgoplantoj susure sonis.

Aŭdiĝis raŭka voĉo de ŝia patro sur la vojo: “Filino mia, kien vi iris?”

De ĉirkaŭaĵo de la ponto alŝvebis trista treniĝanta sonado kaj obtuza pafado de mitraloj en malorda serio. Kun ŝia spirado ŝia sango ankoraŭ jen kaj jen elfluis.

Patro kriis: “Panjo, ne elfluigu vian sangon. Manko de sango kaŭzos vian morton.”

Li prenis manplendon da nigra grundo ĉe la radiko de sorgoplanto kaj ŝtopis ŝian vundon per ĝi, kaj tre baldaŭ ŝia sango eksudis kaj li aldonis alian manplendon da nigra grundo. Kun plezura rideto Avino rigardis la lazuran kaj nesondeblan ĉielon, kaj indulgemajn, varmajn kaj patrinecajn sorgoplantojn. En ŝia cerbo aperis verda vojeto punktita per malgrandaj blankaj floroj, sur kiu ŝi senĝene kaj libere iras sur la dorso de azeno al la profundo de sorgoplantoj. Kaj tiu impona kaj fortika viro ekkantas plengorĝe la kanton skuantan sorgoplantojn. Laŭ lia kantvoĉo ŝi ŝvebas, tretante la pintojn de sorgoplantoj, kvazaŭ sur verda nuboo.

La viro demetis ŝin sur la teron, kaj ŝi molis kiel kuiritaj nudeloj, kun duonfermitaj okuloj de ŝafido.

Deŝirinte la maskon de nigra tuko, la viro malkaŝis sian vizaĝon. Jen li mem! Avino kaŝe preĝis al la Ĉielo. Forta tremo de feliĉo impulsis ŝin ĝis ŝi plenis de varmaj larmoj en la okuloj.

Yu Zhan'ao demetis la lozan pluvmantelon el pajloj, tretrompis kelkdek sorgoplantojn, kaj sternis ĝin sur la kadavroj de la sorgoplantoj. Li brakumis ŝin kaj metis ŝin sur la pajloplektitan pluvmantelon. Ŝi jam estis ekster si de raviteco. Rigardante lian nudigitan torson, ŝi ŝajne vidis lian fortan kaj bravan sangon cirkuli sub lia bruna haŭto. Super la pintoj de sorgoplantoj drivis maldensa vaporo kaj aŭdiĝis siblado de kreskado de sorgoplantoj ĉirkaŭe. Mankis vento, ĉio troviĝis en kvieto, kaj nur la suno kruce pafis la ardajn kaj humidajn radiojn inter sorgoplantojn. Kun forte batanta koro, ŝi subite eksplodis per la pasio kaŝita en si dum dek ses jaroj. Ŝi tordiĝis sur la pluvmantelo. Li iom post iom malaltiĝis kaj peze genuiĝis ĉe ŝi. Ŝi tremetis tra la tuta korpo, kaj bulo da flava kaj aroma fajro klake brulis sur ŝia vizaĝo. Li bruske ŝirmalfermis la korseton kaj lasis rekte verŝitajn sunradiojn prilumi ŝiajn mamojn, kiuj kovriĝis per tavolo da blanka raŝo pro

malvarmo kaj streĉiteco. Sub liaj fortikaj kaj solidaj moviĝoj akraj doloro kaj feliĉo provis ŝiajn nervojn. Ŝi eligis mallaŭtan kaj rauĉan murmuron: “Ho, la Ĉielo...” kaj svenis.

Avo kaj Avino enanimiĝis unu al la alia en la vigloplena sorgokampo. Iliaj senbrideblaj koroj, kiuj malestimis la homajn leĝregulojn, kuniĝis pli strikte ol iliaj korpoj. Ilia amludo en sorgokampo aldonis ruĝan strekon por la riĉa historio de la Nordorienta Vilaĝo de Gaomi. Patro, por tiel diri, nutrite per la esencoj de la ĉielo kaj la tero, naskiĝis kiel kristalo de doloro kaj plezura volupto. Laŭta iaado de la azeno penetris inter sorgoplantojn. Ŝajnis, ke ŝi revenis de la nebuleca ĉiela lando al la tero. Ŝi sidiĝis, multe perpleksigite, kun larmoj ĉe la vangoj. Ŝi diris: “Li vere estas leprulo.”

Avo, genuante, sible elingigis du-fut-longan ponardon oni ne sciis de kie, la ponardon kun ronda klingo simila al tuboforma folio de ŝenoprazo.

Per eksvingo li glitigis la ponardon tra sorgotigojn kaj falis teren du sorgoplantoj, el kies tranĉitaj tigoj eksudis inke verda fluidaĵo.

Avo diris: “Post tri tagoj venu ĉi tien!”

Avino perplekse gapis al li. Li vestis sin kaj ŝi ordigis sian vizaĝon. Ŝi ne sciis, kien li kaŝis la ponardon. Li akompanis ŝin al la vojrandoj kaj li tuj malaperis senspure.

Post tri tagoj la azeno reportis ŝin al la bopatra domo. Enirinte en la vilaĝon, ŝi aŭdis, ke la patro kaj filo de familio Chan estis mortigitaj kaj iliaj kadavroj kuŝas en la malaltejo ĉe la okcidenta fino de la vilaĝo.

Kuŝante, Avino baniĝis en sorĉa varmo de sorgokampoj. Ŝi sentis sin leĝera kiel hirundo kaj libere glisis tuj super la sorgospikoj. Malpliĝis la karusela moviĝo de bildoj en ŝia menso: Chan Bianlang, Chan Tingxiu, ŝia patro, ŝia patrino, avo Arhato... Multaj malamaj, dankemaj, ferocaj kaj honestaj vizaĝoj jam aperis, kaj nun malaperis. Ŝian historieton de tridek jaroj ŝi mem skribis per la lasta streko. Ĉio en pasinteco, kiel aromaj fruktoj, sage falis teren, dum pri ĉio en estonteco ŝi nur vidis efemerajn lumrondojn. Nur la glueman kaj glitan nunon ŝi ankoraŭ penis strike kapti. Ŝi sentis, ke la du ungo-similaj manetoj de Patro ŝin karesas. Lia timema vokado per “Panjo” vekis sparkojn de sopiremo al homa vivo en ŝia konscio, kie jam mankis amo kaj malamo, korfavoro kaj venĝo. Ŝi provis levi sian manon por karesi la vizaĝon de mia patro, sed ŝi neniel ĝin levis. Ŝi estis soranta supren. Ŝi vidis fortan irizitan lumon el la ĉiela lando kaj aŭdis la solenan muzikon luditan per sŭona-oj, ĉielaj klarionoj kaj trumpetoj en la ĉiela lando.

Avino sentis grandan lacecon. La tenilo de la glitema nuno kaj tiu de la tuta vivo estis tuj falontaj el de ŝia mano. Ĉu tio estas morto? Ĉu mi baldaŭ mortos? Ĉu mi ne povos plu vidi ĉi tiun ĉielon, ĉi tiun teron, ĉi tiujn sorgokampojn, ĉi tiun filon kaj la amaton, kiu komandas la batalon? Pafoj sonis tiom malproksime kaj ĉio estis vualita per densaj fumo kaj nebulo. Douguan! Douguan! Mia filo, donu helpon al mi, via panjo. Firme tiru min. Mi ne volas morti. Ho, la Ĉielo! La Ĉielo... la Ĉielo favore donas al mi amaton, la filon, la riĉaĵojn kaj la riĉan vivon de tridek jaroj tiel plenan kiel ruĝaj sorgospikoj. La Ĉielo, ĉar vi jam donis al mi tiujn aĵojn, ne retiru ilin. Indulgu min, lasu min for! Ĉu vi konsideras min kulpa, la Ĉielo? Ĉu vi juĝu, la Ĉielo, tion prava aŭ erara, se mi kuŝus kun leprulo kaj naskus aron da monstroj kun fava haŭto kaj putriĝinta karno por malpurigi la mondon? Kio estas ĉasteco, la Ĉielo? Kio estas la ĝusta vojo? Kio estas bonkoreco? Kio estas malbonvirto? Vi neniam diras al mi tion. Mi nur faras, kion mia koro diktas. Mi amas feliĉon, mi amas forton, mi amas belon. Mia korpo apartenas al mi mem kaj mi volas esti la mastro de mi mem. Mi ne timas krimon, mi ne timas punon, mi ne timas fali en la fundon de via dekok-tavola infero. Mi faris ĉion, kion mi devas, kaj mi plenumis ĉion, kion mi volas. Mi timas nenion. Sed mi

ne volas morti, kaj mi volas vivi plu por rigardi pli multe de la mondo, ho, mia Ĉielo...

Ŝia sincereco vere tuŝis la Ĉielon. En ŝiaj sekiĝintaj okuloj denove estiĝis freŝa suko kaj brilis la mirinda lumo el la ĉiela lando. Ŝi denove vidis la orflavajn vangojn de Patro kaj lian paron da okuloj preskaŭ tiel samaj kiel tiuj de Avo. Ŝi movetis siajn lipojn kaj vokis “Douguan”. Kun granda ĝojo Patro laŭte kriis: “Vi jam boniĝas, panjo! Ne mortu! Mi jam ŝtopis vian sangadon. Vi ne plu sangos! Mi iru venigi mian paĉjon por vidi vin. Panjo, vi ne povas morti. Atendu mian paĉjon!”

Patro forkuris. Liaj paŝoj fariĝis softaj flustroj kaj fariĝis la muziko el la ĉiela lando, kiun ŝi ĵus aŭdis. Avino aŭdis la voĉon de la universo, kvazaŭ venantan el tiuj ruĝaj sorgospikoj. Ŝi fiksrigardis tiujn ruĝajn sorgospikojn. Ŝi nebule viziis strangajn, belajn kaj groteskajn sorgoplantojn, kiuj ĝemas, tordiĝas, hurlas kaj implikiĝas, kelktempe kiel demonoj kaj kelktempe kiel karuloj. En ŝia vidkampo ili serpente volvas sin kaj poste sin etendas klake. Ŝi eĉ ne povis distingi iliajn kolorojn. Ili varias ruĝe kaj verde, nigre kaj blanke, blue kaj verde. Jen ili ridas ĝoje, jen ili krie ploras. Iliaj larmoj pluve batas la dezertan sablejon en ŝia koro. Tra la fendoj inter sorgoplantoj vidiĝas pecoj de la blua ĉielo, kiu ŝajnas tiom alta kaj samtempe tiom malalta. Ŝi sentis, ke la ĉielo, la tero, homoj kaj sorgoplantoj interplektiĝas kaj ĉio kovriĝas per enorma kloŝo. La blankaj nuboj sur la ĉielo glitas, frotante sorgoplantojn kaj ankaŭ ŝian vizaĝon. La malmolaj flankoj kaj anguloj de blankaj nuboj susure frotadas ŝia vizaĝon. La ombroj de la blankaj nuboj sekvas ilin kaj senĝene turniĝadas. Aro da blankaj kolomboj plonĝas el la alta aero sur la pintojn de sorgoplantoj. Ilia kverado vekas ŝin, kaj ŝi tre zorgeme observas, kian aspekton ili havas. Dume ili ankaŭ ekzamenas ŝin per siaj ruĝaj okulgloboj grandaj kiel sorgograjnoj. Ŝi sincere ridetis al ili, kaj ili rekompencas per sia larĝa rideto ŝiajn sopiremon kaj amon al la vivo ĉe ŝia morto. Ŝi silente krias: “Miaj karuloj, mi ne volas forlasi vin!” Livioj bekfaligas grapolojn da sorgograjnoj, kvazaŭ respondante al ŝia senvoĉa ekkrio. Bekante, ili englutas sorgograjnoj kaj ilia brusto iom post iom elstariĝas kaj iliaj plumoj hirtiĝas dum streĉita manĝado. Iliaj ventumilformaj vostaj plumoj ŝajnas infloreskoj skuiĝantaj en vento. Sub la tegmentrando de nia domo brediĝis arego da kolomboj. Aŭtune Avino metis lignan kuvegon plenan de pura akvo en la korton. Refluginte el kampoj, la kolomboj bonorde staris sur la randon de la kuvego, kaj vizaĝe al siaj renversitaj bildoj en akvo, ili glugle sputis el sia kropo la sorgograjnoj. Ili impone paŝis en la korto. Kolomboj! Sur la pacaj pintoj de sorgoplantoj staris aro da kolomboj, kiuj estis forpelitaj de milita pluvŝtormo. Ili rigardis al Avino, kvazaŭ starante en solena silento por bedaŭri ŝin.

La okuloj de Avino denove malklariĝis. La kolomboj fluge leviĝas kune, svingante la flugilojn. Laŭ taktoj de konata ario ili ŝvebas sur la ĉielo lazura kiel maro. La flugiloj de la kolomboj frotadas la aeron susure. Avino leĝere soras, kune kun la kolomboj, svingas siajn flugilojn de la nova vivo kaj facile rondflugas. Kun nigra grundo sub sia korpo kaj sorgospikoj super si, ŝi sopireme rigardis la difektitan vilaĝon, la sinuan riveron, interkrucigitajn vojojn, la konfuzitan aeron tranĉitan de ardantaj kugloj, kaj la plebanojn, kiu hezitis ĉe la vojkruciĝo de vivo kaj morto. Por la lasta fojo ŝi flaris la odoron de alkoholaĵo el sorgograjnoj, kaj la freŝan kaj dolĉan odoron de varma sango. En ŝia cerbo subite fulmis la sceno la de ŝi nevidita: en pafado de kelkdek mil kugloj kelkcent vilaĝanoj en ĉifonaĵo kuŝas en sorgokampoj, kun etenditaj manoj kaj svingantaj piedoj...

La lasta fadeno de ligado kun la homa mondo estis rompiĝonta. Ĉiuj ĉagrenoj, doloroj, streĉitaj kaj frustrigaj sentoj falis en la sorgokampojn, hajle frapis la pintojn de sorgoplantoj, radikigiĝis en nigra grundo, floras kaj donos amarajn fruktojn al generacioj por elporti. Finfine ŝi

plenumis sian liberigon kaj flugis kune kun la kolomboj. En ŝia ŝrumpita pensospaco larĝa nur kiel pugno plenplenis ĝojo, trankvileco, varmo, komforto kaj harmonio. Kun granda kontenteco ŝi pie diris: “Ho, mia Ĉielo!...”

## 9.

La mitraloj sur la kamionoj seninterrompe pafadis. Kun radoj turniĝadantaj la kamionoj rampis sur la solidan ŝtonponton. Kugloj subpremis la agadon de Avo kaj lia trupo. Kelkaj trupanoj, kiuj malzorgeme elŝovis sian kapon super la digon, jam mortis ĉe la piedo de la digo. Avo brulis de kolero. Ĉiuj kamionoj jam surrampis la ponton, kaj la kugloj de la mitraloj pli alte flugis.

Avo ordonis: “Fratoj, pafu!”

Patro faris tri sinsekvajn pafojn, kaj du japanaj soldatoj surventre kuŝiĝis sur la tegmenton de la kamiono, elverŝante nigran sangon sur la kapoton. Sub la gvido de pafoj de Avo aŭdiĝis kelkdek krepitantaj pafoj. Aliaj sep aŭ ok japanaj soldatoj falis, du el ili plonĝis ekster la kamionon, kun brakoj kaj kruroj svingantaj, kaj sin ĵetis rekte en la Inko-riveron. La gisa kanono de fratoj Fang ekmuĝis, ŝprucis larĝan flamlangon kun timiga ekfulmo super la rivero, kaj disŝutis plumberojn kaj ferpilolojn sur la blankajn sakojn de la dua kamiono. Tuj post leviĝo de pulva fumo vidiĝis sennombraj truoj, el kiuj sible elfluis blankaj rizgrajnoj.

Patro serpentume ŝovis sian vojon inter sorgoplantoj kaj volis diri ion urĝan al Avo, sed tiu okupiĝis pri ŝargado al la pistolo per kugloj. La unua kamiono de la japanaj diabloj sin ĵetis per plena energio sur la pontkapon kaj ĝiaj antaŭaj radoj premiĝis sur erpilajn dentojn turnitajn al la ĉielo. La radoj trapikiĝis kaj susure ellasis aeron. La kamiono furioze muĝis kaj knare puŝis malantaŭen la kunligitajn erpilojn. En la okuloj de Patro la kamiono ŝajnis granda serpento, kiu voris erinacon kaj mizere svingis sian kapon. La japanaj diabloj desaltis de la kamiono.

“Liuĉjo, trumpetu!” Avo ordonis.

Trumpetulo Liu ektrumpetis en tristaj kaj timigaj tonoj.

“Sturmu!” kriis Avo.

Saltinte kun la pistolo en la mano, Avo pafadis tute sen celi kaj la japanaj soldatoj antaŭ li klinis sin antaŭen aŭ malantaŭen. La trupanoj en la okcidento ankaŭ sturmis antaŭ la kamionojn kaj miksiĝis kun la japanaj soldatoj, tiel ke la japanaj soldatoj nur pafis al la ĉielo. Patro vidis, ke Mutulo fluge saltis sur la kamionon por trakti la du restantajn japanajn soldatojn. Ili sin ĵetis kun bajoneto en la mano renkonte al li. Mutulo flankenbatis bajoneton per la glavoklingo kaj turnis la glavon al la kapo kun ŝtala kasko de japana soldato. La fortranĉita kapo ekflugis horizontale kun treniĝanta susuro kaj kiam ĝi falis teren, la buŝo ankoraŭ eligis duonon de sonora elspiro. Patro pensis, ke Mutulo havas tre akran glavon. Kaj li vidis la surprizitan vizaĝesprimon de la japana soldato tuj antaŭ ol ties kapo estis forlasonta la kolon, kaj poste la moviĝon de muskoloj sur la vangoj kaj snufadon de la naztruoj, kvazaŭ tiu pretus terni. Mutulo forhakis la kapon de alia japana diablo. La kadavro apogiĝis kontraŭ la vando de la kamiono kaj ĝia haŭto je la kolo retiriĝis larĝe flanken kun sango glugle elfluanta. Tiam la japana soldato sur la malantaŭa kamiono iom mallevis la mitralon kaj pafis abundon da kugloj kaj trupanoj de Avo falis kiel ŝtipoj sur la kadavrojn de la japanaj diabloj. Mutulo peze falsidis sur la tegmenton de la kamiono, kun kelkaj sangofluetoj ŝprucantaj el la brusto.

Avo kaj Patro surventre rampis returne en sorgokampon kaj malrapide elŝovis la kapon super

la digon. Vidinte la lastan kamionon retroveturanta malantaŭen, Avo krie ordonis: “Pafu per kanono, Fang la Sesa! Batu tiun bastardon!”

Fratoj Fang movis la jam ŝargitan kanonon sur la digo. Kiam Fang la Sesa klinis sin por bruligi la fuzeon, li estas pafita je la ventro kaj helverda intesto elglitis el ĝi. Kun ekkrio “mia panjo”, li, kovrante sian ventron ambaŭmane, ruliĝis en sorgokampon. Vidinte, ke la kamiono baldaŭ malsupreniros la ponton, Avo anksie kriis: “Pafu per kanono!”

Fang la Sepa, kun tindro en la mano, tremete tuŝis per ĝi la fuzeon, sed li neniel sukcesis bruligi la fuzeon.

Sin ĵetinte antaŭen, Avo kaptis la tindron, blovis ĝin kaj la tindro tuj ekbrulis. Kiam li tuŝis per ĝi la fuzeon, la fuzeo siblis, eligante blankan fumon, kaj fine malaperis. La gisa kanono sidis silente, kvazaŭ en dormo. Patro pensis, ke ĝi ne pafos. La kamiono jam retiriĝis el la pontkapo, kaj la dua kaj tria kamionoj ankaŭ retroveturis. La rizgrajnoj sur la kamiono susure fluadis sur la ponton kaj en akvon, sur kiu vidiĝis multaj punktoj pro falado de rizgrajnoj. La kadavroj de kelkaj japanaj soldatoj malrapide flosis orienten, disŝutante sangon, kaj aroj da blankaj angiloj naĝis en sanga akvo. Post momenta silento la gisa kanono ekmuĝis kaj ĝia korpo alten saltis sur la digo. Larĝa flamo trafis la kamionon, el kiu fluis rizgrajnoj. Ĝia suba parto krepite bruliĝis.

Haltis la kamiono, kiu jam retroveturis de sur la ponto. Desaltinte de ĝi, la japanaj soldatoj surventre kuŝigis sin sur la transa digo kaj per mitraloj elverŝis densajn pafojn al la cisa digo. Fang la Sesa estis pafita je la vizaĝo kaj lia nazo disrompiĝis, ŝprucante sangon sur la tutan vizaĝon de Patro.

En la brulanta kamiono du japanaj diabloj puŝmalfermis la pordon, desaltis kaj hasteme kuris en la riverakvon. La kamiono, el kiu rizgrajnoj elfluis, povante iri nek antaŭen nek malantaŭen, muĝadis sur la ponto, kaj ĝiaj radoj turniĝadis idle. Rizgrajnoj pluve falis plaŭe.

La transa mitralo abrupte haltis kaj nur kelkaj fusiloj sporade pafis. Dekkelkaj japanaj soldatoj, klinante sin kun fusilo en la mano, sturmis norden laŭ ambaŭ flankoj de la brulanta kamiono. Avo krie ordonis “Pafu!”, sed nur malmultaj pafis. Turninte la kapon, Patro vidis, ke la kadavroj de la trupanoj kuŝas sur kaj malsupre de la digo, kaj vunditaj trupanoj krie ĝemadas en sorgokampo. Avo faris serion da pafoj kaj premis kelkajn japanajn soldatojn sub la ponton. Okcidente de la ŝoseo ankaŭ aŭdiĝis sporadaj pafoj kaj kelkaj japanaj soldatoj falis. La restantaj japanaj soldatoj retiriĝis. Alflugis kuglo el la suda digo kaj trafis la dekstran brakon de Avo. Kiam li ekfleksis sian brakon, la pistolo falis kaj pendiĝis je la kolo.

Retiriĝinte en sorgokampon, Avo kriis: “Douguan, helpu min.”

Avo ŝiris la manikon kaj signis al Patro, ke tiu eltiru la blankan tolon ĉe la zono kaj helpu lin bandaĝi la vundon.

Kaptante la okazon, Patro diris: “Paĉjo, mia panjo sopiras al vi.”

“Bona filo,” Avo diris, “unue sekvu min por tute likvidi tiujn hundidojn!”

Avo eltiris la Browning-pistolon, kiun Patro forĵetis, enmanigis ĝin al li. Trumpetisto Liu, kun sanganta kruro, alrampis el la rando de la digo kaj demandis: “Ĉu mi trumpetu, komandanto?”

“Jes,” Avo diris.

Starante unugenue kaj trenante alian kruron, Trumpetisto Liu levis trumpeteton kaj ludis ĝin kontraŭ la ĉielo. El trumpeteto elŝvebis malhele ruĝaj notoj.

“Sturmu, fratoj!” Avo laŭte kriis.

En sorgokampoj okcidente de la ŝoseo leviĝis kelkaj voĉoj eĥe al lia ordono.

Levante la pistolon en maldekstra mano, Avo apenaŭ eksaltis, kiam kelkaj kugloj flugis tuj



preter liajn vangojn. Li ruliĝis sur la tero denove en sorgokampon. Aŭdiĝis tragika ekkrio ĉe la digo okcidenta de la ŝoseo. Li sciis, ke alia trupano estas pafita.

Trumpetisto Liu trumpetis kontraŭ la ĉielo kaj tiuj malhele ruĝaj notoj susure tremetigis sorgoplantojn.

Kaptinte la manon de Patro, Avo diris: “Filo mia, sekvu min por renkontiĝi kun la fratoj okcidente de la ŝoseo.”

En krepita fajro la kamionoj sur la ponto vomis densan fumon, kaj la rizgrajnoj flirtis kiel hajleroj super la rivero. Tenante Patron je la mano, Avo trakuris la ŝoseon per flugaj paŝoj. Kugloj postkuris ilin kaj sible trafis la grundon sur la ŝoseo. Kiam du trupanoj kun bruligita vizaĝo kaj krevinta haŭto vidis Avon kaj Patron, ili grimace ekploris: “Ni estas finitaj, komandanto!”

Sidante deprimate en sorgokampo, Avo ne levis sian kapon dum longa tempo. La japanaj diabloj sur la transa bordo ankaŭ komencis pafi. Aŭdiĝis krepitado de brulantaj kamionoj sur la ponto kaj sonoj de trumpetado de Liu oriente de la ŝoseo.

Jam ne plu sentante timon, Patro ŝtele iris iom da vojo okcidenten laŭ la digo kaj li kaŝe elŝovis la kapon el tufo da velkintaj herboj. Li vidis, ke japana soldato desaltis el la dua ankoraŭ ne brulanta kamiono kaj eltiris el la ŝoforejo maljunan japanan diablon, kiu surportis neĝblankajn gantojn sur siaj ostecaj manoj kaj nigrajn ledajn rajdobotojn ĝis la genuoj, kun longa sabro ĉe la flanko. Ili iris laŭ la flanko de la kamiono, ĉirkaŭprenis la pilieron kaj glitis malsupren. Kvankam Patro levis sian Browning-pistolon, lia mano tamen senĉese tremetis kaj la postaĵo de tiu maljuna japana diablo moviĝis tien kaj reen antaŭ lia pafilbuŝo. Kun kunpremitaj dentoj kaj fermitaj okuloj li faris pafon. Paf! La kuglo sible enŝoviĝis en akvon kaj trafis blankan angilon, kiu leviĝis al la akvosurfaco kun ventro kontraŭ la ĉielo. La japana oficiro falis en akvon.

“Japana oficiro, paĉjo!” Patro kriis.

Pafo sonis malantaŭ la kapo de Patro. La kapo de la maljuna japano krevis pro kugloeksplodo kaj maso da sango disiĝis en akvo. La alia japana diablo rampis sur la manoj kaj piedoj kaj kaŝis sin malantaŭ la piliero.

Denove la kugla reto de la japanaj diabloj alflugis kaj Avo subpremis Patron. La kugloj siblis kaj susuris en sorgokampoj.

“Brave, vi estas mia filo sendube!”

Avo kaj Patro ne sciis, ke la japana oficiro, kiun ili pafmortigis, estas generalmajoro Nakaoka Jiko. Trumpetisto Liu ne ĉesis trumpeti. La suno sur la ĉielo estis bakita ruĝ-verda kaj malvigla de la flamoj de la brulantaj kamionoj.

“Paĉjo,” diris Patro, “mia panjo volas vidi vin. Ŝi petis vin iri.”

“Ĉu ŝi ankoraŭ vivas?” Avo demandis.

“Jes,” Patro respondis.

Prenante Patron je la mano, Avo iris en profundon de sorgoplantoj.

Avino kuŝis sur la tero, ombrite de sorgoplantoj, kun nobla rideto, kiun ŝi pretigis por Avo. Ŝia vizaĝo aspektis pli pale ol iam antaŭe kaj ŝiaj okuloj ankoraŭ ne strikte fermiĝis.

Por la unua fojo Patro trovis, ke du larmofluoj falas laŭ la hardita vizaĝo de Avo.

Genuante ĉe ŝia korpo, Avo fermigis ŝiajn okulojn per sia nevundita mano.

En 1976, kiam Avo mortis, Patro fermigis liajn rondigitajn okulojn per sia maldekstra mano, al kiu mankis du fingroj. De 1958, kiam Avo revenis el sovaĝa monto de Hokkaido de Japanio, li jam ne tre scipovis paroli. Li eĉ eligis ĉiun vorton kiel pezan ŝtonpecon. Tiam la solena ceremonio por bonvenigi lin okazis en la vilaĝo kaj eĉ guberniestro ĝin ĉeestis. Tiutempe mi estis du-jara. Mi

ankoraŭ memoras, ke sub la ginkoarbo ĉe la vilaĝa enirejo linie metiĝis ok kvadrataj tabloj kun po vazo da alkoholaĵo kaj po dekkelkaj grandaj bovloj. Elverŝinte el vazo alkoholaĵon en unu bovlon, la guberniestro ambaŭmane alportis ĝin al Avo. Li diris: “Maljuna heroo, mi proponu bovlon da alkoholaĵo al vi, pro tio, ke vi glorigis nin popolanojn de la tuta gubernio!”

Mallerte stariĝinte, li rulis siajn grizblankajn okulglobojn kaj diris: “Ho... Ho... pafilo... pafilo.”

Avo almetis la bovlon da alkoholaĵo al la lipoj, kun la faltoplena kolo rigidigita kaj gorĝa pomo glitanta supren kaj malsupren. Malmulte da alkoholaĵo eniris en lian buŝon kaj plej multe fluis glugle laŭ lia mentono sur lian bruston.

En mia memoro, Avo prenis min je la mano kaj promenis tien kaj ĉi tien sur kampoj, kondukante etan nigran hundon. Li tre ŝatis rigardi la ponton super la Inko-rivero. Kun sia mano sur la ŝtono de piliero, li staris ĉe la pontkapo dum preskaŭ tuta antaŭtagmezo aŭ tuta posttagmezo. Mi vidis, ke liaj okuloj ofte fiksiĝas sur la kuglotruoj en la ŝtonplanko de la ponto.

Dum kreskado de sorgoplantoj Avo kunportis min en sorgokampojn. La loko, kiun li ŝatis frekventi, estis ne malproksime de la Inko-rivero. Mi divenas, ke tie estis la loko, kie Avino ascendis al la ĉielo — la ordinara loko de nigra grundo estis plene saturita de ŝia sango. Tiam, kiam la malnova domo de nia familio ankoraŭ ne estis malkonstruita, Avo iutage fosis per pioĉo sub la sorparbo. Li elfosis kelkajn larvojn de cikado, pasigis ilin al mi kaj mi ĵetis ilin al la hundo, sed ĝi nur mordemortigis ilin anstataŭ manĝi ilin.

“Kion vi elfosas, paĉjo?” demandis mia patrino, kiu pretis iri al la komunuma manĝejo prepari manĝon.

Levinte la kapon, Avo gapis al ŝi per la rigardo kvazaŭ apartenanta al la alia mondo. Post foriro de mia patrino li daŭrigis fosadon. Li fosis grandan kavon, hakrompis dekkelkajn radikojn variajn en grandeco, forlevis ŝtontabulon kaj elprenis rustan kaj deformitan ladskaton el la sombra sileto el brikoj. Je ekfalo sur la teron la ladskatolo tuj disrompiĝis. El ĉifona tolo vidiĝis ruĝe rusta feraĵo, pli longa ol mi. Mi demandis al li, kio ĝi estas. Li respondis: “Ho... ho... pafilo... pafilo.”

Li metis ĝin sur la teron en sunlumo. Sidante antaŭ ĝi, li malfermis la okulojn dum kelka tempo kaj fermis la okulojn dum kelka tempo, denove li malfermis la okulojn kaj fermis la okulojn. Poste, stariĝinte, li trovis lignohakilon kaj hakis ĝin laŭvole. Fine li dishakis ĝin en feran mason kaj disĵetis parton post parto en la korto.

“Ĉu mia panjo mortis, paĉjo?” Patro demandis al Avo.

Avo ekbalancis la kapon.

“Paĉjo!” kriis Patro.

Ekpulpinte lian kapon, Avo eltiris spadon el post la postaĵo kaj hakfaligis sorgoplantojn por kovri la korpon de Avino.

Sude de la digo aŭdiĝis intensaj pafado, kriado kaj eksplodado. Trenante Patron, Avo sin ĵetis al la pontokapo.

El la sorgokampoj sude de la ponto elsturmis pli ol cent homoj vestitaj en griza militista uniformo. Iuj el dekkelkaj japanaj diabloj, kiuj surkuris la digon, estis pafmortigitaj, kaj aliaj trapikitaj per bajonetoj. Patro vidis, ke Taĉmentestro Leng, kun revolvero ĉe larĝa ledzono, gardite de kelkaj altkreskaj korpogardistoj, ĉirkaŭiris la brulantajn kamionojn kaj sin direktas al la nordo de la ponto. Je ekvido al li, Avo eligis rikanon kaj tenis sin senmove kun pistolo en mano, starante ĉe la pontokapo.

Leng impone aliris kaj diris: “Vi bone faris, Komandanto Yu!”

“Vi hundido!” sakris Avo.

“Mi alvenas iom malfrue!”

“Vi hundido!”

“Se ni ne alvenus ĝustatempe, vi estus tute finitaj!”

“Vi hundido!”

Avo direktis sian pistolon al la taĉmentestro. Tiu faris okulsignon kaj du korpogardistoj lerte deŝiris la pistolon de Avo.

Levinte sian Browning-pistolon, Patro faris pafon, kiu trafis la postajon de korpogardisto kaptanta Avon.

Ĵetinte la piedon, la alia korpogardisto renversis Patron, kaj ektretinte ties pojn per la granda piedo, li klinis sin kaj levprenis la Browning-pistolon.

Avo kaj Patro ambaŭ estis ligitaj de korpogardistoj.

“Malfermu viajn hundajn okulaĉojn kaj rigardu miajn fratojn, Variolulo Leng!”

Sur la digoj ambaŭflanke de la ŝoseo kaj en sorgokampoj kuŝis pelmele kadavroj kaj vunditoj. Trumpetisto Liu ankoraŭ intermite trumpetis, kun sango elfluanta el siaj buŝanguloj kaj nazruoj.

Demetinte la militistan kepon, la taĉmentestro faris riverencon al la sorgokampoj oriente de la ŝoseo, kaj alian riverencon al la sorgokampoj okcidente de la ŝoseo.

“Malligu Komandanton Yu kaj lian filon!” la taĉmentestro ordonis.

La korpogardistoj malligis ilin. La korpogardisto, kiu estis pafita je la postaĵo, kovris ĝin per mano, kaj sango gutadis el inter liaj fingroj.

La taĉmentestro prenis la pistolojn de la manoj de korpogardisto kaj redonis ilin al Avo kaj Patro.

La trupanoj laŭvice trapasis la ponton. Sin ĵetinte al la kadavroj de la japanaj soldatoj kaj la kamionoj, ili forprenis mitralojn, fusilojn, kuglojn kaj kartoĉŝargilojn, sabrojn kaj sabringojn, ledzonojn kaj ledbotojn, monujojn kaj razilojn.

Saltinte en akvon, kelkaj trupanoj kaptis vivantan japanan soldaton, kiu kaŝis sin malantaŭ piliero, kaj portis mortintan maljunan japanan diablon.

“Taĉmentestro, jen li estas generalo!” diris oficiro.

Kun ĝojo la taĉmentestro alpremis sin kaj pririgardis, dirante: “Demetu lian militistan uniformon. Paku ĉiujn liajn aĵojn.”

“Ni renkontiĝu poste, Komandanto Yu!” adiaŭis Taĉmentestro Leng.

Grupo da gardistoj eskortis lin suden de la ponto.

Avo hurlis: “Haltu, Leng!”

Sin turninte, la taĉmentestro diris: “Komandanto Yu, vi ne donos al mi kaŝan pafon, ĉu?”

“Mi ne indulgos vin!” kriis Avo.

“Wang Hu,” la taĉmentestro ordonis, “restigu unu mitralon al Komandanto Yu!”

Kelkaj trupanoj alportis mitralon kaj metis ĝin antaŭ la piedojn de Komandanto Yu.

“Ni ankaŭ restigu al vi tiujn kamionojn kune kun rizo sur ili.”

Post kiam ĉiuj trupanoj de Taĉmentestro Leng trapasis la ponton kaj ordigis la vicaron sur la digo, ili rekte iris orienten laŭ la digo.

La suno subiris. Finbrulinte, la kamionoj fariĝis nigraj framoj kaj la haladzo de brulantaj pneŭoj atakis sufoke. La du nebrulintaj kamionoj baris la vojon al la ponto de antaŭe kaj de malantaŭe. Vidiĝis nur sange nigra akvo plene en la rivero kaj sange ruĝaj sorgospikoj en la tuta kamparo.

Levpreninte nedifektitan patkukon sur la digo, Patro donis ĝin al Avo, dirante: “Paĉjo, manĝu. Ĝi estas patkuko farita de mia panjo.”

Avo diris: “Vi manĝu!”

Patro enmanigis ĝin al Avo, kaj diris: “Mi levprenos alian.”

Patro alportis alian patkukon kaj forte faris plenbuŝan mordon.

Mi dediĉas tiun ĉi verkon al tiuj heroaj kaj mistraktitaj fantomoj, kiuj vagadas en vaste senlimaj ruĝaj sorgokampoj. Kiel via nefidelema posteulo, mi volontus elpreni mian koron, trempitan en soj-saŭco, distranĉi ĝin en pecojn, distribui ilin en tri bovlojn kaj ofercele meti ilin en sorgokampo. Bonvolu akcepti mian oferaĵon! Bonvolu ĝui mian oferaĵon!

**(Fino)**